

LEGOLIBRETO II.

Estimataj legantoj, karaj amikoj,
nun vi havas en viaj manoj jam duan legolibreton, kiun ni preparis por vi kun la deziro iomete amuzi vin, doni ion por legi kaj lerni el fontoj, kiujn ni trovis en diversaj lokoj en Esperantujo. Ni faris tion amatore, do estu toleremaj kaj indulgemaj...

Se vi volus partopreni en venonta verketo, bonvolu skribi al ni

viaj

drahotovaesperanto@seznam.cz

vanekmi@centrum.cz

2002

Grandan dankon meritas al nia afabla, korektanto, sinjoro Richard Moerbeek, ĉar sen lia volonta helpo ni ne kuraĝus Legolibreton II publikigi.

geaŭtoroj

El la libreto „Rakontoj pri Afanti“

- Ĉinaj Popolaj Rakontoj – Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1982

Neniu scias nun

Kiam Afanti mem fariĝis loka juĝisto, multaj homoj konkuris amikiĝi kun li. Iu laŭdis lin: „Nasredin, vi estas tre admirinda, ke vi havas tiom da amikoj!“

Afanti respondis: „Kiom da amikoj mi havas, neniu scias nun. Nur post kiam mi ekŝiĝos de la juĝisteco, oni povos ekscii, kiuj vere estas miaj amikoj.“

Mandareno en boato

Iu mandareno neniam antaŭ veturis per boato. Foje li kune kun Afanti transiris riveron per boato, kio estis la unua fojo en lia vivo. Kiam la boato atingis la mezon de la rivero, tio ege timigis lin. Li, tremante pro timo, forte tiris la baskon de Afanti kaj senĉese petadis: „Bona Afanti, Bona Afanti! Mia koro elsaltos pro timo, elpensu rimedon por mi!“

„Unu rimedo ja ekzistas, via moŝto, sed mi ne scias, ĉu vi volas akcepti ĝin aŭ ne?“

„Kial ne, Afanti? Mi volonte konsentas ion ajn. Rapidu, mi petas,“ insistis la mandareno.

„Bone,“ diris Afanti, „do vi spertu unue en la akvo,“ kaj puŝis lin en la akvon. Post kiam la mandareno jam kelkfoje subakviĝis, Afanti kaptis lian hararon kaj tiris lin en la boaton.

Tiam la mandareno ne plu timis esti en la boato. Afanti afable demandis lin: „Kiel vi nun sentas vin? Ĉu vi ankoraŭ timas?“

„Ne, ne, nun mi sentas min tre komforta,“ rapidege respondis la mandareno, tremante pro malvarmo.

„Jes!“ meditis Afanti. „Tiu, kiu neniam vojaĝis per la piedoj, ne scias kiel bone estas rajdi sur ĉevalo; tiu, kiu neniam subakviĝis, ne sentas la sekurecon de boato. Kiel vi povas kompreni malsaton de la malriĉuloj, se vi ĉiam manĝas bongustan kuskuson?“

Honto

Foje ŝtelisto venis en la hejmon de Afanti. Afanti ekvidis lin kaj tuj sin kaŝis en keston.

La ŝtelisto serĉis ĉie en la ĉambro, sed nenion ŝtelindan trovis. Fine li malfermis la keston kaj kun eksalto vidis Afanti: „Ha! Kion vi faras en la kesto?“

„Nu, ĉar en mia hejmo troviĝas nenio, kio plaĉas al vi, mi tre hontas kaj pro tio kaŝis min en la kesto,“ respondis Afanti.

Hindia legendo sendita el Brazilo

En la fundo de mia komputilo mi trovis tiun ĉi legendon, kiun al mi iu sendis el Brazilo:

Antikva legendo el Hindio rakontas, ke antaŭ multe da tempo ĉiuj viroj kaj ĉiuj virinoj estis dioj.

Ili tiom trouzis siajn diajn povojn, ke Bramo, la dia majstro, decidis, ke li forprenos ilian dian povon kaj kaŝos ĝin en lokon, kie ili neniam trovos ĝin.

La problemo estis kie eltrovi kaŝejon. Kunvokite al konsilio aliaj dioj proponis:

„Ni kaŝu la homan diecon sub la tero,“ sed Bramo respondis, ke la homo scias kavigi kaj li ĝin trovos.

„Ni kaŝu la homan diecon funde de oceanoj,“ sed Bramo respondis, ke la homo iam lernos plonĝi kaj li ĝin trovos.

La dioj tiam konkludis, ke ne ekzistas kaŝejo por la homa dieco kaj Bramo diris:

„Mi scias pri la nura loko, kie la homo neniam serĉos.“

Ekde tiu tempo, laŭ la legendo, la homo renversfosas kaj kavigas la teron, trairas kaj serĉas en marfundoj, sed neniam rigardas, kie estas kaŝita lia dieco – funde de si mem.

Komika fabeleto - aŭdita de lernantoj

Korniko sidis sur branĉo de alta, multjara kverko. Preterkuris leporo kaj demandis la kornikon: „Kion vi faras tie?“

„Mi fieras!“

„Ĉu mi povas fieri kun vi?“

„Certe. Alvenu!“

La leporo grimpis sur la arbon kaj sidiĝis apud la korniko.

Preterkuris vulpo. Ŝi ekvidis la leporon kun la korniko kaj demandis:

„Kion vi faras tie supre?“

„Ni fieras, fanfaronas!“

„Ĉu mi rajtas fieri kaj fanfaroni kun vi?“

„Jes, certe! Venu!“

La vulpo grimpis la arbon.

Preterpaŝis urso. Kiam li vidis la kornikon, leporon kaj vulpon sur la branĉo li demandis: „Kion vi faras tie?“

„Ni fieras, fanfaronas, pavas kaj gaskonas!“

„Ĉu ankaŭ mi povas kun vi?“

„Jes! Grimpu la arbon!“

La urso grimpis kaj sidiĝis sur la branĉon. La branĉo rompiĝis kaj la korniko ekflugis. La leporo, vulpo kaj urso falis teren.

La korniko demandis: „Ĉu vi ne kapablas flugi?“

„Ne, tute ne,“ respondis la bestoj.
„Do, kial vi volis fieri?“

Korespondo de scivolemuloj - reta demando de kursanoj

Estimataj akademianoj,

permesu, ke ni petu helpon dum serĉado de la vorto por la signo „@“. En la ĉeĥa lingvo ni uzas la vorton „zavináč“ (=volvaĵo). Zavináč signifas ankaŭ sukriĉan fiŝon, farĉitan per brasiko kaj cepo en acida saŭco. Tranĉo de la fiŝo estas volvita kiel @. Certe por @ ekzistas vorto en Esperanto. Ni dankas pro respondo kaj kore salutas el Ĉeĥio.

Rondeto el gimnazio en Mladá Boleslav

respondo de akademianoj

Estimata,

la ordinara vorto estas „po-signo“ (el komerco), ĵargone „heliko“ (pro la formo de konko helika). Vidu en PIV2 sub „heliko 3“.

Sincere

Stefan Maul

direktoro de la Konsulta Komisiono de Akademio de Esperanto

Leter-adreso: Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio

Ret-adreso: smaul86150@aol.com

Lasta urso en la subgigantmontara regiono

el publikaĵo „Legendoj de Úpice kaj ĉirkaŭaĵo“
verkis Aneta Kalužná, tradukis Lubomír Středa.

Fine de la karnavalo en la jaro 1887 el gastejo en Zálesí elŝanceliĝis kelkaj svagaj personoj. Ili estis muzikantoj, kiuj post tutnokta ludado disiris al siaj hejmoj. En angulo de la gastejo restis dormi sur benko unusola gasto, najbaro Domáň.

Matene en la vilaĝo estis kvieto. Nur preĝejservisto Vít pretigis sin, ke li sonorigu la anĝeluson, tuj kiam komencos tagiĝi.

Ankoraŭ dum la krepusko preĝejservisto Vít celis al la tombeja pordego, kiun li devis trairi, sed subite li haltis. Sur neĝo antaŭ la pordego kuŝis stranga ŝvelforma korpo. Tempeton li eĉ ne spiris kaj nur okulegis la fenomenon, kiu ne

moviĝis. Al la preĝejservisto ŝajnis, ke ĝi atendas lin, por ke ĝi povu ĵeti sin al li. Tion la preĝejservisto bone konsciis kaj ne proksimiĝis al la korpo, sed buligis neĝon kaj ĵetis la bulon al la mistera estaĵo. La fenomeno moviĝis kaj laŭte ekmurmuregis. „Tio ja estas urso“, ekpensis Vít. La sango frostiĝis en liaj vazoj, lia spiro reteniĝis kaj kruroj ligniĝis. Sed li konsciis ankoraŭ: „Jes, ĝi estas urso, kiu post longa vintro hazarde venis el Gigantmontaro“, rekonsciigis el sia rigidiĝo, ekkuregis kaj galopis rekte en la gastejon, kie sidis ankoraŭ la lasta gasto Domán, kaj prirakontis al li, kiel li trafis sovaĝan rabobeston.

Post momento elkuris preĝejservisto kune kun postdorma Domán el la gastejo kaj ili volis pereigi la urson. Domán kunprenis fusilon kaj kiel sperta soldato proksimiĝis al la besto sentime kaj kun kuraĝo.

Sed la rabobesto kuŝanta ĉe la tombeja pordego tute ne moviĝis. „Ĝi estas verŝajne bestaĉo langvora de malsato“, ekpensis Domán, ŝargis la fusilon kaj pafis. „Pum“, knalis pafo kaj la besto ĉe la pordego ekmurmuregis, sed ne falis. „Unu pafo do al ĝi ne sufiĉas“, ekkriis Domán kaj jam denove ŝargis la fusilon. Sed en tiu momento el fosaĵo sub la pordego aŭdiĝis laŭta sakrado kaj kiel aperis, tiel aperis, subite staris antaŭ la atakantoj muzikanto Ŝimek. „Ho, vi fiuloj unikaj, kial vi ĉi tie pafas?“ li insultis ilin kaj ĉiuj proksimiĝis ĝis la pordego, kie ĉiuj ekvidis la grave difektitan kontrabason. Ŝimek ĝin portis el la gastejo hejmen, sed ĉe la tombeja pordego ĝin formetis, por ke li ripozu, sed elĉerpita de ĝia pezo, de laceco, sed plej multe de biero, li endormiĝis sur la mola deklivo.

Pri tiu ĉi historieto la homoj ridis ankoraŭ longe post kiam ĝi okazis. La muzikanto plendis kontraŭ Domán pri tio, ke li pafdetruis lian kontrabason kaj la posedanto de la ĉasejo denunciis la pafanton pri tio, ke li en lia ĉasdistrikto ĉasas ursojn.

El la libreto „ESPERANTO NE ESTAS NUR LINGVO“

de Spomenka Ŝtimec (la zagreba metodo), legaĵo post la baza kurso, KEL, Zagreb, 2002

Sepa leciono

ESPERANTO-GAZETOJ

„Ĉu vi deziras aboni iun Esperanto-gazeton?“

„Kion signifas aboni?“

„Aboni signifas antaŭpagi por la tuta jaro iun periodaĵon, kiu poste venos al via adreso.“

„Kie oni povas pagi por Esperanto-periodaĵo?“

„Vi povas sendi monon al gazet-peranto. Tio estas persono, kiu peras la gazeton inter la redaktejo kaj la legantoj. En Esperanto-gazetoj vi ofte povas trovi la liston de perantoj. Per perantoj vi povas aboni.“

„Kiujn gazetojn mi povas aboni?“

„Mi prezentos al vi kelkajn gazetojn, kaj vi povas mem decidi, kiu estus la plej bona por vi. **Juna amiko** estas revuo por lernejoj kaj komencantoj.

Kontakto estas revuo por gejunuloj. Gejunuloj membras en TEJO. TEJO estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. **Monato** estas internacia revuo el Antverpeno en Belgio pri politiko, kulturo kaj interesaĵojn artikolas esperantistoj el diversaj landoj. **Eventoj** estas internacia gazeto el Budapeŝto. La revuo **Esperanto** estas tre grava revuo de Universala Esperanto-Asocio. **Heroldo de Esperanto** havas tre longan tradicion.

„Kio estas tiu Universala Esperanto...?“

„Esperanto ne estas nur lingvo. Esperanto estas ankaŭ organizo. La plej granda Esperanto-organizo estas Universala Esperanto-Asocio. Ĝia centro estas en Nederlando, en Roterdamo. Esperantistoj povas aliĝi al la organizo kaj regule ricevi informojn pri la novaĵoj en la Esperanto-mondo.“

„Kiel mi povas aliĝi al la organizo?“

„Vi devas sendi kotizon al UEA.“

„Kion mi devas sendi?“

„La kotizon. Kotizi signifas pagi monon en komunan kason.“

„Mi komprenas. Estas multaj novaj vortoj tie: peranto, UEA, kotizo.“

„Jes, estas bone koni tiujn vortojn de la Esperanto-Movado.“

„Kion mi elektu?“

„Mi donos al vi librokatalogon kun la prezoj de gazetabonoj. Studu la prezojn kaj poste decidu.“

aboni _____	aliĝi _____	asocio _____
Antverpeno _____	Belgio _____	centro _____
heroldo _____	kaso _____	katalogo _____
komuna _____	kotizo _____	leganto _____
movado _____	Nederlando _____	organizaĵo _____
peranto _____	peri _____	redaktejo _____
regule _____	Roterdamo _____	ĵurnalo _____

Pri la historio de la arta lumo - G.Kurucz, Hungario

La homo estas la sola vivulo, kiu scias estigi lumon, sed ĝia deveno perdiĝas sen postsignoj, en la profunda malproksimo de nia historio.

Laŭ pragreka mito, Prometeo ŝtelis la fajron disde la dioj, ĉar sciu, ke la fajro estas fonto de dia povo. Kiu regas la fajron, tiu regas super la fortoj de la naturo. Ne estas do mirinde, ke la scipovo lumigi la ĉirkaŭaĵon delonge interesas la homaron.

La unua lumigilo estis fajrejo: loko, kie aparta grava persono zorgis pri konstanta fajro.

La portebla lumigilo estis granda paŝo antaŭen. La unua „lampo“ estis trovita en Suda Francio, kaj ĝi havas la aĝon de ĉirkaŭ 15 mil jaroj. Ĝi konsistas el kavigita ŝtono. Verŝajne, graso aŭ sebo nutris la fajron de la „lampo“.

Antaŭ ĉirkaŭ 5 mil jaroj, en Egiptujo, oni uzis tre belajn metalajn vazojn por lumigado, sed ni ne scias, kio nutris ilian fajron.

En la 4-a jarcento, riĉuloj ekuzis vaksajn kandelojn kiel lumigilojn.

La Nederlanda urbo Hago estis la unua, sur kies stratoj aperis publikaj lumigiloj, en la jaro 1673. Baldaŭ sekvis ĝin Parizo, kiu iĝis la „urbo de la lumo“.

La unua gasa lampo eklumis en la laborejo de apotekisto en Würzburg (Virzburg) en 1786. Oni longe opiniis, ke la gaso estas la plej perfekta lumigilo. Ĝi elpuŝis la antaŭajn lumofontojn. Sed eksplodoj pro gaso atentigis la homaron pri ĝia danĝero.

Revolucia turno ekestis en 1854. Heinrich Grebel, horloĝisto el Hannover, kiu loĝis poste en Nov-Jorko, faris la unuan elektran lampon. Ĝi konsistis el boteleto por parfumo, kaj el du karbiĝintaj bambuaj bastonetoj. Li estigis vakuon en la boteleto, kaj ligis la finaĵon de ambaŭ bastonetoj al pilo. Ekestis lumo sen fumo kaj malbonaodoro.

Tamen oni konsideras kiel patron de la elektra lampo ne la horloĝiston H. Grebel, sed la faman usonan inventiston Thomas Alva Edison. Li elpensis, interalie, la fonografon, la projekciilon por mova filmo kaj, en la jaro 1879, li pendigis 60 lumantajn elektrajn lampojn sur arboj de la Menlo-parko en Nov-Jorko.

De tiu aŭtuno, la elektra lampo multe perfektigis; sed ĝi ne ŝanĝigis esence. Ĝi iĝis nia ĉiutaga amiko.

Rakonto el Brazilo

Junulino estis en aviadilejo de flughaveno atendante sian ekflugon. Pro tio, ke ŝi devos longe atendi, ŝi decidis aĉeti libron, por pasigi la tempon. Ŝi aĉetis ankaŭ biskvitopaketon. Poste ŝi sidiĝis sur brakseĝo por ripozi kaj kviete legi. Apud ŝi sidiĝis viro. Kiam ŝi elprenis unuan biskviton, ankaŭ la viro elprenis unu. Ŝi sentis sin kolera, sed nenion diris. Ŝi nur pensis: Jen needukito! Se mi pli emus, mi pugnus lian okulon, por ke li neniam forgesu.

Ĉiufoje, kiam ŝi prenis biskviton, ankaŭ la viro prenis unu. Tio kolerigis ŝin tiel, ke ŝi eĉ ne kapablis reagi. Kiam nur restis unu biskvito, ŝi ekpensis: Kion nun faros tiu kaŝitulo?

Tiam la viro dividis la lastan biskviton en la mezo, lasante duan parton por ŝi.

Tio estis troa! Ŝi estis supermezure kolera! Tiam ŝi kunprenis siajn libron kaj aĵojn kaj direktis sin al la aviadilo. Kiam ŝi sidiĝis en la aviadilon, ŝi rigardis en sia sako por elpreni sukeraĵeton kaj surprize la biskvitosaketo tie estis, tuta

kaj fermita. Nun ŝi ekkonsciis, ke ŝi eraris. Ŝi forgesis, ke ŝi enmetis siajn biskvitojn en sian sakon. Ŝi eksentis honton! La viro dividas siajn biskvitojn sen apero de kolero, nervozeco aŭ ribelo, kiam ŝi skuiĝis ekpensante, ke ŝi dividis siajn biskvitojn kun li.

Kaj ne estis plu tempo por klarigi aŭ por peti pardonon.

Kiom ofte en nia vivo ni manĝas biskvitojn de la aliuloj sen konscii tion? Antaŭ ol konkludi, vi observu pli bone la aferojn, eble ili ne estas tiel samaj, kiel vi pensas. Ne pensu tion, kion vi ne scias pri la homoj.

Estas kvar aferoj en la vivo, kiujn oni ne regajnas:

la ŝtonon post ol ĵeti ĝin

la parolon post ol prononci ĝin

la okazon post ol perdi ĝin

kaj tempon post kiam ĝi fluis...

Anekdotoj

Sur la dorso de la ledjako de motorciklisto mi legis ĉi tekston: „Se vi vidas ĉi tion, mia amikino falis de sur la selo.“

Certe mi vidis la surskribon kaj eble mi renkontis lian amikinson en apoteko, kie ŝi aĉetis gravedoteston kaj demandis: „Ĉu la demandoj estas komplikaj?“

Post ŝi staris du policianoj kaj aŭdante pri testoj unu demandis al la alia: „Kaj kiel sukcesis via stirtesto?“
La dua respondis: „Dank´ al dio, ĝi estas negativa.“

Ĉar teroristoj troviĝas kie homoj svarmas, policistoj iris al la ombro de la preĝejo por ripozi, ĉar estis jam longe seka kaj varmega vetero. En la preĝejo krom du pastroj neniu ĉeestis. La policistoj aŭdis interparolon de la pastroj:

„Miaj paroĥanoj pli kaj pli perdas la fidon. Lastan dimanĉon mi organizis publikajn preĝojn por peti Dion pluvigi sur la teron... Ve! Neniu venis al la preĝejo.“

„Kaj en mia paroĥo“, daŭrigis la dua, ankaŭ mi organizis publikajn preĝojn por peti Dion pluvigi sur la teron. Bedaŭrinde ankaŭ miaj paroĥanoj perdas la fidon kiel la viaj. Kelkaj el ili ja venis al la preĝejo, sed ve! ... neniu kunportis pluvombreton!“

Plu iris policianoj al zooĝardeno, kie ankaŭ multaj homoj svarmas. Tamen ĉi tie ne estis dum tiu varmega vetero multe da homoj. La policistoj observis grandan akvarion. Sur la fundo estis anodontoj.

Unu policisto diris: „Anodontoj estas ege inteligentaj.“

La dua rimarkis: „Tio al ili ne multe utilas, ĉar ili ne havas cerbon.“

Poste ili promenis tra la stratoj kaj trafis viron kun pingveno. La policanoj kontrolis dokumentojn de la viro kaj demandis pri la pingveno. La viro diris, ke pingvenon li trovis. La policanoj rekomendis al la viro deponi la pingvenon en la oficejon – perdaĵoj/trovaĵoj.

La viro kun la pingveno vizitis tiun ĉi oficejon, kie ridema oficisto rekomendis al la viro gvidi la pingvenon al la zooparkon.

Vespere la oficisto ŝlosis la oficejon kaj ekvidis, ke la viro kun la pingveno promenas sur la strato. Kun intereso la oficisto venis al la viro kaj demandis: „Ĉu vi ne iris en la zooparkon?“

„Jes, ni iris, nun ni iras kinejon.“

Kiam la viro kun la pingveno revenis el la kinejo estis jam mallumo. Ili iris laŭ kampo kaj ekaŭdis kriadon: „Vivu la registaro, vivu la registaro!!!“ Sur kampo saltetis leporoj, kiuj ĝoje kriis. La pingveno demandis ilin kial ili tiom laŭte laŭdas la registaron. La leporoj kun rido vokis: „Oni plimultege kostigis plumberojn!“

Intervjuo kun Dio – laŭ elsendo de ĉeĥa radio, kiun prilaboris geesperantistoj dum la seminario en Skokovy

Mi telefonis al li intervjui lin. Li diris: „Venu, se vi deziras.“

Mi respondis: „Se vi havas sufiĉe da tempo...“

Dio ekridetis kaj diris: „Mia tempo estas la eterneco kaj tial estas sufiĉe da tempo por ĉio. Kaj pri kio vi deziras demandi?“

Mi havis preparitajn demandojn kaj ĉar Dio estas ĉieesta, ni komencis: *Per kio surprizas vin homoj, kio ŝajnas al vi ĉe ili stranga?*

„Homojn ĝenas esti infanoj. Ili hastas esti maturaj kaj estas maturaj, ili sopiras esti infanoj. Surprizas min, ke ili perdas la sanon por perlabori monon kaj poste monon elspezas por denove akiri la sanon. Surprizas min, ke ili tiel forte timas pri la estonteco kaj forgesas ĝui la estantecon kaj tiamaniere ja vivas nek por la estanto, nek por la estonto. Surprizas min, ke ili vivas kvazaŭ ili ne vivus.“

Dio prenis miajn manojn kaj ni eksilentis. Poste mi demandis:

Kiel vi volus eduki viajn infanojn, se vi estus tera patro?

Dio denove ekridetis kaj rakontis:

„Mi dezirus, ke ili sciu, ke ne estas eble iun devigi, ke tiu amu ilin. Ke estas eble nur permesi al aliulo, ke aliulo amu ilin. Mi dezirus, ke ili sciu, ke la plej valora ne estas tio, **kion** ili dum vivo havas, sed kun **kiu** ili pace vivas. Mi dezirus, ke ili sciu, ke ne estas bone taksii sin kompare kun aliaj. Ĉiuj homoj

estos prijuĝitaj sole pri si mem, ne pro tio, ke ili estas pli bonaj aŭ pli malbonaj ol aliaj. Mi dezirus, ke ili sciu, ke riĉa ne estas tiu, kiu posedas plej multe, sed tiu, kiu bezonas plej malmulte. Mi dezirus, ke ili eksciu, ke nur kelkaj sekundoj sufiĉas por profunde vundi aliajn, kiuj ilin amas, sed daŭras jaroj por resanigo kaj tamen cikatroj restos. Mi dezirus, ke ili sciu, ke ekzistas homoj, kiuj ilin tre amas, sed ne scias kiel siajn sentojn prezenti. Mi dezirus, ke ili sciu, ke je mono oni povas multe aĉeti, sed neniam la feliĉon. Mi dezirus, ke ili sciu, ke vera amiko estas tiu, kiu pri ili ĉion scias, tamen ilin amas. Mi dezirus, ke ili sciu, ke ne sufiĉas ke oni pardonas al ili, sed ili mem devas pardoni al aliaj.“

Ni sidis kelkan tempon kaj mi ĝuis Dian ĉeeston. Poste mi dankis al Dio, ĉar li dediĉis al mi sian tempon. Kaj Dio respondis:

„Venu kiam ajn. Mi funkcias 24 horojn tage. Demandu kaj mi ĉiam respondos.“

Homoj forgesos pri kio oni parolis. Homoj forgesos kion vi faris, sed ili neniam forgesos kiel ili sentis...

Lernu de anseroj – letere sendis miaj germanaj amikoj

La scienco malkovris, ke anseroj flugas formante „V-on“, ĉar kiam ĉiu birdo frapas la flugilojn, organizas movon en la aero, kiu helpas al ansero, kiu iras malantaŭ la unua. Flugante en „Vo“ la grupo pliigas sian flugkapablon kompare kun individua flugo.

Konkludo: Kiam ni dividas komunan direkton kaj komunecan senton, ni povas pli facile kaj pli rapide atingi nian celon. Tio estas mutuala helpo.

Ĉiufoje, kiam ansero eliras el la formacio kaj sentas la aeran reziston, ĝi rimarkas la malfacilon por flugi sola kaj ĝi tuj denove enkorpiĝas en la grupon por profiti kaj ŝapari forton.

Konkludo: Se ni havus la anseran logikon, ni kutimiĝus kun tiuj, kiuj moviĝas en sama direkto kiel ni.

Kiam kondukanto de anseroj laciĝas, anstataŭas ĝin de malantaŭ alia ansero kaj prenas ĝian vicon.

Konkludo: Ni atingus pli bonajn rezultojn, se ni alternus por plenumi malfacilajn laborojn.

La malantaŭaj anseroj eligas sonon kaj ili ofte eligas ĝin por stimuli tiujn, kiuj antaŭas por gardi la rapidpovon.

Konkludo: Kuraĝiga vorto okazigas grandajn rezultojn.

Kiam ansero malsanas aŭ estas vundita de pafado, du el ĝia grupo sekvas ĝin por helpi kaj protekti ĝin kaj restas kun ĝi, ĝis ĝi denove kapablas flugi aŭ ĝis ĝi mortas.

Konkludo: Nur se ni havas anseran inteligentecon, ni restus ĉe aliulo, helpus unu al alia, akompanante ŝin aŭ lin.

Gravas precipe memoreti, ke kiam la bonaj viroj kaj virinoj kuniĝas solidare kaj altruisme, por aferoj dignaj kaj ĝustaj, la mondo pli rapide antaŭeniĝas.

Ĉu tio okazos en Eŭropa Unio ??

TRI PECOJ EL „LITOVA STELO“

Prezidanto aŭ prezidento

Prezidanto estas gvidanto de diskuto, kunveno, kunsido... La vorto devenas de latina *praesidens* (sidanta antaŭe), ĉi tiu – *praesidere* (sidi antaŭ), de kiu estis prenita la esperanta formo *prezidi*. Nuntempe estas grandega nombro da diversaj prezidantoj – de kluboj, asocioj, societo, parlamentoj, akciaj kompanioj, bankoj... Ĉiu gvidanto aŭ estro emas nomi sin prezidanto (eĉ en la litova lingvo, kvankam en ĝi estas pli taŭga vorto – *pirmininkas*).

Tamen estas unu grava ofico – gvidanto de respubliko, „kapo“ de stato, kiun oni nomas prezidento, por distingi tiun postenon de aliaj, malpli signifaj *prezidantoj*. En la litova lingvo tiu distingo ne eblas, en Esperanto – jes. Se tiun postenon okupas virino, eblas diri *prezidentino*, sed distingu ŝin de *prezidentedzino*. Tamen ne estos eraro, se ankaŭ virinon ni nomos *prezidento*.

LITOVA STELO, numero 5, 1999.

La sentoj de envio

Envio neniam estis la ĉefa trajto de mia karaktero, kvankam ĝi akompanis min tra la tuta vivo.

En la junaĝo mi ĉiam enviis prosperantajn sportistojn, precipe tiujn, kiuj perfekte scipovis korbopilki aŭ naĝi – ja mi apenaŭ povis fari tion. Mi admire rigardis ankaŭ virtuoze kurantajn fingrojn de iu fama muzikisto tra piana klavaro kiuj aŭdigis belegan muzikon.

Precipe mi enviis junulojn, kiuj senĝene povis alparoli ajnan knabinon, konatiĝi kun ŝi, danci, amuziĝi. Kontraste mi, ĉiam ĝenita, ne sciis pri kio paroli kun ŝi, kiam kaj kiel ŝerci (mia humursento tuj malaperadis). Des pli – mi ne

scipovis danci. Sidante kun amikoj en kafejo mi same, kiel aliaj, babiladis, anekdotumis, ŝercis. Tamen, kun la apero de iu knabino iuj katenoj denove kaptis min, pezigis mian langon, senridetigis la vizaĝon.

Eble pro tio mi ŝatis kaj nun ŝatas multe labori – tion mi kapablas fari sufiĉe bone kaj neniu povas malhelpi al mi. Mi estas majstro.

Kun la aĝo komencis aperadi novaj sentoj de envio: kial, do, iaj poetoj tiel libere verkintaj, ŝajnas, facilajn versaĵojn, gajnas premiojn (verdire, ne ĉiuj tiaj versaĵoj meritis atenton, pluraj el ili estas tute ne kompreneblaj por mi) kaj en siajn dikajn monuojn ili aldone enmetas tioman gajnitan monsumon. Fakte, eble nur tio ne elvokas la envisenton – mi ne estas monavara, kvankam mia monujo (povas esti ĝuste pro tio) preskaŭ ĉiam estas malplena.

Do, finfine ankaŭ al mi venis la ideo provi miajn fortojn sur ĉi tiu kampo – sur la kampo de verkado. Cetere, la poezio... mi ne estis naskita kiel poeto. Vere, kelkfoje mi provis versumi, sed pli ol 4-6 linioj ne aperadis el sub mia plumo. Kaj sentis mi, ke la kvalito de tiuj linioj taŭgas nur por ĉetabla deklamo al la plej proksimaj amikoj. Sed eble prozo? Ĉu mi provu verki iun rakonton? Ĉu mi verku, kiel mi la unuan fojon enamiĝis, eble, tamen ne. Ĉu povas mi, ordinara persono, kiu ne scias la arton verki, surpaperigi miajn sentojn pli bone, ol siatempe tion faris Stefan Zweig, Lev Tolstoj, Guy de Moupasant kaj aliaj. Des malpli tiu rakonto povos poste pretendi premion. Do, necesas elekti iun pli taŭgan, pli „trankvilan“ temon por la rakonto.

Eble mi verku ion pri mia ŝatata laborokupo? Ofte, ne ofte, sed iam okazadas eventoj indaj, por ke pri ili aperu rakonto. Tamen la „labora“ temo ne estas populara – ne ĉiuj ŝatas ĝin, des pli evidente la ĵurianoj. Ja, de ili dependas, ĉu premii la rakonton aŭ ne atenti ĝin. Kaj ĉu verki ian sciencfikcian rakonton? La fantastikaĵoj plaĉas al multaj. Mi nur timas, ke mia „sperto“ ne sufiĉos por aperigi bonkvalitan rakonton...

Evidente denove mia deziro partopreni en la konkurso restos ne efektivigita. Eĉ la temon estas malfacile elekti. Ĝi devas maturiĝi. Komence aperu en la kapo imago, kia estus rakonto, poste – ĝia proksimuma skizo, malnetaĵo kaj jam post tio la rakonto mem.

Ankoraŭ ekzistas branĉo „eseo“. Mi provus priskribi la vivon kaj aktivadon de iu konata esperantisto aŭ eĉ ne tre konata persono por vasta mondo, kiu meritas priskribon. Ja tiaj personoj multas...

Ne, mi ne kontentigis mian senton de envio. Denove mi restos ne verkinta ion por la konkurso. Tamen. Ĉu mi ne priskribu ĉi tiujn pensojn pri la sentoj envii. Ankaŭ tio estas, ja, sufiĉe interesa temo por ia rakonto...

Kaj eĉ ne gravas, ĉu ĝi estos premiita aŭ ne. La sportistoj diras: „Pleje gravas ne venki, sed partopreni en konkuroj!“ kaj ili strebas venki. Kaj ankaŭ mi sekvu tiun saĝan sloganon.

*Dmitrij Cibulevskij Ĥarkiv Ukrainio
Rakonto sendita por MUZO-98, kiu bedaŭrinde ne okazis.
LITOVA STELO 6, 1998 novembro, decembro.*

Kūčios

Kūčios (Ku'cos) – tiel litovoj nomas la Kristnaskan antaŭvesperon, 24-an de decembro. Tiu vespero estas la plej bela momento de anima koncentriĝo de litovoj. La homoj rememoras, kio jam estas farita kaj kun espero kaj kredo atendas la naskiĝontan Savanton kaj la venontan jaron. Tiu festo respegulas principojn de popola moralo, strebon al belo kaj bono. Tio estas la popola tago de Dankesprimo, la tago de interna ligo inter homoj, la tago de anima fortiĝo.

Dum la Kristnaska antaŭvespero la tablo ludas gravan rolon. Kiam vesperiĝas, kiam estas jam ordigitaj la ĉambroj, la familio revenas de la banejo, sin vestas per festaj vestaĵoj kaj prepariĝas veni al la tablo. Komence venas la mastro portante iom da fojno. En familio tion faras la patro aŭ avo. Li kovras ĝin per pura, aŭ nova tablotuko. Tiam la mastrino meze la tablo metas kruceton, oblatojn, kaj la patro – pecetojn de tranĉita pano. Poste sub gvidado de patrino la plej aĝaj filinoj dismetas festajn manĝaĵojn. Ĉiam, laŭ la moro, devas esti 12 manĝaĵoj. Onidire tio simbolas dek du disĉiplojn (apostolojn) de Kristo, aŭ dek du monatojn de la jaro. Estas ankaŭ opinio, ke je la 12-a horo nokte naskiĝis Jesuo. Tamen la kvanto de la manĝaĵoj ne estas nepre dek du.

Super la tablo oni pendigas ornamaĵon el pajlo. En la ĉambro ofte staras ornamita Kristnaska arbeto – abieto, brulas kandeloj.

La familio sidiĝas ĉe la tablo post la apero de Vespera stelo, proksimume je la 7-a - 8-a horo vespere. Estas ankaŭ kutimo inviti al la tablo solulojn, senfamiliajn najbarojn. Meze la tablo oni starigas kaj bruligas kandelon. Ĝi simbolas Stelon de Bet-Leĥemo, kiu anoncas la venon de Kristo. Ĉiuj familianoj sidiĝas ĉe la tablo en specifaj lokoj. La geavoj kaj gepatroj sidiĝas tiu flanko, kie sur la muro pendas sanktaj bildoj. Oni metas sur la tablon telerojn ankaŭ por mortintaj, enprizonigitaj, ekzilitaj aŭ forestaj familianoj. En tiujn telerojn oni metas branĉeton de abio, mirto aŭ ruto kaj peceton de oblato. La preĝojn ĉe la tablo laŭkutime komencas la patro. Oni preĝas starante, preĝas por tiuj, kiujn oni rememoras, por vivantoj kaj mortintoj.

Post la preĝado oni rompadas oblatojn, dezirante unu al la alia sanon, sukcesojn en ĉiuj aferoj, feliĉon en la venonta jaro. Post la manĝado de oblatoj patrino petas ĉiujn manĝi aliajn manĝaĵojn el pizoj, fazeoloj, el diversaj fiŝoj, legomoj, fungoj. Estas ankaŭ dolĉaj manĝaĵoj, diversaj bakaĵoj, faritaj el faruno, konfitaĵoj. La ordo de la manĝado estas libervola, tamen unuavice oni komencas de salitaj manĝaĵoj kaj finas per la dolĉaj, precipe per papava lakto.

La ĉefaj manĝaĵoj en tuta Litovio tiuvespere estas *prėskuĉiai* (bakitaj farunbuletoj) kun papava lakto, haringo, fiŝoj, manĝaĵoj el fungoj, pizoj, tritikaj grenoj, terpomoj. Mankas viando, ĉar *kūčios* estas fasta tago. Ĉiuj manĝaĵoj havas sian signifon, kiu ne estas precize esplorita. La ĉefaj manĝaĵoj de tiu vespero havas sencon biblian aŭ de antikva popola mondkoncepto. Ekzemple,

pomoj simbolis Edenan arbon, pizo – la forpelon de Adamo kaj Eva el Paradizo, tritikaj grenoj – ekonomiecon, mielo – lumon kaj sanon, pano kaj kuko – fortecon, fidelecon, bonkorecon.

Ĉe la tablo oni parolas malmulte kaj trankvile, parolas pri Kristnasko, naskiĝo de Jesuo, pri familiaj okazaĵoj dum la pasinta jaro. Fininte la manĝadon oni kisas la kruceton sur la tablo, dankas al Dio pro la donitaj manĝaĵoj; infanoj dankas al gepatroj pro la vespermanĝo, hejma komforto, la gepatroj deziras, ke ili elkresku sanaj kaj saĝaj, estu obeemaj, kaj interkisas unuj la aliajn. Poste oni denove preĝas por la mortintoj. La manĝaĵojn oni restigas sur la tablo dum la nokto, kredante, ke tiunokte venos vespermanĝi la animoj de la praavoj kaj de aliaj mortintaj familianoj.

Post la vespermanĝo ankoraŭ neniu iras dormi. Komenciĝas diversaj sorĉadoj kaj divenadoj. Oni eltiras el sub la tablotuko fojnerojn kaj laŭ ties longeco aŭguras la longecon de sia vivo. Junaj kaj maljunaj homoj iras en la korton, rigardas al la ĉielo, observas stelojn, nubojn, neĝon sur la bariloj, divenas la estontecon kaj la sorton.

Precipe la junularo atendas la noktomezon. Oni diras, ke tiam en la puto la akvo fariĝas vino, ke la hejmaj bestoj en la staloj parolas homvoĉe. La fraŭlinoj aŭskultas, en kiu flanko bojas hundoj – de tie venontjare povos veni svatantoj. La sorĉado daŭras ĝis la mateniĝo.

El diversaj signoj oni divenas la veteron de la venonta jaro. Ekzemple, se dum Kristnaska antaŭvespero la arboj estas prujne kovritaj, tiam la venonta jaro estos pluvabunda. Se neĝas, tiam venontjare estos bona rikolto. Se ne estas neĝo, tiam la printempo venos malfrue. Se blovas norda vento – estos malvarma somero; se la vento estas forta, la somero estos humida. Oni frapas la abelujojn, vekas la abelojn, ke ili somere estu laboremaj kaj ne forflugu. Aŭgurado de la estonteco estas populara en tiuj familioj, kie estas multe da junaj homoj. Kiam ekkrias la kokoj anoncante la mateniĝon, tiam ĉiuj iras dormi.

Recepto de la ĉefa litova manĝo dum Kristnaska antaŭvespero.

Prèskuĉiai (*presku'ĉej*) – farunbuletoj estas bakitaj el saligita pasto de tritika faruno, iom pli malmola ol pasto por kuko. En la paston oni enmiksas papavajn grenojn kaj sukeron, giston. Por ke la buletoj estu pli fragilaj, oni enverŝas iom da oleo. El la pufiĝinta pasto oni formas maldikajn bastonetojn kaj distranĉas ilin je pecetoj grandaj kiel avelo, t.e. po 1,5 – 2 centimetroj. Oni bakas la buletojn en forna bakujo kaj manĝas kun papava lakto.

Papava lakto. Lavitajn papavgrenojn oni brogas per akvo, filtras kaj en speciala ujo pistas per hakila tenilo. Poste oni surverŝas varman boligitan akvon. Post unu-du horoj oni denove filtras ilin tra densa lina ŝtofo, aldonas sukeron aŭ mielon. Fariĝas fluaĵo simila al lakto. En tiun lakton oni mergas *prèskuĉiai* kaj manĝas la tuton simile kiel supon.

La ringo – novelo de Julian Modest

En varmeta aŭgusta vespero Bogdan aŭte revenis de sia vilao. Li stiris sur vasta aŭtovojo. Sennombraj brilaj steloj ornamis la ĉielon. Mola vento karesis lian frunton. Bogdan sentis sin iom laca; purigis, falĉis, fosis. Nun liajn pulmojn plenigis freŝa montara aero kaj lia tuta korpo pezis kiel mielĉelaro. Preter lia aŭto rapidis aŭto post aŭto.

„Kien vi rapidas,“ murmuris Bogdan, „stiru pli lante. Kia mirinda vespero estas. Ĉu vi vidis iam tiom da steloj, similaj al bakitaj maizgrendoj, kaj la lunon kiel tranĉitan melonon kun dolĉa glua suko?“

La reflektoroj forte lumigis la rektan aŭtovojon. Je kilometro antaŭe Bogdan rimarkis haltintan aŭton, kies ŝoforo senespere svingis mane, sed neniu haltis. Ĉiuj fulme preterpasis, kvazaŭ ne rimarkis lin. Io kompatinda estis en tiu soleca homo sur la vojo, kiu peteme svingis la manon.

Bogdan malrapidigis la aŭton, haltis, eliris kaj demandis la viron, kio okazis. La nekonata ŝoforo estis turko. Li ne scipovis la bulgaran kaj pene, germanlingve klarigis, ke li veturas el Germanio kaj ĝuste ĉi tie elĉerpis la oleaĵon. Ja, ĉi tie ne eblas aĉeti ĝin, nek daŭrigi, sed li rapidas kaj ne povas tranokti sur la aŭtovojo.

Bogdan tuj donis oleaĵon kaj bondeziris al li „bonan vojaĝon“. Kiam li ekiris al sia aŭto, la turko postsekvis lin kaj provis ŝovi kelkajn bankbiletojn en lian poŝon. Bogdan elprenis kaj redonis ilin, sed la turko denove ŝovis la monon en la poŝon.

„Mi ne haltis pro mono,“ provis klarigi Bogdan. „Ĉu ne eblas helpi al iu, kiam li bezonas tion?“

Tamen la turko ne komprenis. Verŝajne li opiniis, ke la mono ne sufiĉis, kaj elprenis ankoraŭ bankbiletojn. Finfine Bogdan koleriĝis kaj ekiris, sed la turko denove haltigis lin. Bogdan turnis sin senpova. Nun la turko tenis mane ne monon, sed ringon. Li donis ĝin al Bogdan kaj diris: „Amiko, prenu ĝin por memoro, pro la bono, kiun vi faris...“

Bogdan komprenis, ke se li ne akceptus la ringon, la fremdulo ofendiĝus. La turko atente lin rigardis. Ne pli aĝa ol Bogdan, ĉirkaŭ kvardek-kvin-jara, la fremdulo havis grandajn okulojn kaj nigran krispan hararon. El la rigardo radiis sincera amika dankemo. La turko deziris emfazi sian dignon kaj nepre esprimi estimon. Bogdan manprenis lian manon. La turko ripetis: „Pro bono, kiun vi faris.“

Ili disiĝis. La fremdulo, kontenta, eniris en sian aŭton kaj forveturis. Bogdan ne tuj ekveturis. Li scivole pririgardis la ringon. Ĝi estis arĝenta, masiva, precize ellaborita. Similis al eta kubo, sur kiu videblis iuj hieroglifoj. Io

estis skribita, sed Bogdan ne povis ĝin deĉifri. Li provis meti la ringon ĉirkaŭ sian ringfingron kaj je lia miro ĝi tiel konvenis, kvazaŭ ĝi por li estus farita.

Kiam Bogdan revenis hejmen, liaj edzino kaj filoj jam dormis. Li vespermaĝis en la kuirejo kaj senbrue, fingropinte li eniris la dormoĉambron.

Matene, kiam li vekigis, Roza, lia edzino, jam kuiris la kafon kaj agrabla kafoaromo plenigis la manĝejon. Bogdan sidiĝis ĉe la tablo, plezure komencis trinki la varman kafon kaj nevole alrigardis la ringon, kiun donacis al li la turko.

„Verŝajne li jam senprobleme trapasis la limon“, meditis Bogdan.

Roza, rimarkinte la ringon, ŝerce demandis: „Kiu amatino donacis ĝin al vi?“

En ŝia voĉo sentebliis kaj humuro, kaj scivolo. Bogdan detale rakontis al ŝi sian hazardan renkontiĝon kun la nekonata turko kaj menciis la obstinon de la turko donaci ion al Bogdan. Roza aŭskultis, sed Bogdan ne komprenis ĉu ŝi kredas aŭ ne. Roza iom ĵaluzis kaj eĉ nun, kiam Bogdan estis kvardek-kvin-jara, ŝi eble kaŝe timis, ke Bogdan povus kokri ŝin. Verŝajne tial Roza tiom scivolemigis kaj tio kolerigis lin. Roza deziris pli bone trarigardi la ringon kaj Bogdan donis ĝin al ŝi.

„Io estas skribita sur ĝi, ĉu turke aŭ arabe?“ miris Roza.

„Jes“, respondis Bogdan, „sed bedaŭrinde mi ne komprenas ĝin.“

„Nepre ni devas tralegi ĝin“, insistis Roza.

Verŝajne ŝi opiniis, ke la surskribo kaŝas iun sekreton, aŭ ŝi suspektis, ke Bogdan scias, kio estas skribita, sed ne deziras diri al ŝi.

„Bone“, respondis Bogdan. „Mi petos iun tralegi la surskribon.“

Post tiu ĉi konversacio ambaŭ eliris. Vespere kiam ili venis el la laborejo kaj komencis vespermanĝi, Roza ŝajne hazarde demandis: „Ĉu vi trovis iun por tralegi la surkribon?“

„Ne“, mensogis Bogdan.

La vero estis, ke li forgesis.

„Ja, en la uzino kie vi laboras, estas turkoj, ĉu ne?“ rimarkis Roza.

„Estas, sed ili ne scias legi kaj tute ne komprenas similajn hieroglifojn.“

Tamen Roza obstinis: „Ni nepre devas trovi iun por tralegi la surskribon. Imagu, se tio estus magivorto, kiu alportus malfeliĉon al ni.“

„Ne parolu stultaĵojn“, ridis Bogdan. „Ja, magivorto jam ne ekzistas.“

„Spite, laŭ onidiro oni ne devas surhavi fremdajn ornamaĵojn.“

„Kia ornamaĵo? Tiu ĉi ringo verŝajne havas nenian valoron. La fremdulo deziris danki kaj tial li donacis ĝin al mi. Ja, la ringo plaĉas al mi. Ĝi vere estas neordinara. Neniu havas similan ringon kaj certe ne malfeliĉon, sed feliĉon ĝi portos. Danke al ĝi mi eble havos sukceson kun virinoj“, ŝercis Bogdan, sed Roza tiel mave alrigardis lin, ke lia rideto tuj fandiĝis.

Foje Roza kaj Bogdan ion aĉetis en la centro de la urbo kaj kiam ili preterpasis la moskeon, Roza denove menciis la ringon kaj tute neatendite proponis: „Ni eniru la moskeon kaj petu la hoĝon tralegi la surskribon.“

Bogdan tedite alrigardis ŝin. Ĉi ringo jam komencis kaŭzi malagrablaĵojn al li. Eble Bogdan ne devus montri ĝin al Roza, nek rakonti al ŝi pri la nekonata turko. Roza tamen estis tre obstina. Ĉio, kion ŝi deziris, devis esti plenumita tuj.

Ili ekfrapetis je flanka pordeto de la moskeo kaj eniris ĝin. La hoĝo, olda, maldika viro, kun longa blanka barbo, kiam li vidis Rozan, petis ilin eliri, ĉar la mahometana religio ne permesas al virinoj eniri moskeon. Ili klarigis pri kio temas kaj la hoĝo eliris kune kun ili sur la straton. Bogdan donis la ringon. La hoĝo atente prenis ĝin kaj proksimigis ĝin al siaj okuloj, kiuj jam tiel perdis sian koloron, ke oni ne povis diveni ĉu ili estis blujaj aŭ verdaj. Longe la hoĝo strabis la ringon, poste mallaŭte li diris: „Estas majstra ellaboro. Bela ringo, sed mi ne povas legi la surskribon. Armenlingva ĝi estas.“

Bogdan kaj Roza dankis, pardonpetis kaj foriris, sed Roza ne cedis: „La armena preĝejo troviĝas proksime, ni iru tien, ĉu ne?“

Bogdan ne tre emis, sed kion fari? Roza forte deziris ekscii la surskribon kaj ne povis trankviliĝi. Ili eniris la armenan preĝejon, kie renkontis ilin pastro, ankaŭ maljuna kiel la hoĝo, sed pli energia kaj afabla. La armena pastro alrigardis la ringon kaj tuj diris: „Pro bono, per bono.“

„Ĉu tio?“ demandis suspekteme Roza.

„Jes,“ respondis la pastro. „La ringo estas tre malnova. Ne eblas diri, kiam oni ellaboris ĝin, tamen ĝi estas tre valora. Verŝajne oni transdonis la ringon de patro al filo. Gardu ĝin.“

Ili adiaŭis la armean pastron kaj foriris. Sur la strato Roza ripetis: „Pro bono, per bono. La turko certe estis tre dankema. Aŭ eble li ne estis turko.“

„Povas esti“, respondis Bogdan. „Mi tamen ĝojas, ke mi lin helpis.“

En la komenco de oktobro Bogdan oficvojaĝis al la urbo Varna. Ankoraŭ estis agrable varme, sed jam sentebliis la friska spiro de la aŭtuno kaj ĝiaj molaj paŝoj en silenta parko ĉe la maro. La arbofolioj flavis aŭ iomete ruĝis.

Bogdan finis sian oficokupon en la haveno kaj decidis iom promenadi en la urbo. Li ege ŝatis la aŭtunon, la tagojn, kiam sentebliis la dolĉa aromo de matura vinbero, kiam ĉio en la naturo dronis en silento kaj de ie febla vento alblovis amaran fumon de bruligitaj herboj kaj arbofolioj, kiam la birdoj rondflugis alte en la ĉielo kaj preparis sin por foriro.

Bogdan iom promenadis tra la urbo, poste iris en la ĉemaran parkon, sidiĝis sur benko en la silento, sub la buntkoloraj arboj, kaj longe kaj senmove restis tie.

Ĉirkaŭ la sesa horo posttagmeze Bogdan ekiris al la hotelo. Survoje li eniris restoracion por vespermanĝi. Kiam li revenis en la hotelon, li petis la oficistinon ĉe la akceptejo veki lin je la kvina matene, ĉar li deziris pli frue veturi.

Bogdan eniris la hotelĉambron, demetis la jakon kaj eksidis antaŭ la televidilo. Subite li eksentis akran, tranĉan doloron en la brusto. Lia brako rigidiĝis kaj kvazaŭ fulmo lumigis lian menson koratako. Bogdan konsterniĝis.

Ĉu li mortos ĉi tie, sola kaj neniu komprenos kiel li forpasis? Pene li levis la telefonaŭskultilon kaj flustre diris: „Mi petas doktoron, mia koro...”

„Sinjoro...“, aŭdiĝis la afabla voĉo de la ofiscistino de la akceptejo.

La telefonaŭskultilo brue falis el lia mano. La doloro en la koro ankoraŭfoje pikis lin. La voĉo de la ofiscistino daŭre aŭdiĝis en la falinta aŭskultilo: „Sinjoro, sinjoro...”

Ne pasis eĉ kvin minutoj, kiam en la ĉambron eniris juna virino.

Anhelante ŝi alpaŝis al Bogdan kaj tre atente demandis: „Kiel vi fartas? Ne timu. Mi estas kuracistino kaj helpos vin. KREDU je mi. Bonvolu preni ĉi pilolon. Mi tuj vokos „Urĝan helpon“.”

Urĝa helpo venis post dek kvin minutoj. Dum ili atendis ĝin, la kuracistino staris ĉe Bogdan, tenante lian manon. Esperplene li rigardis ŝin. Ŝia ĉeesto trankviligis lin kaj Bogdan kredis, ke nenio malbona okazos al li.

La juna nekonata kuracistino akompanis lin ĝis la malsanulejo kaj kiam ŝi vidis, ke Bogdan estas en sekura loko, ŝi foriris. Feliĉe ĉio bone solviĝis. Lia sanstato stabiliĝis kaj post tri tagoj Bogdan forlasis la malsanulejon. Li revenis en la hotelon kaj preparis sin por forveturi.

Antaŭe tamen li demandis ĉe la akceptejo, kiu estas la juna kuracistino, kiu la unua helpis lin. La ofiscistino afable respondis: „Doktorino DONOVA. Mia konatino. Tiam mi hazarde vidis ŝin eniri en la kafejon de la hotelo kaj mi petis ŝin helpi al vi.”

„Doktorino DONOVA“, ripetis Bogdan. „Kiel mi povus vidi ŝin? Mi deziras danki al ŝi.”

„Mi donu ŝian hejman telefonnumeron“, proponis la ofiscistino.

Bogdan tuj telefonis al la juna kuracistino. Ili priparolis renkontiĝon je la kvina horo posttagmeze en la kafejo de la hotelo. Doktorino DONOVA venis ĝustatempe. Jam de la enirejo ŝi rimarkis Bogdan kaj rapide ekpaŝis al la tablo, ĉe kiu li sidis.

„Bonan tagon!“ ŝi krietis. „Mi ĝojas vidi vin sana kaj vigla.”

„Danke al vi“, respondis Bogdan.

„Tio estas mia devo.”

Doktorino DONOVA vere estis juna kaj ĉarma kun helaj ne tre longaj haroj kaj bluaj okuloj, kiuj ĉiele brilis.

„Mi dezirus iel danki al vi“, diris Bogdan.

„Ja, vi jam dankis. Vi telefonis kaj invitis min ĉi tien.”

„Eble ni neniam plu renkontiĝos...”

„Por mi tre gravas, ke vi bone fartas kaj morgaŭ matene trankvile vi povos forveturi.”

Bogdan nevole rigardis sian ringon. Io briligis lian konscion. Li deprenis la ringon kaj donis ĝin al DONOVA.

„Bonvolu akcepti tiun ĉi ringon kiel esprimon de sincera danko. Vi savis mian vivon.”

„Ne. Mi ne povas. Ĝi certe estas via kara memoro.”

„Mi insistas. Vi devas akcepti ĝin. En ĉi momento ĝi estas destinata por vi.“

Bogdan preskaŭ perforte donis la ringon al ŝi. Doktorino Donova eble eksentis, ke se ŝi ne prenis la ringon, ŝi profunde ofendus lin. Ŝi etendis la manon kaj prenis la ringon. Atente ŝi pririgardis ĝin kaj scivoleme demandis: „Kio estas skribita sur ĝi?“

„Tion vi mem devas ekscii. Antaŭe ankaŭ mi ne sciis.“

Eble kvin jaroj pasis de tiu ĉi fora oktobra tago. Delonge Bogdan forgesis la telefonnumeron de doktorino Donova. Foje kiam kun la tuta familio li somerumis en Varna, li rememoris la malagrablan travivaĵon en la hotelo. Li tamen ne deziris ĝeni doktorinon Donova.

Iun posttagmezon, Bogdan kaj Roza eniris kafejon. Dum Bogdan staris vice por mendi kafon, li subite rimarkis, ke sur la maldekstra mano de la viro antaŭ li, estas la ringo, kiun li iam donacis al doktorino Donova. Sendube estis ĝi. Bogdan povis rekonigi ĝin inter mil similaj ringoj. Ja, tiom da tempo li posedis ĝin. Kaj Bogdan rememoris la surskribon: „Pro bono, per bono.“

Monato, marto 2002

23-a jarkolekto

Palisaro

Iam mi ricevis de Italujo retmesaĝon de tute nekonata sendinto. Ĝi estis sufiĉe longa kaj mi ne tuj legis ĝin. Nur kiam mi ordigis korespondaĵojn, mi legis ĝin kun intereso. Ĝi impresis min, sed ĝi magie denove perdiĝis kaj mi ne plu trovis ĝin. Tamen mi povas ĝin rakonti al vi parkere. Do, atentu...

En iu vilaĝo loĝis knabo de honestaj gepatroj, kiu havis kolereman, eĉ agreseman karakteron. Iun tagon vokis lin lia patro kaj donis al li grandan sakon da najloj kaj martelon. Poste ili iris al palisaro kaj la patro diris: „Vidu la kolonon. Ĝi estas ligna. Ĉiam, kiam vi ekkoleris, iru al ĝi kaj enigu en ĝin la najlon. Diru al mi, kiam la provizo da najloj finiĝos.“

La knabo estis obeema kaj respektis la patron. La unuan tagon li enbatis 7 najlojn kun granda emo. La tempo fluis kaj najloj malpli kaj malpli rapide perdiĝis de la sako, ĝis venis la tago, la sako estis malplena.

La knabo iris al la patro kaj diris: „Patro, ĉiuj najloj estas enbatitaj. Mi ne ŝatas plu enbati ilin, pli facile estas por mi ne koleri.“

La patro diris al la knabo: „Iru kun mi al la kolono, mi estas feliĉa, ke vi opinias kolere mon superflua. Tamen, ĉiu malbona ago bezonas bonan agon, ke estu ekvilibro. Se vi faros bonagon, rekompencu vin kaj eligu unu najlon el la kolono.“

La knabo penseme rigardis la patron kun miro. Nur post tago li iris eligi unuan najlon de la palisaro. Longan tempon, pli longan tempon daŭris la eligado de la najloj, ol la enbatado. Sed venis tago, kiam ĉiuj najloj estis for de la kolono

kaj la knabo denove iris al la patro kaj diris: „Patro, la najloj ne estas plu en la palisaro.“

La patro serioze ekrigardis la filon kaj invitis lin iri denove al la kolono. Ĉi tie la patro montris al la kolono kaj diris: „Mia filo, mi vidas, ke vi plenumis mian peton kaj ĉiun koleragon vi kompencis per bonago, sed vidu, la cikatroj restis kaj plu restos en la kolono. Tio same okazas en homa animo – se homo malbonon kompencas per bono, cikatroj neniel malaperos.“

La knabo klinis la kapon kaj la patro prenis lian kapon en siajn manojn kaj rigardis en liajn okulojn.

Raporto pri Internacia Seminario en Naumburg

Verda Saksofono, 2/2004, Erik Sinde (Dresden)

De la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro okazis kiel ĉiujare ankaŭ ĉi-vintre la Internacia Seminario (aŭ Semajno, laŭplaĉe) (IS), kiu estas samtempe kiel seminario (ĉi-jare: „Naturmedio – strukturo, ekspluato, protekto“) la plej bona silvestra festo por multaj gejunuloj el multaj landoj. Partoprenis 250 homoj el 26 landoj, kaj la bebo (Fenna el Nederlando ĉeestis jam la lastan jaron, tiam ankoraŭ ene de sia patrino) ĝis pensiulo inter IS-anoj (la fama sinjoro Stroinski el Leipzig), ĉeestis ankaŭ ontaj kaj eksaj (aŭ eternaj) gejunuloj. Kion mi skribas? Mi mem jam alproksimiĝas al 40! El Saksio ni estis 12, kaj la belaj knabinoj el Saksio ne nur kreskas sur la arboj, sed ankaŭ bone dancas, kaj du el ili (kun siaj partneroj) gajnis la unuan kaj trian premiojn en la danckonkurso okaze de la silvestra balo. Cetere, el Saksio estis ankaŭ la nuna prezidanto de GEJ (Germana Esperanto-Junularo): Felix Zesch.

La oficiala vesperprogramo enhavis interalie teatran vesperon („Stilaj Ekzercoj“ de Raymond Queneau), jam tradicie „La Kuracistojn“ (la muziko de „Die Ärzte“ esperantigita). La diskoteko kaj la trankvila teejo „Gufujo“ funkciis ĝis malfrunokte, kaj ankaŭ filmoj kun Esperanto-subtitoloj (inter ili „Good-bye Lenin!“) estis dumnokte montrataj, tiel ke la plej trankvilaj horoj en la junulargastejo kaj en la amasloĝejo estis la matenaj horoj – ankaŭ tio jam estas tradicio. La amasloĝejo ĉi-jare plene meritis sian nomon. Proksimume la duono de la partoprenantaro „loĝis“ sur kunportitaj matracoj, unu tuj apud la alia, en sufiĉe malgranda konstruaĵo sur la tereno de la junulargastejo.

Ekster la oficiala programo ni ludis (normalan kaj ĉinan sakon, kartludojn k.a.) kaj ankaŭ pritraktis sensencajn filozofaĵojn. Ĉu vi volas ekzemplon? Bone. Difino de „nacia nivelo“: Se vi iam ajn manprenis kun la prezidento de via lando, vi havas la nacian nivelon unu. Se vi manprenis kun iu, kiu havas la nacian nivelon unu, vi havas nacian nivelon du. Kaj tiel plu ĝis infinito. Preskaŭ ĉiuj el ni havis la nivelon tri, ĉar la onklino de ĉeestantino havas Johannes Rau en sia amikaro.

Kion pri Naumburg memoros post kelkaj jaroj la esperantistoj el la mondo? Ĉu la katedralon? Eble ne, ĝi estis fermita. Ĉu la tuttagan ekskurson?

Eble. Ni estis en Feropolis (koncertejo en eksa karbejo) kaj en vinkelo ie proksime de Freyburg/Unstrut. Eble ili memoros, ke la estraro de la junulargastejo estis tre agrablaj gastigantoj. Sed certe ili plej memoros, kiujn novajn amikojn ili ekkonis. Tiel estas ĉiam en IS.

Por 2004/05 jam klaras, ke IS okazos de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro en Wetzlar. Aktualaj informoj estos en <http://www.esperanto.de/is/>.
ĜIS!

TRI ARTIKOLOJ EL LITERATURA FOLIO „VESPERTO“

espBELA@axeloro.hu

Kie estas Esperantujo?

Antaŭ nelonge mi kaŝaŭskultis babiladon de du viroj. Ili diskutis ĉu Esperantujo ekzistas. Ĉu ĝi estas reala lando aŭ ĝi ekzistas nur en fantazio.

„Esperantujo ne ekzistas.“

„Kial vi pensas?“

„Ĝi estas nur elpensita kaj ĝi ne estas sur la mapo. Tion mi certe scias.“

„Ĉu vi serĉis ĝin?“

„Jes, kompreneble. Horojn mi pasigis super la mapo, eĉ alitage mi telefonis al mia olda geografia profesoro esperante, ke li scipovas helpi en tiu ĉi grava demando.“

„Kion li diris?“

„Li nur ridis kaj moke diris: Ej, filo mia, vi estas granda azeno! Jam iam en gimnazio vi serĉis Turkion sub la tablo. Al vi decus scii, ke Esperanto estas internacia lingvo parolata en la vasta mondo. Esperantujo estas la tuta terglobo.“

„Ja, tiam ni vivas en Esperantujo. Ĝis nun mi ne sciis tion. Interese. Sed kie estas ĝia landlimo? Ĉar lando sen landlimo ne povas ekzisti. Mi ne komprenas. Ĉu vi?“

???

-FERKE-

Malfacile decidebla puno

Al mi, kiel respondeca inspektisto en distrikta kleriga servo, venis informo, ke en renoma mezlernejo okazis ŝtelo fare de lernanto. Estis ŝtelita nova, moderna, multekosta jaketo, apartenanta al lernantino. La ŝtelinto – samklasa, bona lernantino, filino de malriĉa nobla familio.

Krom miaj oficaj devoj mi deziris ankaŭ ekkoni pli profunde tiun ĉi okazaĵon, ĉar similaj fenomenoj lastatempe estas ofte renkontataj en iuj lernejoj.

Mi invitis la lernantinon por interparoli kun ŝi. Mi proponis al ŝi seĝon, starigis diversflankajn demandojn por komenci trankvilan interparolon. Fine mi

demandis ŝin, ĉu estas vero pri la jaketo. Je mia ega surprizo ŝi respondis klarvoĉe, levante la kapon:

„Sinjoro inspektisto, mi ne ŝtelis la jaketon, mi nur deprenis ĝin! Ektedis al mi, al ĉiuj gelernantoj, samklasanoj, ŝiaj senfinaj laŭdadoj, ke neniu el ni povus posedi similajn vestojn, kaj ke ŝiaj tolaĵoj sube kaj supre estas nature silkaj, aĉetebraj nur por oro. Precipe tio ĉagrenas malriĉajn gelernantojn, kiuj ĉiutage vestas sin per aŭ malnovaj, aŭ flikitaj vestoj, aŭ tiuj de siaj pli aĝaj gefratoj. Ŝi diras ofendajn vortojn pri niaj modestaj vestaĵoj. Mi petegas vin kompatu mian koron kaj animon! Mi neniam vestus min per tiu jaketo, ĝi tute maltaŭgas por mi. Mi nur prenis ĝin kaj ĵetis ĝin en barelon por rubaĵoj. Mi faris tiun ĉi agon plenumante la deziron de ĉiuj samklasanoj. Mi meritas kaj atendas vian punon.“

Mi liberigis tiun ĉi junan sinceran, bonan lernantinon, dirante al ŝi, ke punon mi difinos poste kun ŝia klasgvidanto. Ĝis nun mi tamen ankoraŭ ne estas decidinta pri ŝi. Se vi estus sur mia loko, kiel vi agus? Ĉu tio estas ŝtelo? Mi atendas vian konsilon. Eble estu tio instruista, pedagogia eksperimento!

Ivan Minĉev, Bulgario.

Vojaĝo al la steloj

Antaŭ ol tri astronautoj povis surpaŝi la planedon mankis kelke da terhoroj. Ili jam delonge atendis tiun ĉi momenton. Dum la vojaĝo ili ofte revadis pri la alveno. Ili ne sciis kio atendas ilin sur la planedo. Ili ekscitite surmetis la skafandojn kaj atendis la ĝustan tempon por ekiri. La minutoj rampis ege malrapide, kiel heliko. Ili ĉiuj jam volonte promenintus sur la surfaco, ja pro tiu ĉi planedo ili traflugis tiun ĉi gigantan distancon.

Ili vojaĝis pli ol tri terajn jarojn ĝis la kosmoŝipo alvenis tien ĉi. La celo de ilia vojaĝo estis nekonata. Kiam malfermiĝos la pordo, tiam ili ekscios, kial ili devis vojaĝi al tiu ĉi malproksima planedo.

Subite el laŭtparolilo estis aŭdeble: „Post dudek sekundoj la pordo malfermiĝos... Preparaĝu!“ – La maŝinvorto komencis nombri la tempon reen – 20... 19... 18... 17... 16... La koro de la astronautoj komencis rapide pulsadi – 5... 4... 3... 2... 1... ek! – aŭdiĝis la ordono kaj malrapide suprenleviĝis la dika metalpordo. Antaŭ ili ekaperis la pejzaĝo de la planedo. La maŝinvorto daŭrigis: „Nun mi sciigas la vojaĝcelon de via ekspedicio. Bonvolu atenti, ĉar nur unufoje ĝi estos konigita. Sur tiu ĉi malproksima planedo vivas danĝeraj estuloj, kiuj minacas la vivon de la tera homo. Via tasko estas pereigi la ĉi-tiean civilizacion per viaj grandefikaj biologiaj kaj ĥemiaj armiloj. Ĉion faru tiel, kiel vi lernis en la surtera astronauta akademio. Neniun indulgu, ĉar nun en via mano estas la sorto de la homaro.“

La astronautoj interrigardis kaj diris nenion. Ili sentis ke la vojaĝcelo ne estos ĉiutaga, sed neniu kuraĝis suspekta, ke ili devos ekstermi la tutan loĝantaron de ĉi planedo.

En iliaj tornistroj estis ujoj, kies enhavoj disŝutitaj infektos la ĉi-tieajn estaĵojn kaj baldaŭ dum unu du tagoj ĉiu pereios.

La planedo estis eksterordinare belega. Kien ili alvenis, ĉio similis al tera pejzaĝo. La kosmoŝipo alteriĝis sur granda flora kampo. En la malproksimo vidiĝis altaj, bluaj montoj. Maldekstre de ili la astronautoj ekvidis loĝlokojn, kie homsimilaj estaĵoj laboris en ĝardeno. El iu ĝardeno ekkuris malgranda blanka hundo al ili kaj laŭte bojis. Ĝi ne estis malamikema, ĉar ĝi gaje svingadis sian voston.

„Atentu!“ ekkriis Petro, la kapitano de la astronautoj. „Danĝera estaĵo proksimiĝas. La armiloj estu pretaj!“

„Ĉe la loĝlokoj mi vidas monstrojn, kiuj ĝuste nu intencas ataki nin,“ aldonis serioze la alia astronauto kaj eltiris sian laseroarmilon direktante ĝin al la proksimiĝanta hundo. Ekscitite li flustris al la tria astronauto, kiu iris malantaŭ li: „Vi devos likvidi la proksimiĝantan estaĵon. Ĉu vi komprenis?“

„Mi ne volas mortpafi mian ŝatatan hundeton Bodri*,“ ekkriis plorante la tria astronauto, kiu estis Joĉjo, la plej juna frato de Petro. „Ĝi ne estas danĝera estaĵo. Mi tre ŝatas ĝin.“

„Ĝi estas nur ludo,“ provis du knaboj trankviligi Joĉjon, „ni estas astronautoj kaj per nia kosmoŝipo ni alvenis tien ĉi por ekstermi ĉiujn estaĵojn. Ja, komence ankaŭ vi volis ludi tiel.“

„Nun jam mi ne volas, ĉar mi amegas mian hundeton. Ni ludu tiel, ke ni alvenis amikeme kaj portis donacon por Bodri.“

La knaboj interrigardis denove kaj diris: „Ankoraŭ vi estas tro malgranda por ludi serioze.“

Apáti Kovács Béla

*Bodri – ŝatata nomo de hundoj en Hungario

Vienaj legendoj

Kiu el la verda trupo ne konus Internacian Esperanto-Muzeon sub la granda kupolo de la Imperiestra Kastelo en la centro de Vieno? Tien pilgrimis – ŝi mem ŝerce uzis tiun vorton – Marisa, tridekdu-jara slovakino, por postspuri en flavaj paperoj kaj polvozaj volumoj la komencojn de la Esperanto-vivo en ŝia lando. Kiam ŝi alvenis tie la unuan fojon – post peniga grimado de 154 ŝtupoj finiĝantaj abrupte en ia subtegmeta, sinistra koridoro – ŝi preskaŭ ne havis kuraĝon sonorigi ĉe tiu malhela pordo, kiu, malgraŭ la tria etaĝo – ŝajnis konduki en ian malnovmodan inferon de Kafkaeskaj koŝmaroj. Akceptis ŝin moroza mezaĝulo, kiu evidentiĝis tamen pli kunlaborema kaj helpema ol lasis malbonaŭguri la unua impreson. La rezulto de ŝia dokumentada laboro estis

almenaŭ duone kontentiga: Ŝi trovis kelkajn interesajn indikojn pri la pionira periodo de Esperanto en Slovakio.

Tranoktante ĉe amiko, kiun ŝi renkontis dum la lasta UK, ŝi promenis post farita laboro tra la stratoj de la malnova Vieno, kie svarmis bunta turistaro internacia. Pleje ŝin allogis la luksaj magazenaj fenestroj, kies elmetitajn komercaĵojn ŝi povis aĉeti nur perokule, ĉar la realan akiron eĉ de eta memoraĵo ne permesis la kruda maljusto de nepagipovo.

Sed eksidis en la kapo de Marisa kaprico: Unufoje manĝeti lukse! Ŝi memoris la rakonton de sia patrino pri la tramo, kiu jungis Bratislavon kaj Vienon en la tempoj de tiu onkleca, en ĉiuj rilatoj malfeliĉa kaj maltaŭga imperiestro Francisko Jozefo. Eĉ poste, ĝis la jaro 1939, Bratislavanoj povis veturi al Vieno kun la nura celo trinki Vienan kafon sur Graben, observante la ŝikajn ulojn kaj ulinojn tie paradantajn. Tiaj tempoj revenu! Ŝi sopire pensis, dum ŝia stomako komencis kraki pro troa malpleno. Supeton kaj poste kafon! Nerevokeble prezentigxis firma decido, kiu sonis pli forte ol la veoj de ŝia magra monujo. En la centro de Vieno mem! Kiel en la tempoj de avinjo kaj panjo.

Ŝi alvenis al la luksa delikataĵejo „Meinl al Graben“, kiu en pompe ekipita salono ofertas ĉiutage tri ne tro kostajn, sed tamen delicajn menuojn. Marisa hezite eniris, kun miro ŝi vidis la ĉe marmoraj tabloj starantajn homojn, kiuj aspektis mondumaj en ŝiaj okuloj, sed verdire estis nenio alia ol iom snobe tagmanĝanta oficistaro kaj turistaro. Manĝi starante ĉe tablo, nu bone! Almenaŭ ĉe marmoraj.

Heziteme ŝi legis la afiŝitan menu-liston, skribitan per gotikaj literoj, komencante per preza rubriko kaj haltis ĉe la cifero 24. Dudek kvar ŝilingoj, jen la plej malalta elspezo. Temis pri faba supo, kiun ŝi ĉiam volonte manĝas. Des pli bone! Tiel do estu! Ŝi iris al la memserva bufedo, mendis en preskaŭ senerare prononcata germana, ricevis blankan pelveton vaporantan, kiun ŝi portis al unu el la tabloj. Ŝi demetis sur la subtablan ŝtonan breton la kopiojn de la Muzeaj dokumentoj, volis ekmanĝi, sed subite rimarkis, ke ŝi forgesis kuleron.

Kiam ŝi revenis kun manĝilo enmane al la tablo, ŝi ne povis kredi siajn okulojn: Tie staris granda ulo negra, trankvile kulerumante ŝian supon! La diablo lin... trafumis ŝian carbon tabua sakro. Sed antaŭ ol orelfende kriĉi, venkis ŝia internacia, de esperantismo nutrita sento, kiu insinue diktis al ŝi: Toleru la umojn de afrikano, venanta el tute alia kulturo, kiu eble propagandas la komunan supujon. Ĉu ne same en ŝia patrio antaŭ unu generacio ĉirkaŭtablanaro kampara manĝis el unu telerego? Al kio do servas la interna ideo, se ĝi eĉ ne toleras forkontinentajn morojn? Ek! Vivu la verda stel'!

Ŝi alpaŝis la nigrulon, sinĝene kaj iom tordbuŝe grimacis rideton kaj plonĝis la kuleron en la varman brogaĵon. La ulo stulte gapis! Tamen ŝia nevole komika rideto trovis baldaŭ eĥon en la bele malhela vizaĝo, kiu fandiĝis en bonkora mieno.

Unue silente ili kulerumis, sed Marisa baldaŭ preferis konversacii: „Ist die Supe gut?“ La germana ne efikis. „La soupe est bonne?“ Same la franca! La

anglan ŝi ne scipovis. Lasta klopodo: „Gut?“ „Good!“ resonis la negro kun kamaradeca brilo en siaj okuloj. Jes, Esperante nia tagmanĝa interparolo pli prosperus! Ŝi amare pensis. Manke de vortoj ili daŭrigis la babiladon per pingpono de ridetoj, streĉe volitaj ŝiaflanke, kaj malferme bonulaj liaflanke.

Ĉiu supo iam venas al sia fino kaj pro tio ankaŭ la stranga eŭrop-afrika gemanĝado en „Meinl am Graben“. Per lasta rideto Marisa adiaŭis, ŝovis sian manon sub la tablon por preni la kopiojn – kaj palpis nur la breton. Kun ekscito ŝi perokule kontrolis la lokon, kie devus troviĝi la por ŝi tre gravaj dokumentoj: Sed estis nenio. Ŝtelis, ŝi interne muĝis. Ŝtelis kaj manĝis mian supon! Tiu negra kanajlo! Mi kaj miaj stultaj internaciaj sentoj! Sed fakte kial li ŝtelu esperantaĵojn? Ŝi trankviligis siajn emociojn kaj helposerĉe rigardis ĉirkaŭen.

Sur la breto de la apuda tablo fine ŝi ekvidis kion ŝi ŝajne estis perdinta. Kaj sur tiu tablo staris ŝia ankoraŭ varmeta supo.

1992

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 Wien

Mia unua laborokupo

originala esperanta rakontado de amiko – SAT-ano kaj mondcivitano Adolfo Veselý.

Kiam mi foriris el Emmaüs-centro, mi serĉis laboron.

Dum mia vagado sur la stratoj de Boulogne-Billancourt mi haltis ĉe tiu fabriko kaj eniris. Iu civilvestita viro rimarkis min kaj rigardis min ekde la piedoj ĝis la kapo kaj poste demandis: „Kion vi serĉas, sinjoro?“

Mi estis surprizita, ke iu al mizeraspekta vagulo, kia mi tiam estis, diras al mi **sinjoro**. Mi turnis mian kapon malantaŭen, por scii, ĉu iu staras post mi. Vidante neniun, mi hezite respondis: „Mi serĉas laboron.“

Li invitis min en sian oficejon kaj trarigardis miajn paperaĉajn dokumentojn, demandante kie mi logxas.

„En metroo-vagonaroj, sinjoro,“ mi diris embarasite. Li momente silentis kaj poste diris, ke mi rakontu pri ĉi tio. Do, mi al li eksplikis, kial mi estas devigata vivi en tiuj subteraj vagonoj kaŭze de bruligitaj piedoj, kiuj ankoraŭ nun bezonas varmon, kaj ankaŭ tie akiras monon, sed ne per almozpetado.

„Ĉu vi povas al mi diri, kiel tio eblas?“ li diris mirigite.

Kaj mi, sentante, ke li interesiĝas pri mia sorto, mi kontinuas pluparoli.

„Mi sidas sur benkoj de metroo-stacio apud distribuaj aŭtomatoj, en kiuj estas frandaĵoj. Iuj vojaĝantoj enmetas en ilin la monerojn. Kiam alveturas ilia trajno, certaj homoj – verŝajne ne parizanoj, ĉar nesciantaj, ke baldaŭ alveturos alia – tro rapide tiras la aŭtomatan tirkeston kaj ĝi restas blokita. Ili simple ensaltas vagonaron kaj mia mano prenas el la aŭtomatflanka kanaleteto 1 forgesitan frankon. Vespere ĉe Savarneo estas kun 5 frankoj sufiĉe abunda manĝo kaj mi ankaŭ aĉetas vojaĝbileton por uzi pli poste la lastan vagonaron,

kiu restas nokte en iu el la stacioj kaj en kiu mi povas surplanke dormi ĝis mateno, post kiam ĉiuj personoj eliros kaj enirejoj estos fermitaj.“

Kiam mi finis mian rakontadon, mi konstatis, ke li estas direktoro kaj mi atendis lian reagon. Post la fortrinko de proponita kafo li diris: „Sinjoro Vesely, mi komprenas vian situacion kaj ekde nun sentu vin ĉe ni kiel hejme. Provizore vi povas tranoktadi en la vestejo, sed mi petas, ke vi atentu, se vi fumus, ke tio ne kaŭzu incendion. Ni premis la manojn kaj la amika dungigo estis finita. Poste li prezentis min al la laborkunularo kaj mi ĉiam post la fino de la labortago uzis la duŝon kaj en la vestejo sur malplenaj sakoj, sur kiuj estis surskribo *Eburio*, mi kontente endormiĝis. Nian direktoron mi vidadis malofte. Kaj eĉ liajn bonintencajn proponojn mi ne ĉiam akceptis. Iam li venis kaj diris al mi: „Venu kun mi al la kakao-muelilo, tie laboras unu alĝeriano kaj mi preferus, ke vi tie laboru per tiu maŝino, vi havos duoble plialtigitan salajron!“

Sed mi tuj rifuzis, dirante al li, ke tiu laboristo laboras diligente kaj zorgas pri siaj infanoj. Tial li bezonas gajni multe pli ol mi, fraŭlo.

En nia kantino estis viraĉo, kiu ĉiumatene preparadis por ni manĝon kaj kakaon, kiun ni ricevadis senpage. Okupiĝante kelkfoje pri ŝarĝado de kamiono, miaj kunuloj demandis min, ĉu iri matenmanĝi, aŭ prefere finŝarĝi la varojn. Mi diris, ke ni unue ĝisfinigu la laboron kaj poste matenmanĝos. Sed tiu kantinisto ŝlōsis la pordon kaj ne volis nin servi. Neniu el ni iris tion diri al nia direktoro. Mia sola protesto estis simpla: mi demetis mian laborveston kaj duŝis min kaj en pura vestaĵo trairadis nian laborejon. Kiam vidis min miaj laborkunuloj, ili diris al nia grizhara bonkora ĉefo: „Vesely prave foriras kaj vi nenion diras?“

Kaj li respondis: „Kion mi diru al mondĉivitano?“ (Ili ĉiuj konsideris min tia.) Miaj paŝoj kondukis min en kafejon, kie mi ion manĝis kun la kafo kaj fumante unu aŭ du cigaredojn mi aŭskultis per muzik-aŭtomato rokenrolan, aŭ jazan muzikon. Kutime de Sidney Bechet aŭ de Louis Armstrong. Ĉefe al mi tre plaĉis aŭskulti la „Rock Around The Clock“ de Bill Haley. Post ĉi tiuj agrablaj ripozoj mi trankvile revenis en laborejon. Pro la stulteco de nia kantinisto nia direktoro iel eksciis pri ĉi tio, kaj faris en nia kantino kontrolon. Li trovis, ke tiu fiulo estas ŝtelisto de kuireja oleo kaj de aliaj varoj kaj maldungis lin.

Iun vesperon mi decidis veturi al Parizo por poste tie dormi en hotellito. Ĝojante mi vagadis en la stratoj kaj la vetero estis milda. Iom laciĝinta mi eksidis sur ŝtupon ĉe enirejo de la metroo Châtelet. Kiam oni fermis ĝin, mi ne plu planis trovi ian hotelon kaj kuŝiĝis kiel antaŭ kelkaj monatoj sur ŝtuparon kaj pensante, ke tio ne gravas, almenaŭ mi ne forelspezos la monon. Post ioma duondormo mi eksentis ke iu kuŝiĝas apud mi, tial mi laux kloŝarda* kutimo turnis al tiu venulo mian dorson. (Ĉar ĉefe la dorsojn estas necese ŝirmi por ne malvarmumi). Iom post iom ĝi enmetis sian manon sub mian mantelon kaj tuŝis mian bruston kaj denove ion serĉis, cetere tie mi monon ne havis kaj post mallonga momento sur mia vango mi sentis kison. Mi tuj pensis, ke tio estas ia ĉarma virino. Sed tiuj fingroj premis mian gorgon, tamen mi ne lasos strangoli

min, mi fulmrapide stariĝis kaj ekdiris: „Ho, kia diablo!“ Mi ne plu memoras, ĉu esperante, ĉu france, aŭ ĉeĥe.

Antaŭ mi staris malbelaĉa viro kun elruligintaj okuloj kaj malfermita buŝo kun fiaj dentoj. Mi tuj preskaŭ pro ĉi tio vomis. Kaj anstataŭ miaj planoj por dormi en ia hotellito, mi pro la sentita naŭzo en mia stomako fordrinkis mian monon en dumnokte malfermitaj kafejoj. Kiam mi pri ĉi tio rakontis al triopo el miaj laborkunuloj, unu el ili pli poste vidante min prepariĝi al foriro urben, diris al aliaj: „Vidu, tiu Vesely preparis sin por iri rendevui kun la „Demoiselle du Châtelet“. (Fraŭlino Ŝatle). Tiam ni ĉiuj elkore ridis.

En nia plurnacia kolektivo laboris kvaropo da muzulmanoj kaj dum ilia ramadano ili estis tre lacaj, ĉiufoje kiam mi povis, mi helpadis al ili dum laborego. Mi estis plene konvinkita, ke ĉiuj krom tiu ŝtelisto, konsideris min, kiel bonan amikon, eĉ la magazinestro diris, ke mi kondukas kiel Jesuo. Li ankoraŭ eble ne sciis, ke ekzistas iu, kiu nomiĝas H. A. Grouès (abato Pierre). Ĝuste ĉi tiu homo apartenas al tiuj, kiuj malfermis miajn okulojn.

Kiam ni fariĝis malkontentaj kaŭze de niaj salajroj, ni ekkomencis striki, eĉ se la duono el la tuta kolektivo ne sekvis nin.

Mi kuraĝigadis strikantojn dum la tuta semajno kaj post ĝi alvenis decido el la nederlanda centro, ke niaj salajroj estos plialtigataj. Mi ne scias, kion pri mi pensis nia direktoro, vidante min inter la strikantoj. Tamen li vidis pli ĝojplenan kaj pli laboreman kolektivon, ol tio estis antaŭe.

Iun tagon pensiuligxis nia maljuna ĉefo. Anstataŭis lin pli juna, tute nekompetenta, tial mi forlasis ĉi tiun fabrikhejmon, en kiu mi pasis 11 monatojn.

*kloŝardo estas persono, kiu propravole forlasas normalan civilizon, vivas en metrooj kaj sub pontoj, celante absolutan liberecon, diference de vagabondoj kaj senhejmuloj, kiujn elpelis mizero.

Bileto al la ĉielo

Zdenek Myslivec, Bozkov, Ĉeĥio

Dum mi rigardas televidajn elsendojn, aŭ en gazetoj konkursajn enketojn, kie oni divenas la funkciadon de diversaj objektoj – kutime antikvaj, mi ne povas rememori objekteton, kiun mi iam trovis kaj kies uzcelon mi longe serĉis kaj kies sekreto mi solvis nur poste.

Iam, en la jaro 1950, mi estis metia lernanto kaj mi loĝis en la komuna domo por metilernantoj rande de la urbo Jablonec nad Nisou. Kun samlernejanoj mi vagadis tra proksima ĉirkaŭaĵo. Ne malproksime de Rýnovice estis la loko de eksa koncentrejo. La konstruaĵoj estis plejparte detruitaj. Inter ili ni trovis iun domon, ne tro grandan, de kiu restis nur subtera ejo. Ĉio alia – plafono, muroj –

estis, eble per eksplodo, disĵetitaj malproksime teren. Sur la betona planko kuŝis nur restaĵoj de brikoj. En angulo mi vidis objekton, interesan pro sia formo kaj ĉefe flave ruĝa koloro de bela ceramiko. La aĵo estis malgranda disko, kiun mi povis facile teni en la manplato. En la mezo de la disko estis ronda loketo, proksimume granda kiel duono da disko, iomete kavigita, do la disko estis pli maldika en la mezo. Tie estis sur unu flanko de la disketo farita sencifera numero, antaŭ la numero estis litero. En la kavigita loketo en unu sulko restis iom da mola pasto, en delikate blua koloro.

La objekteto tre plaĉis al mi, ĝi estis perfekta. Mi alportis ĝin en la loĝejon kaj ĝi longe kuŝis inter miaj aĵoj, sed pli poste, dum translokiĝo al alia ĉambro en alian domon, mi perdis ĝin.

Mi ĉiam volas solvi strangaĵojn kaj malgraŭe mi preskaŭ malmemoris la aĵeton, post ia tempo mi tuj rememoris ĝin. Tio okazis kiam mi eksciis kiel nazioj genie solvis problemon: trankvile gvidi homojn en gasekzekutejon. Ili disdonis „sapetojn“, ke homoj povu en duŝejoj lavi sin. Delikata surfaco sur ceramika disketo perfekte ŝajnis sapon. La litero kaj numeroj restis sub la sapo bone legeblaj kaj servis kiel kalkulilo, per kiu oni povis plenigi dokumentojn pri nombro de la kadavroj.

La koncentrejo en Rýnovice, simile kiel en Rychnov, apartenis al la malgrandaj fabrikoj kun militaj produktoj, tamen ili posedis „lukson“ de gasa ĉambro. Tiu subtera ĉambro origine certe servis...

Mi ne povas alie, ol priskribi tion, ĉar mi opinias, ke eble neniu scias pri la terura ĉambro, kiun per la eksplodo oni volis kaŝi ĝin por ĉiam. Sed tie mortadis homoj kaj ni ne rajtas forgesi tion, ĉefe nun, kiam oni debatas pri „la dekretoj de Beneš“. Mi renkontas kun junularo kaj junaj homoj kaj ili ne komprenas... Mi aŭdas riproĉojn de homoj, kiuj devis post milito foriri de Sudety kaj el Ĉeĥio kaj tute ne volas aŭskulti pri ia kunkulpo de la tragedio kaj falo de nia respubliko. Vere, la moviĝantan monstron neniu povis haltigi, pri tio ni spertis dum nia travivita totalisma reĝimo, sed sufoki malbonon en ĝia komenco estis eble.

Aprilo 2004.

Stranga hazardo

Zdenek Myslivec, Bozkov, Ĉeĥio

Tio okazis baldaŭ post la malfermo de la fera kurteno. En tiu tempo ni ĉiuj strebis tuj viziti la landojn, pri kiuj ni povis nur sonĝi. Kadre de niaj modestaj financaj ebloj ni ekvojaĝis per fabrika aŭtobuso al Parizo. Post tri tagoj ni revenis hejmen plenaj de impresoj, kiuj al ni sufiĉus por rakonti ĝis la fino de la vivo. Al iuj mankis monuoj, kiuj restis ĉe poŝtelistoj ie proksime de Moulin

Rouge. La ŝtelistoj laboris teame, senerare. Iliaj metodoj meritis apartan, edukon artikolon.

Ni revenis per alia vojo. Tamen ni jam ne tiom gavis la pejzaĝon, urbojn, vilaĝojn kiel ni komence faris. Regis etoso simila al ordinara ekskurso. Oni rigardis la aĉetitajn donacetojn, parolis pri impresoj kaj multaj vojaĝantoj dormetis, ĝis la momento, kiam iu ekvidis ŝildon kun la sciigo, ke ni proksimiĝas al Verdun. La vorto Verdun estis nekonata al proksimume unu triono de ekskursantoj – al la junularo. Sed al ni, pli frue naskitaj, Verdun estis intime konata el la rakontado de niaj onkloj kaj avoj, rakontado pri la kruela batalkampoj de la unua monda milito. Ni sentis, ke ni ne povas preterveturi, ni devas almenaŭ por momento halti. Pro tio ni petis la ŝoforon. La ŝoforo rifuzis, tute ne emis. Li estis nia bona kamarado, malgraŭe tion li ne volis.

La ŝildoj ĉe la ŝoseo montris kilometrojn al Verdun. Ni estis obstinaj kaj petis denove kaj denove por halto. Ni bedaŭris perdi la eblon vidi la batalkampojn. Tamen ŝoforo estis same obstina kaj dum lastaj kilometroj disvastiĝis malkontenta silento en la buso. Ni ĉiuj pensis same: „Neeble, io devas okazi!“ Ŝajnis, ke kvazaŭ temas pri preĝo: komuna deziro de homa grupo pri la sama celo. Eble ne pasis minuto, la aŭtobuso sen klara kialo subite malrapidiĝis kaj tondris bruoj. La vojaĝantoj sur la malantaŭaj sidiloj time eksaltis. Unu pneŭmatiko de aŭtobuso disrompiĝis. La buso malrapide moviĝis proksimume 50 metrojn al la apudo de la ŝoseo, kie estis la lasta eblo viziti batalkampojn. Subite ni havis horeton por rigardo.

Ni vizitis nek tombejon, nek monumenton. Tio da tempo ni ne havis. Ni venis nur proksime. Sed ni vidis kelkajn fortikaĵojn kaj grundon disbatitan de obusaj eksplodoj, restaĵojn de kanonoj tiel, kiel oni dispecigis ilin kune kun la korpoj de la soldatoj, kiuj estis per la sekvaj eksplodoj tuj entombigitaj. Nun tiun teruran lokon kovras densa arbustaro.

Reen ni iris tra novkonstruita vojo, kiu najbaras la batalkampojn kaj tie mi rimarkis objekton, kiun verŝajne elfosis el la tero maŝino dum la konstruo de la vojo. Oni povis vidi, ke temas pri leda soldata boto kun fera hufeto sur la kalkanumo, preskaŭ disfala. El boto montriĝis frakasita tibia ostoj. Tiu kruro estis pli frapa rememoraĵo ol monumento de amasaj murdoj. Mia patro, kiam li foriris al la aŭstria armeo estis dek-ses-jara. La patro estis dufoje vundita kaj en la korpo li havis pecojn de obuso. Kuracistoj konstatis operacion por eligi la fragmentojn danĝera. Tiuj ĉi fragmentoj pli poste kaŭzis evidente lian morton en lia trideksepajaro. Li mortis pli frue, ol ke mi povus konatiĝi kun li. Nur nun, dum mia maljuneco mi povas taksu, kiom multe mi perdis. Per mia tuta animo mi malamas kaj malbenas la respondeculojn de homaj buĉejoj.

Ĉu animoj de la murditaj malfeliĉuloj kaŭzis, ke nia deziro efektiviĝis per tiu stranga maniero?

El ina vidpunkto gaje

Edzino riparas la fumŝakton sur tegmento kaj la edzo spektas en la ĉambro sportan televidan elsendon. La edzino vokas al li: „Se mi falus, dum matĉa paŭzo voku la savtaĉmenton.“

„Karulo, riparu la akvan kranon en la kuirejo. La ŝraŭbturnilo kaj plua ilaro estas en la dua tirkesto, en la unua estas plastro kaj tondilo. La tirkestoj estas en la granda ŝranko dekstre de la pordo.“

Radiokontaktoj sur la ŝipego Titanik

František Frybert, radioamatoro, Brno, Ĉeĥio.

Antaŭ naŭdek du jaroj, la dekkvaran de aprilo, dum sia unua veturo la ŝipego Titanik subakviĝis. Ĝi direktiĝis el Anglujo al Usono. Sur la ŝipego estis 2200 pasaĝeroj.

Kvankam la kapitano ricevis pere de radiostacio sciigon, ke sur la vojo troviĝas grandaj glacimontoj, li ne haltigis la ŝipon, sed daŭrigis la veturon eĉ nokte, spite, ke nokte ĉiuj ŝipoj devas la veturon ĉesi.

Titanik daŭrigis sian veturon kaj ĉirkaŭ la noktomezo koliziis kun granda glacimonto. Post du horoj kaj kvardek minutoj Titanik subakviĝis. La tutan historion vi certe konas.

Kiel mi jam diris, la ŝipoj dum nokto devis stari kaj ne veturi. Kaj la radiistoj dum nokto povis dormi aŭ amuziĝi laŭ sia volo. Simile tiel estis dum tiu nokto.

Kiam okazis la kolizio, kompreneble la radiistoj de Titanik venis al la radioaparatoj, vokis kaj postulis helpon, sed neniu al ili respondis. La radiistoj sur proksimaj ŝipoj dormis. La kapitano de Titanik ordonis pafi signalajn raketojn, sed la vojaĝantoj sur la aliaj ŝipoj, kiuj rigardis la lumon, pensis, ke sur Titanik oni festas kaj do ili neglektis la signalojn.

La radiistoj sur Titanik elsendis la alarmsignalon S O S , ke la ŝipego koliziis kun granda glacimonto kaj ĝi estas grave difektita, sed eĉ post tiu malespera mesaĝo ne venis respondo.

La ŝipo Kalifornia, kiu estis plej proksime, nur 30 kilometrojn de Titanik ne reagis, ĉar la radiisto dormis. Se ili ne dormus kaj reagus, ili povis multe da pasaĝeroj savi! Bedaŭrinde! La sama situacio estis sur la ŝipoj Baltik, Olimpik, Birma, Frankfurt kaj aliaj, kiuj estis sufiĉe proksime, sed ne reagis.

Sur la ŝipo Karpatia la radiistoj povis dormi aŭ amuziĝi, sed hazarde ili ankoraŭ sidis ĉe la aparato kaj hazarde aŭskultis. Tuj ili respondis al la mesaĝo el Titanik, sed la distanco inter Titanik kaj Karpatia estis pli ol 100 kilometrojn kaj tio estis tro malproksime por sufiĉe frue proksimiĝi. Kiam la radiistoj de Karpatia ekaŭdis mesaĝon el Titanik, ili tuj respondis, ke la kapitano de Karpatia

decidas turni la ŝipon al Titanik kaj rapidi helpi. Karpatia estis la unua ŝipo, kiu venis al la loko de la katastrofo.

Karpatia proksimiĝis al Titanik post unu horo kaj duono, sed Titanik jam estis subakviĝinta. Tamen ĉirkaŭ 700 pasaĝerojn oni sukcesis savi. Nur tiujn, kiuj povis uzi la boatojn rezervitajn por helpi dum katastrofo de la ŝipo. Ve, Titanik ne havis boatojn por ĉiuj pasaĝeroj! Nur por unu triono de la personoj. Do, kiam venis Karpatia por helpi, Titanik jam estis tute sub la akvo. 1500 da pasaĝeroj dronis.

Je la sesa horo matene la kapitano de Karpatia sendis la mesaĝon: „Sur la loko ne estas eĉ unu postsigno de ŝipruino, nur grandaj glacimontoj kaj granda frosto.“

Je la oka horo la kapitano sendis la mesaĝon, ke ĉiuj pasaĝeroj, kiuj travivis la katastrofon estas sur la ferdeko de lia ŝipo kaj informis ĉiujn aliajn ŝipojn, ke ili revenu al siaj pozicioj. Poste li sendis mesaĝojn al Novjorka centro de informoj por ŝipoj.

La sekvoj de tiu ĉi katastrofo estis tiom grandaj pro tio, ĉar la kapitano de Titanik ne haltigis la veturon dum la nokto, kiel la reguloj ordonas, kaj ke la ŝipego havis malmulte da savboatoj kaj ke la radiistoj sur ĉiuj ŝipoj povis ĉesi aŭskulti dum la noktohalto de veturado.

Baldaŭ post tiu ĉi katastrofo okazis kompreneble granda aparta konferenco en Londono, kiu decidis pri novaj reguloj, inkluzive ke ŝipoj devas havi savboatojn por 100% pasaĝeroj, sur la ŝipo oni devas fari ekzercojn kiel savi sin dum katastrofo kaj sur ĉiu ŝipo devas esti tri radiistoj, kiuj sin interŝanĝas eĉ dum la nokto ĉe la aparato. Sur ĉiu ŝipo devas esti aparato, t.n. „gardilo“, kiu mem donas signalon, se okazas danĝero, precipe pri glacimontoj kaj por akcepto de mesaĝoj el aliaj ŝipoj dezirantaj helpon. Estis starigitaj ĉebordaj servoj, kiuj donas signalojn pri la moviĝo de glacimontoj.

Tiuj ĉi aranĝoj kaj instalitaj reguloj por sendanĝerigo de ŝipoj jam savis milojn da pasaĝeroj.

Kristnaska skriba meditado de Daĉjo

Jana Holcová Mělník

Delonge mi pensis kiel lernanto de la unua kaj dua klaso, ke la hejmo estas panjo, paĉjo kaj infano. Poste mi eksciis, ke al la hejmo povas aparteni ankoraŭ pluaj vivaj estaĵoj, kiuj bezonas la saman prizorgadon kaj amon kiel infanoj.

Tial en mian hejmon eniris ĝungarska hamstreto Martinek kaj antaŭ nunjaraj kristnaskaj festoj karpeto Peĉjo. Mi vidis ĝin en granda kuvego, kie ĝi malkviete naĝis inter aliaj nombraj karpetoj. Ĝi estis malgranda kaj tre vigla kaj

miaj okuloj renkontiĝis kun ĝiaj. Do, venu amiko, ĉe ni hejme plaĉos al vi certe. Kuvon vi havos nur por vi, mi ŝatos ne uzi duŝon por mi, mi lavos min nur en la lavujo.

Mi ekkonsciis, ke se ni estas hejme pli nombraj, mi havas malpli da tempo por pensi nur pri mi mem kaj en mia kapo svarmis aliaj ideoj. Ekzemple, ke nia hamstreto Martinek ŝatus vidi sub la kristnaska arbeto novan kaĝeton por pli bela vivo. Tian dometon kun multaj spacoj en kelkaj etaĝoj, kun glitvojetoj kaj kun multaj grimpejoj, kie ĝi povus vere petoli.

Al la zorgoj pri la hamstreto aldoniĝis zorgoj pri karpeto Peĉjo. Ĝi bezonis ofte freŝan akvon en la kuvon, eble ankaŭ ion por la dentoj – se karpetoj iajn dentojn havas, ĝis nun mi tion ne sufiĉe esploris.

La karpeto ĉiam allogis mian atenton tiom forte, ke ni ĉiuj – panjo, paĉjo kaj mi – staris en la banĉambro ĉe la kuvo kaj forgesadis kuiri, baki kaj ordigi loĝejon. Amiko karpeto alportis en la antaŭkristnaskajn tagojn grandan ĝojon kaj eksciton. Pro tio mi al ĝi promesis, ke ĝi ne finiĝos dume „malavara vespero“ sur teleroj. Ĝi certe ne povis longe en nia bankuvo vivi kaj ankaŭ ni ne povis ĉiam nur plaŭdi en la lavujo. Mi decidis doni al ĝi novan hejmon en estinta sablominejo Baraba, kiu estas nun plena da akvo por bani kaj naĝi. Tie ĝi trovos novajn karpetajn amikojn. Kaj kiam somere mi naĝos en Baraba, eble ĝi frotetos miajn kruojn kaj tiel mi ekscios, ke ĉio estas en ordo kaj ĝi ŝatas rememori sian restadon en mia hejmo.

Decembro 2003, Mělník, Ĉeĥio

Ĉeĥa gigantulo Jara da Cimerman

Karel Votoček Ĉeĥio

Enkonduko

La plej eminenta eltrovinto, verkisto, komponisto, pentristo kaj skiisto el la tuta mondo estis la forgesita ĉeĥa geniulo Jara Cimerman. Pri tiu fakto ni povas diskuti, ni povas disputi, ni povas eĉ malkonsenti, sed tio estas ĉio, kio estas tiukaze farebla.

Jara naskiĝis en Vieno en la jaro 1857, 1864, 1872, 1887 aŭ en iu alia jaro. La distrikta matrikuslisto estis ofte ebria, do liaj enskriboj estas malfacile legeblaj.

Kiel fakte estiĝis la genieco de Jara? Ja liaj gepatroj estis simpla ĉeĥa tajloro Leopold Zimmermann kaj aŭstra teatra aktorino Marlen Jelinkova. Verŝajne ĉefa kaŭzo de lia genieco estas tio, ke li ne travivis puberecon (sekse maturiĝo). Liaj gepatroj vestis lin dum lia infanaĝo per knabinaj vestoj, kiujn demetis lia pli aĝa fratino Luisa. Plu Jara vizitadis knabinan lernejon. Kiam li fine eksciis, ke li estas viro, tiam la tempo de pubereco estis for, ĉar knabinoj maturiĝas pli frue. Tial restis al li multe da cerboĉeloj, kiuj kutime perdas dum la pubereco.

Ankoraŭ mi volas aldoni, ke malgranda Jara vizitadis antaŭtagmeze ĉeĥan lernejon kaj posttagmeze la germanan. Lia verkaro pro tio estas skribita parte ĉeĥe, parte germane. El tio aŭstra profesoro Fiedler (li estis nur mezlerneja profesoro, ne altlerneja!), konkludis ke Cimerman estas aŭstra geniulo, ne ĉeĥa. Sed ĉi tiun aserton ni povas facile refuti citante el lia CD (Cimermanaj Dokumentoj), kie li deklaras ĉeĥe laŭvorte: „Mi sopiras ekvidi fine mian patrujon – Bohemion“.

Dum sia junaĝo Jara interkonatiĝis ankaŭ kun Sigmund Freud, kiu foje vizitis lian patron por riparigi vestaĵon. Ĉi tiu eminenta psikoanalizisto vekis geniecon de malgranda sentema infano. Post iom da tempo Jara foriras al mondo (en la aĝo 7-42 jaroj).

De tiu tempo ni trovas liajn spurojn praktike tutmonde. Al la usona registaro li ofertas projekton de Panama-kanalo inkluzive de la samnoma opero. Kun grafo Zeppelin li konstruas la unuan aerŝipon. Kiel anarkiisto li estis ekzilita el Germanio kaj en liaj dokumentoj aperis la mencio: „konstruisto de maltrankvilo“. La svisa firmao OMEGA postulis de li, ke li perfektigu ĝian horloĝon. Cimerman ankaŭ funkciis en la svisaj Alpoj kiel akuŝisto, ĉar akuŝistinoj ofte ne povis vintre atingi ĉiujn lokojn skie. Poste Cimerman esploris la vivstilon de la inuitoj. Bedaŭrinde tiam li maltrafis la nordan poluson je 7 metroj. En Paragvajo li fondis marionetan teatron por klarigi al kamparanoj la nocion „pup-registaro“. Kiel meblaragento li troviĝis inter gaŭĉoj en Argentino. En Johanesburgo (Sud-Afriko) li fondis muzeon de vaksaj statuoj. Konata estas precipe la duopo: Kolumbo frakasanta ovon sur la frunto de Napoleono. Certe estas konata ankaŭ plua skulptaĵo: Taras Bulba antaŭ Konstanca konsilio. Baldaŭ Cimerman rapidis al alia lando. Tial li vendis sian vaksan muzeon al iu nekonata sinjorino el Londono.

Cimerman kaj Esperanto

Dum la UK en Prago, kiun mi partoprenis, estis aŭdeblaj multaj prelegoj pri internacia lingvo kaj pri komunikado ĝenerale. Simile kiel doktoro Svěrák el teatro „JdC“ ankaŭ mi volis fari streketon en notlibron ĉiam, kiam dum prelegoj aŭdiĝos la nomo Cimerman. Kaj imagu! Eĉ ne unufoje, karaj geamikoj! Tamen laŭ mia opinio ĝuste Cimerman apartenis al la unuaj eltrovintoj de internacia lingvo, komuna por ĉiuj bonvolaj homoj.

Cimerman mem estis poligloto, sen problemo li ellernis baznivele ĉiun ajn lingvon. Sed dum sia aventurema vivo li konstatis, ke aliaj homoj ofte ne havas similan persistemon. Tial li cerbumis, kiel ebligi internacian komunikadon ankaŭ al malpli laboremaj personoj.

Gravan momenton en lia strebado prezentas la jaro 1887. Tiam Cimerman instruis en elementa lernejo de la vilaĝo Struk en Galicio. La jaro estis vere fruktodona. Cimerman ne nur kolorigis la lernejon kaj apogis ĝin el la suda flanko kontraŭ nordaj ventoj, sed ĉi tie li dum instruado rimarkis, ke parto de la infanoj nek atentis lian instruadon nek skribas en kajeron liajn eldirojn. Li

logike opiniis, ke la infanoj malbone vidas, tiel li akompanis ilin al proksima urbo Białystok al okulkuracisto, al iu doktoro Zamenhof. Post funda esplorado la doktoro konstatis, ke la infanoj vidas bonege, sed ili tute ne komprenas la instruiston, ĉar ili estas nek poloj nek ukrainoj, kiuj komprenas la ĉeĥan lingvon, sed hungaroj.

La kuracisto samspire konfidis al Jara, ke li jam longe strebas krei internacian lingvon, kiun li provizore nomis „esperanto“. Tiu ĉi ideo ekplaĉis al Jara, kaj tuj li proponis al doktoro Zamenhof sian kunlaboron, kiu estis kun plezuro akceptita.

Zamenhof unue intencis elekti el diversaj lingvoj samsonajn vortojn, kiuj fariĝus la fundamenton de la estonta lingvo. Ĉi tiun ideon Cimerman senriproĉe aprobis. Zamenhof plue proponis, ke la plej gravaj elektitaj vortoj enhavu la literon „y“, ĉar tiel ili estos bone memoreblaj, sed Jara ĉi tiun proponon akre rifuzis atentigante, ke unu litero „i“ en la lingvo certe sufiĉas. Li rekomendis prefere eluzi por ĉiu vortospeco saman finan literon, ĉar en aboco estas pli da literoj ol kiom da vortospecoj ekzistas, fine estis elektitaj nur vokaloj:

„a“ fariĝis la finaĵo de adjektivoj

„e“ de adverboj

„i“ verboj en infinitivo

„o“ substantivoj

„u“ verboj en volitivo

eble vi iom miras, kial ĝuste la verboj havas tian preferon, dum por la numeraloj, pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj la fina vokalo mankas. Origine Zamenhof proponis por la volitivo finan konsonanton, sed post mallonga diskuto, kiam li leviĝis de la planko, li volonte konsentis, ke la volitivo plej bele sonas kun la finaĵo „u“.

Ambaŭ amikoj certe daŭrigus la dialogon, sed la infanoj lacaj jam dormetis sur la divano kaj la botelo de prunbrando estis malplena. Tial Jara decidis reiri hejmen, promesante al Lodoviko baldaŭan lingvistikan sesion ĉe plena botelo.

Sed kiel li estis surprizita, kiam Lodoviko ne nur plu ne venis al li, sed li malpacience lanĉis sian verkon pri la internacia lingvo sen mencio pri la kunlaboro kun JdC (Jara da Cimerman).

Kompreneble la numeraloj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj havis diversajn finaĵojn sen iu ajn normo, la personpronomoj eĉ finiĝis per la litero „i“ same kiel la verbaj infinitivoj kaj kiel Zamenhof furiozis ĉe la ceteraj pronomoj! Klopodante realigi sian originan ideon pri la sama komenca litero (anstataŭ la

fina, kion proponis Jara) li dividis la pronomojn je nedifinaj, montraj, demandaj, kolektivaj kaj negativaj rezervante por ĉiu grupo apartan komencan literon!

Tiel fuŝita lingvo kompreneble ne plaĉis al kolerigita Cimerman. La gloro pro la eltrovita lingvo ja plene apartenas al Zamenhof, sed samtempe estiĝis la neceso konvinki la homaron pri la avantaĝoj de Esperanto por internacia komunikado. Kvankam li jam dum 80 jaroj tion direktas de supre (el la ĉielo), entute eblas diri, ke li sukcesis nur ĉe la plej volontemaj volontuloj.

Rimarkigo: 1. Por pli facila prononcado fare de eksterlandanoj mi uzis anstataŭ ĉeĥa nomo Cimrman la slovakon version Cimerman.

2. En la ĉeĥa lingvo lernantoj lernas parkere la vortojn, kiuj enhavas „y“ same prononcata kiel „i“. Oni nomas ilin „elektitaj“ vortoj - proksimume 60 vortoj.

Saluto el Malto

Nia bona juna amiko Pavel Brom kaptis la okazon kaj pasis dusemajnan familian libertempon sur la insulo Malto, ankaŭ por trovi samideanojn en tiu ekzotika loko. Dank'al sia kapablo kaj interreto li sukcesis trovi samideanojn sur la insulo kaj surprizis sian instruistinon per saluto de maltanoj sur la ekrano de la videoaparato. Li ankaŭ alportis esperante skribitan revuon „**Mezmara Stelo**“, el kiu estas kompilita la sekvanta parto.

Malto konsistas el tri insuloj en la maro Mediteranea. Ĝi estas plenŝtona kun malmultaj arboj, domoj amasigitaj kiel en la proksimaj arabaj landoj. Tamen estas diferenco – la lando ne estas islama, mankas minaretoj. Meze de ĉiu vilaĝo staras barokstila preĝejo, kiu tre superas domojn. En la urboj Valletta, Mdina, Vittoriosa estas riĉaj konstruaĵoj, palacoj, belaj domoj, ŝirmitaj per muregoj kaj kolosaj fortikaĵoj. La insulo kaj maltanoj eltenis atakojn de fenicoj, kartaganoj, romianoj, araboj kaj post rekonkero fare de la normandoj la insulo fariĝis rifuĝejo por Kavaliroj de la Ordeno de Sankta Johano de Jerusalemo, forpelitaj de Rodiso fare de la turkoj en la jaro 1522.

En la jaro 1565 la turkoj denove decidis konkeri Malton. Okazis „Granda Sieĝo“. La kavaliroj kaj maltanoj kuraĝe rezistis, multaj pereis, sed helpe de trupoj senditaj de la reĝo de Sicilio ili fine devigis la turkojn forlasi la insulon.

Sekve oni decidis fortikigi la insulon kaj konstrui ĉi tie ĉefurbon Vallette. Naskiĝis nova urbo pere de arkitektaj planoj. Sed Vallette ne estas la sola urbo interesa sur la insulo. Ankaŭ Mdina, malnova ĉefurbo, posedas fortikaĵojn, palacojn, preĝejojn, same kiel Mosta, kies preĝejo havas unu el la plej grandaj kupolon en la mondo. Kelkaj domoj havas balkonojn kaj terasojn ornamitaj per ŝtonaj balustradoj kun belegaj kolonetoj. En multaj stratoj videblas fermitaj balkonoj, ofte malsame koloritaj, kiuj elvokas arabajn ĵaluziojn kaj estas tre belaspektaj.

Ne eblas viziti Malton kaj ne ĉeesti la patronan feston dum la somera sezono. Tiuj festoj allogas homamasojn. La stratoj estas ornamitaj per multegaj flagoj, gigantaj statuoj de sanktuloj, tre vive koloritaj. Aŭdiĝas senĉese pafadoj, eble ili rememorigas pri „Granda Sieĝo“ aŭ pri bombadoj dum la dua mondmilito.

Malto havas iom apartan – propran lingvon. Araboj ĉi tie lasis sian lingvon kiel bazon de la malta lingvo, sed por skribo oni uzas la latinan alfabeton (iomete ŝanĝita). La historio kaŭzis, ke multaj vortoj devenas el la itala, la angla, la franca kaj anstataŭis la arabajn.

La enigmoj de Malto estas megalitaj temploj, konstruitaj antaŭ pli ol 5000 jaroj per enormaj blokoj, hakitaj kaj lokitaj tre precize. Malto estas la ununura loko en Mediteraneo, kiu posedas tiajn monumentojn.

Mi nur mallonge priskribis Malton, sed mi konsilas al ĉiuj viziti ĝin okaze de „Internacia Turisma Semajno en Esperanto“, kiun organizas ĉiun duan jaron la Malta Esperanto-societo. La organizantoj estas tre afablaj kaj gastamaj. Ili atentos vin dum la venonta aranĝo septembre.

En atikolo kunlaboris Jean Cruchon, John Vella-Bondin, Pavel Brom kaj Jindřiška Drahotová.

Junio 2001.

Popolnaturkuracistino *Skokovská bába* – avulino el *Skokovy*

Laŭ rakontado de memoruloj kaj laŭ diversaj skribaj fontoj kompilis Eva Pánková, dokumenton esperantigis Jindřiška Drahotová

Sinjinorino Klotylida Hanušová-Hoppeová naskiĝis la 3-an de junio 1843 en Kyšperk (Letohrad) en Bohemio. Ŝiaj gepatroj estis honestaj kaj estimataj homoj. El iliaj nombraj infanoj restis nur unu filo kaj Klotylida. Kiam Klotylida estis kvarjara, mortis ŝia patrino kaj post duono jaro la patro. Plue ŝi vivis

malgajan vivon ĉe parencoj. Pli poste, kiam ŝi ŝanĝis loĝejon, ŝi laboris ĉe la familio Dittrich. La vivkondiĉoj por ŝi pliboniĝis. Sinjoro Dittrich estis profesie konstruisto de fervojo, do tre ofte la familio ŝanĝadis loĝejon kaj Klotylda ekkonis Bohemion, Moravion, Silezion, Hungarion, Germanion. La infanoj de sinjoro Dittrich instruis ŝin legi kaj skribi. Ŝi neniam vizitis lernejon, sed post la laboro ĝis malfrua nokto ŝi legis religiajn, natursciencajn kaj fakajn librojn.

De la infaneco ŝi observadis la naturon, precipe herbojn. Kiam ŝi estis ankoraŭ infano, ŝi konsilis al maljunulo – astmulo trinki teon el primoloj. Li resaniĝis kaj oni komencis ŝin alparoli „doktorineto“.

Dekokjara ŝi en Leipzig (Lepcigo, Lipsko) laboris en privata sanatorio. La posedanto konstatis ŝian eksterordinaran talenton kaj elektis ŝin sia kunlaborantino. Dum operacioj ŝi studis anatomion kaj la difinon de diagnozo. Post naŭ jaroj pro malakordiĝo kun kuracistoj ŝi forlasis la sanatorion kaj translokiĝis al Heida (Nový Bor). Ĉi tie en propra loĝejo ŝi aranĝis por la fabriko de sinjoro Pistoř desegnaĵojn sur vitro. Ŝi bone profitis per tiu ĉi okupo. Dum tempo ŝi konatiĝis kun Albert Hoppe kaj edziniĝis al li. Hoppe, la direktoro de la fabriko dungadis kelkajn pentristojn kaj knabinojn. Komune ili laboris en la fabriko de sinjoro Pistoř dum dudek kvin jaroj. Krom tio ŝi estis ofte serĉata de malsanuloj por konsilo kaj helpo.

El Heida ŝi foriris al Teplice, kie ŝi laboris dum unu jaro kiel privata masaĝistino.

La direktoro de bienoj en Březno eksciis pri ŝi de popola rakontado. Li invitis ŝin loĝi en Lhotka apud Březno. Ĉi tie ŝi malsaniĝis tre grave. Ĉe la frato ŝi bedaŭrinde ne trovis afablan akcepton.

Fine el Lhotka ŝi venis al Skokovy, kie oni konstruis domon por torfkuracado. Kvankam ŝi havis problemojn pro envio kaj malfavoro de administraciaj oficejoj, ŝi plu akceptis ĉiujn turmentatojn kun zorgo kaj bonkoreco. Plejparte ili resaniĝis.

La torfkuracejo kaj akvokuracejo ĉesis funkcii post la dua mondmilito.

Restis nur loka proverbo: „*Se avulino ne helpas, ŝovelilo atendas*“.

La tombo de la avulino estas en proksima vilaĝo Všeň.

Nun en Skokovy-n venas esperantistoj por ekzerci sian lingvokapablon, komune amikiĝas, helpas unu al alia, promenas en la saniga naturo de Ĉeĥa paradizo... sub protekto de MUDr Josefo Hradil.

Estas bone vojaĝi en Ĉeĥio fervoje

J. Drahotová

Simpatia rimarko por niaj eksterlandanoj estas klarigoj en Esperanto en la dika horarlibro (eble ne ĉiujare...). Sed se vi estas esperantisto kaj vi ne kaŝas tion (portante signon), aŭ vi simple estas konata esperantisto, vi povus sperti ion similan, kiel mi.

Post aĉeto de trajnbileto mi mispoŝigis la trajnbileton kun rabatilo por pensiuloj, kiuj falis planken. Jam sidante, trankvile atendante la forveturon en la vagono mi nenion sciis pri tio. Bona feino alhastis kaj kun feliĉa bela rideto donis al mi mian perdaĵon du minutoj antaŭ ol la trajno moviĝis...

Eĉ se vi estas nekaŝita esperantisto, vi povas trovi homojn, kiuj alparolas vin kaj vi povas babili... agrable pasi la tempon.

Tamen hodiaŭ mi spertis ĝentilecon de fervojkontrolisto, spite li ne estis probable esperantisto (?).

Estis la unua tago post la valideco de mia rabatilo. Tiun fakton mi ne rimarkis - mi, blankharulino, kun okulvitroj, avino kun dorsosako... Sed kontrolisto estis afabla kaj postulis nur malaltan monpunon kaj pagon ĝis plena bileto. Junulo, sidanta kontraŭ mi lerte proponis al li, kiam kontrolisto vane serĉis inter sia mono por redoni la sumon je mia ununura milkrona bankbileto, ke li povas ŝanĝi al li monon kiel li bezonas kaj ridis al mi. Li havis surprize okuloj kun malsama koloro...

Kontrolisto ankoraŭ konsilis al mi kiel senprobleme aĉeti rabatilon antaŭ revojaĝo. Kaj aŭdante ke mi revenas post unu tago, li elmetis el poŝo tondileton kaj liberigis mian foton de rabatilo sendifekte, ĉar ĉiam oni devas doni foton dum aĉeto de nova rabatilo.

Hodiaŭ eĉ kun ĝojo mi rememoras lin. Li havis malaltan staturon, kiel mi. Ankaŭ mi ŝatas trakti kun ĝentilaj homoj „vizaĝ´ al vizaĝo“ – demokrate...

Ĉe la elvagoniĝo li helpis min de la alta ŝtupo.

Dum la alia tago mi denove vojaĝis de Mladá Boleslav al Prago trajne. Mi envagoniĝis en kupeon, kie jam sidis patrino kun knabineto eble kvinjara. La knabino havis infanan libron kaj kun granda entuziasmo ŝi laŭte „legis“. En la libro ja estis kelkaj literoj, eĉ vortoj, sed precipe bildetoj de objektoj, bestetoj kaj figuretoj vicigitaj en frazojn. La knabineto senerare legis kaj daŭrigis la legon al pli kaj pli komplikaj taskoj. La patrino povis nur laŭdi ŝin.

Venis ĉapitro kun leciono kiun ni povas en esperanto nomi finaĵo –et-. Pri tiu „malgrandigo“ en la ĉeĥa lingvo abundas vortoj, kompare kun la germana kaj angla. La knabino faris tion trankvile: *pták – ptáček* (birdo-birdeto), *oblak – obláček* (nubo-nubeto), *prst – prstíček* (fingro-fingreto), *kůl – kulíček* (fosto...), la patrino malsereniĝis, sed diris nenion. La knabino daŭrigis la legadon: *lev – levíček* (leono ...). La patrino diris: „Tien oni ne parolas, oni diras *lvíček!*“

La knabino demandis: „Kaj kial?“ La patrino: „Tial!“ La knabino: „Sed kial?“ La patrino: „Ĉar tial, ĉesu demandi!“ La knabino logike: „Kial ne levík?“ La patrino kolere: „Ĉar ne!“ La knabino ploreme: „Kial ne?“

Venis frapa argumento...

Mi tute ne kapablis ion fari. En mia cerbo eklumigis fulmo: Kiel mallogika estas ĉiu nacia lingvo, kiel neniu pri tio pensas, kiel perforte gepatroj instruas mallogikon al siaj propraj karaj infanoj, kiel ili instruas ne pensi logike,

akcepti senriproĉe komplikaĵojn, kiuj nur konfuzas ĉiujn... jam dum jarcentoj, jarmiloj... Jes, logiko mankas en la socio, logiko kiun elradikigas gepatroj al infanoj, en tempo, kiam ili ne povas rezisti... Malkonscio de tiu fakto baras la homaron evolui...

La dua fulmo, malpli forta venis en mian cerbon: nur esperantisto povas tion kompreni, nur li povas tion eble klarigi kaj pravigi...

El la libro „Dějiny budou od úterý“

(La historio komenciĝos de mardo) – Pavel Landa
traduko J.Drahotová

Alternativo

En sufiĉe bela somero en la jaro 2002, dum nia lando suferis por egaj inundoj, mi aŭdis kelkajn memsavigajn anekdotojn, kiuj ĉiam niaj homoj abunde kreas dum tempoj de katastrofoj. Ĉi tie vi legu la puran „judan“:

Eta David demandas: „Avĉjo, kio estas alternativo?“

„Nu, imagu al vi, ke vi aĉetos kokinon. Ĉiutage ŝi donos al vi ovon. Kompreneble vi aĉetos duan. Kaj vi ekhavas ĉiutage du ovojn. Vi aĉetos dek kokinojn kaj ili donos al vi ĉiutage dek ovojn.“

„Do bone. Sed kio estas alternativo?“

„Vi lernas, vi akiros superrigadon en ovonegoco. Do, vi aĉetos cent, ducent, kvarcent kokinojn kaj vi ekhavas ĉiutage kvarcent ovojn.“

„Avĉjo, sed kio estas alternativo?“

„Vi prosperas, vi kreos farmon kokinan kun mil kokinoj. Poste duan, trian, kvaran, vi havos dek du homojn da personaro kaj ĉiutage kvarmil ovojn. Ĉu vi povas tion imagi? Sed poste venos inundo kaj post dek kvin minutoj ĝi ĉion forprenos.“

„Terure! Sed avĉjo, ne ĉagreniĝu, kio estas alternativo?“

„Anasoj.“

Inklino al ludo kun infanfervojo

Laŭ hipotezo de mia amiko Mirek Jenšík la kreo de nia respubliko okazis jene:

La 28-a usona prezidento Thomas Woodrow Wilson ŝatis, do amis ludilon - infanfervojon. En Blanka domo li ekipis specialan ĉambron apud fama „Oval Office“, kiu pli poste estis konvenega por petoli kun staĝantinoj. Sed en la tempo de Wilson estis tie tute nenio krom vasta relaro sur la planko kun aro de komutiloj, semaforoj, haltejoj kun turniloj, kvar tuneloj, du pontoj kaj kelkaj seneliraj reloj. En tiun ĉi ĉambron, antaŭ la publiko severe gardanta, la

prezidento eniradis ludi ĉiam, kiam li estis laca (plena de ĉio ĝis la kolo, kiel diras ĉeĥoj), do okazo ofta por homo sur tiel alta posteno.

Pri tio sciis (kiel ĉiam pri ĉio) la bone informita profesoro Masaryk. Kaj kiam li sukcesis finfine akiri inviton al privata vizito, Masaryk lotmetis sur fervojan karton.

„Estimata sinjoro prezidento,“ diris Masaryk, sidetante en luksa seĝo, „mi venas kun ĝentila peto. Mia kolego, doktoro Beneš, eble vi memoros lin, kun iomete malglata angla, sed alie deca homo, havas en la kapo ideon – Ĉeĥoslovakian respublikon. Pri io alia li ne volas konversacii. Ni devas fari por li respublikon, alie li estus nervoza, malserena. Do, mi venis vin peti, ke vi per via vorto helpu. Ni sendus al vi iajn dokumentojn kaj viaj sinjoroj kontrolos ilin. Konkize: Sinjoro prezidento Wilson, helpu al ni krei respublikon, je tio ni donos al vi en Prago la ĉefan stacidomon!“

Amiko Jenšík asertas, ke eble tiel ekestis Ĉeĥoslovakio.

Rakonto pri Nenio

Mi renkontiĝis hieraŭ vespere sur la ponto kun Nenio. Ĝi iris sola, ŝajne promeni.

„Pardonu,“ mi diras, „ĉu mi povas akompani vin iomete?“

„Kial ne,“ ĝi diris kaj belete ekridetis.

„Ĉu mi ne ĝenus vin,“ mi daŭrigis la paroladon, „se mi enketus vin per kelkaj demandoj? Mi ja volas pri vi verki artikolon.“

„Artikolon?“ subite ĝi aspektis lacega. „Denove pri mi?“

Kaj kun longa oscedo ĝi disigis sin en sia esenco.

Aŭdienco

unuaktaĵo, Václav Havel, tradukis Josef Vondroušek

Personoj: bierfarista ĉefo

Vaněk

Enkonduka sceno

Sur la scenejo troviĝas la oficejo de bierfaristo. Maldekstre estas pordo kaj super ĝi pendas ia enkadrigita diplomo, dekstre ŝranko kaj registroteko kaj sur ili aro da bierboteloj kun diversaj etiketoj; sur la fona muro troviĝas granda nearta pentraĵo, prezentanta Ŝvejkon kaj gastejstron Palivec, sub la pentraĵo estas ornama surskribo:

Kie ŝaŭmas la biero

regas paco sur la tero.

meze de la scenejo troviĝas kancelaria tablo kaj tri seĝoj, sur la tablo estas amaso da diversaj aktoj, kelkaj malplenaj boteloj de biero kaj kelkaj glasetoj. Apud la tablo sur la planko staras botelujo. Laŭlonge de la muroj kaj ĉefe en la anguloj de la ejo troviĝas malfacile difinebla brikabrako, ekz. diversaj forigindaj ventoliloj, praa radioaparato, rompita vesthoko, stoko da malnovaj ĵurnaloj, botoj kaj simile. Kiam leviĝas kurtenego, sidas ĉe la tablo la bierfaristo en labormantelo, kun la kapo surtable kaj laŭte ronkas. Post tempeto aŭdiĝas frapado ĉe la pordo. La bierfaristo tujtuje vekigigas.

Bierfarista ĉefo: Envenu – (*envenas Vanĉk en vatita laborvesto kaj botoj*)

Vanĉk: Bonan tagon –

Ĉefo: Ha, sinjoro Vanĉk! Venu! Sidiĝu! (*Vanĉk nekuraĝe sidigas sin.*) Ĉu bieron?

Vanĉk: Ne, dankon –

Ĉefo: Kial ne? Prenu do – (*La ĉefo elprenas el la botelujo botelon, malfermas ĝin, plenigas du glasojn, unu ŝovas al Vanĉk, la duan tuj eltrinkas.*)

Vanĉk: Dankon –

Ĉefo: Nu? Kiel iras, Vanĉk?

Vanĉk: Dankon, bone –

Ĉefo: Devas, ĉu?

Vanĉk: Hm. (*Paŭzo*)

Ĉefo: Kion vi faras hodiaŭ? Ĉu vi derulas?

Vanĉk: Mi alruletas –

Ĉefo: Pli bone alruli ol deruli, ĉu?

Vanĉk: Jes. (*Paŭzo*)

Ĉefo: Kiu hodiaŭ rulas?

Vanĉk: Ŝerkezi –

Ĉefo: Ĉu li do venis?

Vanĉk: Jes, antaŭ momento –

Ĉefo: Ebria?

Vanĉk: Ebrieta. (*Paŭzo*)

Ĉefo: Trinku! Kial vi ne trinkas?

Vanĉk: Dankon, al biero mi ne tre kutimas.

Ĉefo: Ĉu vere? Tion mi lernigos do al vi. Vi kutimiĝos! Ĉi tie ni ĉiuj trinkas bieron – jen tradicie –

Vanĉk: Mi scias – (*Paŭzo*)

Ĉefo: Ne estu malgaja!

Vanĉk: Mi ne malgajas. (*Paŭzo*)

Ĉefo: Nu, kio alia?

Vanĉk: Alia?

Ĉefo: Nu, ĝenerale –

Vaněk: Dankon, elteneble –
Ĉefo: Ĉu plaĉas ĉi tie?
Vaněk: Sufiĉe
Ĉefo: Povus esti pli terure, ĉu?
Vaněk: Jes.

El „Apokrifoj“ de Karel Čapek, elstara ĉeĥa verkisto

Traduko el la ĉeĥa al Esperanto Josef Vondroušek,
eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1970.

Ofiro

Homoj sur la placo de Sankta Marko apenaŭ turnis la kapon, kiam arestistoj kondukis tiun maljunulon al la doĝo. Li estis tre kaduka kaj malpura, oni dirus, ke li estas iu etŝtelisto el la haveno.

„Ĉi tiu viro,“ anoncis *podesta vicegerente* antaŭ la doĝa trono, „diras, ke li estas nomata Giovanni Fialho, komercisto el Lisbono; li asertas, ke li estas posedanto de ŝipo kaj ke lin kun la tuta ŝipanaro kaj kargo kaptis alĝeriaj piratoj; li depozicias, ke li sukcesis fuĝi el la galero kaj ke li povus fari al Venecia respubliko eminentajn servojn – kiajn, tion li laŭdire povas konfidi nur al via doĝa ekscelenco mem.“

La maljuna doĝo atente rigardis la hirtan maljunulon per siaj birdokuloj. „Do, vi,“ li diris fine, „vi diras, ke vi laboris sur galero?“

La venigita viro anstataŭ respondo nudigis siajn malpurajn maleolojn; ili estis ŝvelintaj de katenoj. „Kaj dorso,“ li aldonis, „nuraj cikatroj, via doĝa ekscelenco. Ĉu vi bonvolas deziri, ke mi ĝin montru al vi?“

„Ne, ne,“ rapidis diri la doĝo. „Ne estas bezone. Kion vi volis diri al mi?“

La kaduka vireto levis la kapon. „Disponigu al mi ŝipojn, via doĝa ekscelenco,“ li diris klare. „Mi kondukos ilin al Ofiro, lando de oro.“

„Al Ofiro,“ murmuris la doĝo. „Vi trovis Ofiron?“

„Mi ĝin trovis,“ diris la maljunulo, „kaj estis tie naŭ monatojn, ĉar mi devis ripari la ŝipon.“

La doĝo interŝanĝis rapidan rigardon kun sia dokta konsilanto, episkopo el Pordenone. „Kie estas Ofiro?“ li demandis la maljunan komerciston.

„Trimonatan vojaĝon de ĉi tie,“ diris la navigisto. „Oni devas ĉirkaŭŝipi la tutan Afrikon kaj poste oni denove navigas norden.“

La episkopo de Pordenone atente kliniĝis. „Kaj ĉu Ofiro situas sur la bordo de maro?“

„Ne. Ĝi kuŝas naŭ vojaĝtagojn de la marbordo kaj situas ĉirkaŭe de granda lago, blua kiel safiro.“

La episkopo de Pordenone ete kapjesis. „Kaj kiel vi atingis la internon de la lando?“ demandis la doĝo. „Oni diras, ke Ofiro estas apartigita de la maro per netransireblaj montoj kaj dezertoj.“

„Jes,“ diris la navigisto Fialho, „en Ofiron ne kondukas vojo. La dezerto svarmas de leonoj kaj la montoj estas vitrecaj kaj glataj kiel vitro el Murano.“

„Kaj vi estis trans ili?“ elvortis la doĝo.

„Mi estis. Kiam ni estis riparantaj la ŝipon ege difektitan de la tempestoj, venis al la bordo homoj, vestitaj per blanka vesto, purpure borderita, kaj ili mansvingis al ni.“

„Negroj?“ demandis la episkopo.

„Ne, monsinjoro. Blankaj kiel Angloj, kaj harojn ili havis longajn, surŝutitajn per ora polvo. Ili estis tre belaj.“

„Nu, kaj ĉu ili estis armitaj?“ plu demandis la doĝo.

„Ili havis orajn lancojn. Ili ordonis al ni preni ĉion kion ni havas el fero, kaj interŝanĝi tion en Ofiro por oro. En Ofiro ja ne estas fero. Ili mem inspektis, ke ni prenu ĉiun feron: la ankrojn, ĉenojn, armilojn, ankaŭ eĉ najlojn, per kiuj estis kunigita nia ŝipo.“

„Kaj kio plue?“ demandis la doĝo.

„Sur la bordo atendis grego da flugilhavaj ŝarĝbestoj, proksimume sesdek. Ili havis flugilojn kiel cigoj. Oni nomas ilin Pegazoj.“

„Pegazo,“ diris enpense la dokta episkopo, „pri ĝi konserviĝis al ni raportoj jam de antikvaj Grekoj. Ŝajnas, do, ke la Grekoj efektive konis Ofiron.“

„En Ofiro nome oni parolis greke,“ deklaris la majluna komercisto. „Mi scias iom greke, ĉar en ĉiu haveno estas iu ŝtelisto el Kandio aŭ Smirno.“

„Tio estas interesaj informoj,“ murmuris la episkopo. „Kaj ĉu la Ofiranoj estas kristanoj?“

„Dio, ne punu min,“ diris Fialho, „ili estas ĝis oste paganoj, monsinjoro. Ili adoras iun Apolonon aŭ kiel ili lin nomas.“

Pordenona episkopo skuetis la kapon. „Tio do konfirmas. Probable ili estas posteuloj de Grekoj, alpelitaj de martempesto post la konkero de Trojo. Kaj kio plue?“

„Plue? diris Giovanni Fialho. „Nu, ni metis la feron sur la flugilhavajn azenojn. Tri el ni, nome mi, iu Chico el Kadizo kaj Manolo Pereira el Coimbay ricevis flugilhavajn ĉevalojn, kaj gvidate de tiuj viroj el Ofiro, ni flugis rekte orienten. La vojaĝo daŭris naŭ tagojn. Ĉiun nokton ni descendis, por ke la Pegazoj povu manĝi kaj trinki. Ili manĝas nur asfodelojn kaj narcisojn.“

„Videble ili estas de greka deveno,“ murmuris la episkopo.

„La naŭan tagon ni ekvidis lagon bluan kiel safiro,“ daŭrigis la maljuna komercisto. „Ni descendis sur ĝia bordo. En ĝi estas arĝentaj fiŝoj kun rubenokuloj. Kaj la sablo de ĉi tiu lago, via doĝa ekscelenco estas nuraj perloj, grandaj kiel siliketoj. Manolo falis teren kaj komencis manrasti la perlojn plenmane; kaj tiam diris al ni iu el niaj akompanantoj, ke ĝi estas bonega sablo, el kiu en Ofiro oni preparas kalkon.“

La doĝo ekokulegis. „Kalko el perloj! Mireginde!“

„Poste oni kondukis nin en la reĝan palacon. Ĝi estis tute el alabastro, nur tegmento estis el oro kaj brilis kiel suno. Tie nin akceptis la Ofira reĝino, sidanta sur kristala trono.“

„Ĉu en Ofiro regas virino?“ ekmiris la episkopo.

„Tiel estas, monsinjoro. Virino de impona beleco, similanta al iu diino.“

„Versimile iu el Amazonoj,“ opiniis la episkopo mediteme.

„Kaj kiom la aliaj virinoj,“ vortigis la doĝo, „sciu, mi opinias la virinojn ĝenerale, ĉu estas tie belaj virinoj?“

La navigisto kunplektis la manojn. „Aĥ, via doĝa ekscelenco, tiaj eĉ ne estis en Lisbono dum mia junaĝo.“

La doĝo managitis. „Ne diru! En Lisbono, onidire, la virinoj estas nigraj kiel katoj. Sed en Venecio, homido, en Venecio antaŭ proksimume tridek jaroj, tiam estis virinoj! Kvazaŭ de Tiziano! Kaj kion la virinoj en Ofiro, rakontu!“

„Mi estas maljuna, via ekscelenco,“ diris Fialho, sed Manolo povus rakonti, se ne mortigus lin Muzulmanoj, kiuj nin kaptis apud Balearoj.“

„Ĉu li povus multe rakonti?“ demandis la doĝo interesite.

„Madono,“ ekkriis la maljuna navigisto, „tion vi, ekscelenco, kredus eĉ ne al li. Mi diras, kiam ni tie pasigis dek kvar tagojn, vi estus povinta la tutan Manolon elskui el la pantalono.“

„Kaj kion la reĝino?“

„La reĝino havis feran zonon kaj ferajn braceletojn. Laŭdire vi havas feron, ŝi diris: al ni iam liveras la feron arabaj komercistoj.“

„Arabaj komercistoj!“ ekkriis la doĝo kaj pugnofrapis la apogilon. „Jen vi vidas, ĉie nin la kanajloj elpuŝas el la merkatoj! Tion ni ne toleros, ĉi tie temas pri la plej altaj interesoj de la Venecia respubliko! En Ofiron devas liveri ni, kaj punkto! Mi donos al vi tri ŝipojn, Giovanni, tri ŝipojn plenajn de fero -“

La episkopo levis la manon „Kaj kio plue, Giovanni?“

„La reĝino ofertis al mi por ĉiu mia fero egalan pezon da oro.“

„Kaj vi tion, memkompreneble akceptis, vi ŝtelisto!“

„Mi ne akceptis, monsinjoro. Mi diris, ke mi vendas feron ne laŭ pezo, sed laŭ volumeno.“

„Ĝuste,“ diris la episkopo. „Oro pli pezas.“

„Speciale oro el Ofiro, monsinjoro. Ĝi estas trioble pli peza ol la ordinara oro kaj estas ruĝa kiel fajro. La reĝino do ordonis, ke oni forĝu el la oro egalan ankron, egalajn najlojn, egalajn ĉenojn kaj egalajn glavojn, kiaj estis niaj feraj. Tial ni devis kelkajn semajnojn atendi.“

„Kaj kial ili bezonas feron?“ miris la doĝo.

„Ĉar ĝi estas por ili maloftaĵo, via ekscelenco,“ diris la maljuna komercisto. „Ili pretigas el ĝi juvelojn kaj monon. Ili kaŝas ferajn najlojn en kestoj kiel trezoron. Ili diras, ke fero estas pli bela ol oro.“

La doĝo mallevis la palpebrojn, similajn al palpebroj de meleagro. „Mirinda,“ li murmuris, „tio estas, Giovanni, eksterordinare mirinda. Kaj kio poste okazis?“

„Poste ili ŝarĝis per tiu oro la flugilhavajn mulojn kaj transportis nin egalmaniere al la marbordo. Tie ni kunigis la ŝipon per oraj najloj kaj pendigis oran ankron per ora ĉeno. La ŝiritan ŝnuregon kaj velojn ni anstataŭigis per silkaj kaj ekŝipis per favora vento hejmen.“

„Kaj la perloj,“ diris la doĝo, ĉu neniujn perlojn vi kunprenis?“

„Ni ne kunprenis,“ diris Fialho. „Mi petas pardonon, ili tie estis ja kiel sablo. Nur kelkaj perleroj implikiĝis en miajn ŝuojn kaj ankaŭ tiujn forprenis de mi la alĝeriaj paganoj, surpriz-atakintaj nin apud Balearoj.“

„Ŝajnas,“ murmuris la doĝo, „ke ĉi tiu priskribo estas sufiĉe versimila.“

La episkopo iomete jesis. „Kaj kio pri bestoj,“ li rememoris. „Ĉu ekzistas en Ofiro centaŭroj?“

„Mi ne aŭdis pri ili, monsinjoro,“ diris respekte la navigisto. „Sed estas tie fenikopteroj.“

La episkopo eksnufis tra la nazo. „Vi versimile eraras. Fenikopteroj estas ja en Egiptio – estas konate, ke ili havas nur unu piedon.“

„Kaj ili havas tie sovaĝajn azenojn,“ aldonis la navigisto, „striitajn nigre kaj blanke, egalmaniere kiel tigroj.“

La episkopo levis suspekto la okulojn. „Vi, ĉu vi ne volas nin paroltrompi? Kiu iam vidis striitajn azenojn? Unu afero mirigas min, Giovanni. Vi asertas, ke trans la Ofiran montaron vi flugis sur flugilhavaj muloj.“

„Tiel estas, monsinjoro.“

„Hm, ni rigardu. Laŭ arabaj raportoj vivas en la Ofiraj montoj birdo Grifo, kiu kiel konate, havas metalan bekon, metalajn ungegojn kaj bronzaĵajn plumtubojn. Ĉu vi aŭdis nenion pri ĝi?“

„Mi ne aŭdis, monsinjoro,“ balbutis la navigisto.

La episkopo de Pordenone skuis konsidereme la kapon. „Trans la montojn, homido, ne eblas flugi, tion vi ne kredigos al ni; ja tie, kiel pruvite, vivas birdo Grifo. Ĝi estas teknike neebbla, la birdo Grifo forbekus la Pegazojn kiel hirundo muŝojn. Homo, nin vi ne superruzos. Kaj kio, vi fripono, kiaj arboj tie kreskas?“

„Nu, kiaj arboj,“ eligis el si la malfeliĉulo, „estas konate, kiaj arboj. Palmoj, monsinjoro.“

„Do vidu kiel vi mensogas,“ diris la episkopo venke. „Laŭ Bubono de Biskro, kiu estas aŭtoritato en ĉi tiaj aferoj, kreskas en Ofiro granatarboj, kiuj havas karbunkolojn anstataŭ kernojn. Vi elpensis, kamarado, malsaĝan historion!“

Giovanni Fialho falis genuen. „Kiel, se estas Dio super mi, malklera komercisto povus elpensi Ofiron?“

„Al mi vi ion rakontos,“ mentoris lin la dokta episkopo, „mi scias pli bone ol vi, ke en la mondo ekzistas Ofiro, lando de oro; sed kio koncernas vin, vi

estas mensogulo kaj fripono. Tio, kion vi diras, kontraŭas al la fidindaj fontoj kaj estas do mensoga. Via doĝa ekscelenco, tiu ulo estas trompisto.“

„Denove unu,“ ekĝemis la maljuna doĝo, zorgoplene palpebrante.
„Terure, kiom da aventuroj ekzistas hodiaŭ. Forkonduku lin!“

Podesta vecegerente demande ekrigardis.

„Kiel ordinare, kiel ordinare,“ oscedis la doĝo. „Lasu lin sidi, ĝis li bluiĝos, kaj poste vendu lin por galero. Domaĝe,“ li murmuris, „ke li estas trompulo: kelko el la dirita havis ian kernon... Versimile li aŭdis tion de la Araboj.“

El la libro „Postkulisoj de la vortoj“

(Zákulísí slov) de Michal Novotný, 2003

Zavazadlo – *valizo*

La vorton vi trovos en neniu alia eĉ la plej parenca lingvo. Ĝi ekzistas nur en la ĉeĥa. Laŭ etimologo Václav Machek tiun nocion alĝvidis al la ĉeĥa mem Jan Amos Komenský (Komenio). Machek en sia verko skribas: Komenský la vorton „**zavazadlo**“ aŭdis en la popola lingvaĵo – oni ne opinias, ke ĝin li kreis – li envicigis ĝin en skriban lingvon kaj ĝi laŭ lia sugesto ekvivis.

Tamen Komenský komprenis la vorton „**zavazadlo**“ alie ol nia nuntempa kofro, dorsosako, mansako, vojaĝsako. Se ni legus tekstojn de Komenský, ni povus trovi frazon: „La plac´ estis plena de kavoj... eĉ ŝtonoj, arbtrunkoj... kaj aliaj „zavazadel“ - *valizoj*...“ La vorton Komenský ne uzas en la sama senco kiel ni. Ŝajnas klare, ke Komenský sentas la vorton „**zavazadlo**“ kiel baro, obstaklo. La homoj de Moravio (parto de Ĉeĥio) certe ĝin bone komprenas, ĉar en ilia dialekto la vorto „zavazet“ signifas „bari aŭ ĝeni“. Jes, la vortoj „zavazadlo“ kaj malnovĉeĥa „zavazet“ estas proksime parencaj, nu, vidu!

Sed, kiel okazis, ke la vorto „**zavazadlo**“ ŝanĝis sian signifon? Eble estas tiel, kiel skribas Václav Machek, ke la valizo dum la vojaĝado tre ĝenas (zavazí). Eble pravas Jiří Rejzek, en la plej nova *Ĉeĥa etimologia vortaro*, se li proponas klarigi la novan senco de la vorto „**zavazadlo** – *valizo*“ en ligo kun la verbo „vázat, zavazovat – *ligi, ŝnurigi*“, ĉar niaj antaŭuloj devis antaŭ vojaĝo valizon firme ligi (zavázat).

Zboží – *varo*

Per tiu ĉi vorto ni indikas objektojn faritajn, fabrikitajn por uzo de homoj, objektojn, kiuj estas destinitaj por aĉeto kaj vendo. Tiun ĉi signifon la vorto ricevis nur dum la moderna tempo. La malnova ĉeĥa vorto „sbožie“ signifis posedaĵon, bienon, riĉecon, bonfarton kaj ankaŭ povon, feliĉon kaj sukceson. Se ni legas en historia libro, ke nobelo venis al sia „**zboží**“, tio signifas, ke li alvenis sian bienon, kastelon. Kaj kiam ni legas sur geografia karto, ke iu ĉeĥa vilaĝeto

nomiĝas, por ni kurioze, „**Zboží**“, signifas tion, kio oni iame nomis simple – bieno.

Tiu, kiu posedis grandan „**zboží**“ – posedaĵon, povon, monon, estis riĉa. La vortoj „**zboží**“ kaj „**bohatý** – *riĉa*“ estas lingve parencaj (vi mem povas observi), same kiel „**ubohý**“ – origine senhava, do, parenca kun „**zboží**“ kaj „**bohatý**“. Kaj tiuj tri vortoj havas ankoraŭ alian parencon, vere surprizan: la vorton „**bůh** – *dio*“.

La nocion „**bůh**“, same kiel vortojn, pri kiuj mi jam parolis, fakuloj povas sekvi en profundan lingvan historion, ĝis la hindeŭropa. Malnovhinda „*bghava*“, kiu estiĝis same kiel la slava „*bog*“ el hindeŭropa radiko kaj signifis: donanta nutraĵon, riĉecon, havaĵon, povon.

Dio estas tiu, kiu donas riĉecon – malnovĉeĥe „**zboží** – *varon*“.

Práce – *laboro*

Laŭ la „*Vortaro de la skriba ĉeĥa norm-lingvo*“ la nocio „**práce**“ estas utila, celtrafa agado kun certa korpa aŭ anima klopodo. Ĝi plue signifas agadon por akiri salajron – do laborpostenon. Ni diras – „*chodit do práce - iri laboron*“. „**Práce**“ indikas ankaŭ ion, kion oni per laboro kreas. Ni diras: „*Mi submetis doktoran laboron*“.

Por niaj antaŭuloj laboro estis io tute alia. La malnovĉeĥa vorto „**pracě**“ signifis *klopodon, suferon, pezecon*. Kiam praĉeĥoj diris: „*Vidis dio grandan „pracě*“ de sia popolo en Egiptujo“ ili celis diri ke: „*Dio vidis grandan suferon de sia popolo*“. Eĉ ni ĝis nun ripetas sen penso ke: „*Homo laboras al morto*“. Nur pli poste la signifo de la vorto „**práce**“ mallarĝis al *klopodo, peno*, kaj pli poste nur al *farado kaj laboraĵo*.

Tio ĉi okazis ne nur en la ĉeĥa. Rusoj ĝis nun uzas por la nocio laboro la vorton *trud* – io peza, malĝoja, suferiga. Ankaŭ la germana vorto *Arbeit* origine signifis malfacilaĵon, problemon, poste klopodan laboron de kamparanoj kaj fine laboron en la senco, kiel komprenas ni nun. Ankaŭ la franca *travail* havis origine la signifon de sufero. Kaj hungaroj nomas laboron rekte: *munka* – torturo, vorto el la slava *muka* – neeltenebla sufero.

Platit – *pagi*

La *Vortaro de la skriba ĉeĥa lingvo* prezentas ok nociojn de la vorto „**platit**“. „**Platit**“ signifas:

1. ŝanĝi valoraĵon je alia valoraĵo, kutime je mono.
2. Helpe de mono plenumi postulojn.
3. Salajri dungitojn.
4. Premii per monsumo.
5. Suferi je kulpo.
6. Esti valora.
7. Esti konsiderata kiel estimata, esti bone taksata aŭ rigardata kiel krimulo, perfidulo...

8. Esti destinita.

La plej uzata estas la linio 1. – pagi ion per mono.

Moneroj kaj banknotoj estas sufiĉe malfruaj rimedoj. Niaj antaŭuloj negocis kaj bezonis pagi pli frue. Ŝanĝi bovinon je sesdek potoj ne estis ĉiam tre praktike. En la frua mezepoko oni interkonsentis pri objekto, kiu povas prezenti la valoron de interŝanĝata varo. La objekto devis esti utila, valora, havebla, sufiĉe malpeza kaj portebla... niaj antaŭuloj elektis tolon – „plátno“. Tolon oni fabrikis el lino, kanabo aŭ el ŝaflano. La negoco funkciis: mi donos al vi unu bovon, vi al mi tiel longan ŝtofon. Tolo estiĝis ĉe ni la unua pagilo – „platidlo“. Ankoraŭ dum la 10-a jarcento oni uzadis por pago tolajn tukojn.

La malnova praslava vorto havas hindeŭropan radikon kaj ĉeĥa „plátno“ naskis vorton „placní“ – *pago*. Kaj la vortoj „platný“ *valida*, „výplata“ – *salajro*, „poplatek“ *depago*, *takso*, „úplatek“ – *koruptaĵo*, „splátka“ – *partopago*, „odplata“ – *repago*, *venĝo*, „doplácet“ – *pagi la reston*, aŭ *havi problemojn post ia nefavora okazaĵo*, „oplatit“ – *redoni*, *rekompenci* „poplatný“ – *kontribua*, *ŝajnige ŝulda al iu ideo*, *al modo ktp.* ... do, ĉiuj ĉi tiuj kaj pluraj parencaj vortoj devenas el la vorto tolo – „plátno“.

La mondo laŭ Josef Klíma

Magazín DNES, la 30-an de oktobro 2003, Nro 44, jarkolekto XI
ĉeĥa ĵurnalo.

Plano

„Kiu preparis por vi la planon de sukceso?“

Unue mi pensis, ke la junulo ne alparolas min. La demando ŝajnis al mi sensenca.

„Nu, la plano de sukceso. Vi devas ĝin havi, ĉar vi estas fama, ĉu ne?“

„Kia plano?“

„Ne diru, ke neniu skizis ĝin al vi... mi pagis je ĝi centon da miloj!“

Mi ne plu komprenis. Por mi la realo estis simpla: la patro kaj patrino ie trafas kaj donas al vi nur tion, kion ili havas. Poste vi kreskos, studos, kolektos spertojn, tio kostas kelkajn batojn, frapojn de la gepatroj kaj de la vivo mem, sed tio kostas eĉ ne moneron. Do, poste vi dum 30 jaroj ion faras kaj klopodas tion fari plej bone, vi laboras kiel frenezulo kaj se vi havas ŝancon, ke iu pagas je via laboro... neparole pri nervoj, pri malkresko de fortoj, pri konfuzoj kaj eraroj – tion vi certe komprenas: senpaga estas nenio. Sed cent mil! Damne! Je kio? Al mia laborego?

„Mian planon prilaboris dram-verkisto el televido,“ orgojlis junulo „mi pretas esti kantisto.“

„Kian ĝenron vi kantas?“ mi demandis ĝentile.

„Ne gravas.“ Li estis preskaŭ ofendita. „Komence mi serĉas truon en la merkato. Eble onidire speciala programero por gejoj, laŭ la plano de sukceso.“

„Vi estas gejo?“

„Ne, kial?“ Li okulumis. „Grave estas havi araneaĵon. Unu homo altiros vin en destinitan ĵurnalon, alia en televidspektaklon, sed ankoraŭ ne en „Primetin“, ĉar vi devas unue atingi alian homon en preciza momento, kiam la afero bezonas plifortigon per skandaleto. Nu, eble ekzemple ke mi ŝatas infanetojn aŭ mi dormas en la lito kun kaprino.“ Li ekridis: „Kiel alie vi volas akiri sukceson?“

La frosto kisis min. Ĉu mi mem vivas en konfuzo? Ĉu fakte ĉio en la vivo jam longe funkcias renverse? Ne, unue krei ion kaj poste iomete puŝi tion, sed prefere prizorgi sin persone – kaj poste eble eĉ fari nenion? Eble hodiaŭ oni faras tion ne nur en arto, sed en politiko, en ŝtata servo, simple ĉie? Ĉu la samon faras tiu dramaturgo, kiu el tiuj „planoj de sukceso“ por aliaj, kreis propran sukceson? Ĉu tio donas garantion, ke se mi ne sukcesos, oni redonos monon?

„Ĉu via plano funkcias?“ mi demandis.

„Ne tro. Do, mi pensis, ke vian planon konstruis iu pli lerta...“

Mi eksentis kompaton: „Faris,“ kaj mi levigis serioze montrofingron.

„Nu,“ li malgaje klinis la kapon „vi havas kontaktojn... kaj mi... eble mi... ĉu?“

Infanoj edukitaj per televido povas estiĝi „sente simplaj“

„Iu (io) forprenas de la infanoj la mondon kaj donas al ili anstataŭaĵojn“, diras MUDr. František Koukolík. Tiu ĉi fakulo asertas, ke spekti televidon estas danĝero por la animo de infanoj – antaŭlerneĵanoj kaj lerneĵanoj spektu ĝin nur malmulte.

Interla infanoj kreskas perforto. Kie estas ĝiaj radikoj?

Provu ion. Sidiĝu hejme en la loĝejo sur la plankon. La alto de viaj okuloj estas la sama, kiel ĉe infano. Provu imagi, ke via cerbo estas aĝa 1,5 – 2-jara. Vi ankoraŭ ne konsideras vian „mi“. Vi ne scias kiu vi estas, vi ne scias kie vi estas. Vi ne kapablas bone esprimi ion ajn.

La homa evoluo pretigis vin por tempo, kiu regis antaŭ kvarono de miliono da jaroj. Via cerbo antaŭvidas, ke vi venis en mondon ie en Afriko. En tiu via medio estus multo da lumo, koloroj, formoj, sonoj, odoroj... Vi tute ne komprenas, ke vi naskiĝis en dudekunua jarcento...

Vi estas en loĝejo. Vi ne devas palpi multajn objektojn. Sur la planko ne estas herboj kun dekoj da skaraboj, floroj, papilioj, miloj da ĉiuspecaj trankvilaj lumoj, sonoj, gustoj kaj odoroj, sed ebena tapiŝo. Super la kapo ne estas nuboj, arbaj branĉoj kun folioj, sed plafono. Ĉio limigas la cerbon, kiu estis pretigita dum miloj da jaroj por alia medio. Konklude: unu radiko de perforto estas la evoluo de eta infano en medio nenatura kaj malriĉigita de sentaj rilatoj.

Kial sentaj rilatoj estas malriĉigitaj?

Okazas, ke patrino ne koncentriĝas pri la infano. Eble ŝi havas zorgojn, ŝi divorcas. Eble ŝi estas laca kaj deprimita, soleca. Ne havas laborpostenon, aŭ la laboro ne estas bona, malmulte pagata. Same povas kondukti la patro.

Ĉu plej multe mankas amo? Patrinoj, ja, amas siajn infanojn...

Ne ĉiuj, ne ĉiam. La patrino ankaŭ la patro ne amas vin, ĉar ankaŭ dum ilia infaneco neniu amis ilin. Unu aŭ ambaŭ ne eklernis tion. La patrino aŭ patro ne ludas kun vi, ne parolas kun vi, ne instruas vin, ili koncentriĝas pri si mem, ili sidigas vin antaŭ la televidon, ke vi ne ĝenu.

Kio estas tiel danĝera ĉe televido?

Anstataŭ tridimensia natura mondo, kiun oni perceptas per ĉiuj kvin sensoj, eĉ ses (la sesa estas por diferencigo de spaco) kaj al kiu vin la naturo preparis, vi spektos sur la ekrano nur du dimensiojn per nur du sensoj. Vi nesufiĉe moviĝos kaj vi ne lernos infanajn spertojn kaj lertojn. La du dimensioj sur la ekrano estas koloraj kaj bruaj. Neatendite ili ŝanĝiĝas kaj ĥaose intermiksiĝas. Infaneto kapablas kompreni nur koncernajn detalaĵojn. La senco de la tuto eskapas. Infaneto ne komprenas, sed la bildoj konstante allogas lian atenton. Ne palpas, ne manprenas, ne gustumas, ne eksperimentas, ne ricevas proprajn spertojn – ne ludas. Ĝi nur pasive perceptas. La lokoj en la cerba ŝelo, kiujn la naturo preparis por konstruo de kreemaj sistemoj, kadukas. Sur tiuj lokoj la cerbo komencos konstrui aliajn retojn adekvate al la hereda dispozicio, adekvate al konduto de la patrino kaj pliaj anoj de la familio, adekvate al la tempo antaŭ la ekrano, adekvate al la influo de la epoko, en kiu oni vivas.

Kiel tio influos la venontan vivon de infano?

Povas okazi, ke infano dum longa tempo, eble por la tuta vivo havos difektitajn koncentrecon kaj atentecon. Nenio kaptos ĝian intereson. Ĉio estos por ĝi enuo. Ĝi postulos konstante de sia ĉirkaŭaĵo amuziĝon. Ĝi sentos vakecon kaj obsedan bezonon tiun ĉi vakecon plenigi. Kaj urĝe. Sen peno. Ĝi povas esti ĝi homo, kiun oni povas nomi **deprivito***. La danĝero por ĝi kaj por la socio konsistas, dum posta tempo, en plenigo de tiu vako per drogoj, sektoj, perfortoj aŭ krimoj. Precipe, se la medio estas en certa socia tavolo. Granda kaj kreskanta nombro de sente povraj gepatroj, precipe patrinoj, se mi dirus tion malkaŝe – sentemaj vakuloj – komune kun la atakoj de reklamoj, videoprogramoj kaj televidludoj plenplenaj de perforto faras en la homa socio la plej grandan, neŭrobiologian eksperimenton, unikan, neniam konitan.

Ĉu la situacio estas vere tiel danĝera?

Provu enketi ĉe spertaj instruistinoj el infanĝardenoj kaj bazaj lernejoj. Ili diros al vi, kiom da infanoj estas distriĝemaj, nekapablaj koncentri sin. Kiel ili

estas atakemaj aŭ entiritaj en si mem. Ili ne kapablas ludi, sed kantas televidajn reklamojn, imitas murdistojn el filmserioj. Ĉikanas aŭ estas ĉikanataj.

Spertaj instruistinoj diros al vi, kiom da infanoj en la baza lernejo fumas cigaredojn kaj marihuanon kaj ebrias. Ili povas rakonti pri infanoj pli junaj ol 15 jarojn dependantaj de heroino. Pri klasoj, kiuj havas siajn liverantojn de drogaĉoj. Mi opinias, ke iu kaj io forprenas de la infanoj la mondon kaj donas al ili surogatojn.

Kion fari?

Por stiri aŭtomobilon vi devas havi permeson. Por krei infanon vi bezonas nenion. Helpi povas sentema eduko de la frua infaneco al gepatreco. Do, mi opinias, ke ĝis lerneja vizitado infanoj ne spektu televidon, poste malmulte. Iu devas ilin ami. Ili ludu ekstere, en la naturo, se eble. La naturo kreis ilin por tio. Mi tre timas, ke la infana populacio estas en danĝero.

* deprivito – vorto ne estas en PIV, temas pri homo, kiu en frua infaneco suferis per manko de amo, varma homa kontakto, nehavante sufiĉe da konvenaj impulsoj, kiujn oni en sekva vivo uzas en interhamaj kontaktoj. Li estas kruela, sensenta.

Artikolo de la 26-a de junio 1999 en „Příloha LIDOVÉ NOVINY ze světa vědy“ – Aldono de POPOLA JURNALO - el la mondo de la scienco. Verkita laŭ elsendo „Meteor“ de la Ĉeĥa radio por la redakcio de Lidové noviny.

Dum unu horo en fremda haŭto

La titolo iel konfuza, sed vera. Ne temas pri nova televida konkurso, eĉ ne pri sciencfikcia filmo. Nur en Bruselo unu organizo pri homarismo kaptis brilan ideon – montri lude al la civitanoj de EU la sorton de forkurinto. Oni elektas la identecon de la eskapulo el iu difinita lando (eblecoj estas naŭ), ekzemple el Sierra Leone, oni pagas ĉirkaŭ ducent kronojn (7 Eŭroj). Vi venos en ĉambron, kie vi rolos dum unu horo sinjoron aŭ sinjorinon NENIU. Dek ses profesiaj aktoroj traktas kun vi per tubo de mitraleto, per frapoj, vi plenumas montojn da formularoj, ili malŝatas vin, ĉantaĝas, traktas sarkasme, ironie, ofice... nu, kiam vi estas plene humiligita kaj ili puŝas vin en la normalan vivon, vi ankoraŭ povas legi la surskribon adiaŭan: Por vi tio finiĝis post la horo, sed tio ne estas la nura horo por personoj, kiuj devis fuĝi de sia lando.

La ideo estas brila kaj konvenega ankaŭ ĉe ni. Tamen, mi rekomendas malgrandan plibonigon. Cetere ni estas nacio de plibonigantoj, ĉu ne? Mi proponus ne unu ludon, sed serion. La pago por la biletoj estus libervola, sed la partopreno deviga.

Vi demandas por kiu? Ja, tio estas simpla respondo, vi provu diveni, kiu bezonas roli ekzemple la ludon: akiri stirpermeson, kuraci sin je la asecura pago en banloko, peti socialan subtenon, adopti infanon, la hipotekon facile kaj rapide, serĉi loĝejon por juna familio, kiel vivteni sin de pensio, ktp., ktp...

Do, ĉu vi deziras roli, ludi?

KVĚTY – la plej ŝatata semajna ĉeĥa gazeto por la tuta familio

6 / 2002

Ĉefartikolo „Vorto de la ĉefredaktoro“, paĝo 3.

El multe legata ĉeĥa gazeto „Květy“ (Floroj), gazeto por la tuta familio

Ankoraŭ nun estas bone...

Tiu, kiu vidis la filmon „Sep bravuloj“, memoras la drastan anekdoton pri viro, kiu falante de domego, en ĉiu etaĝo aŭdiĝas frazo de titolo. Lastatempe ankaŭ mi uzas ĝin. Ĉar mi loĝas preskaŭ sub „Nusla ponto“ („Nuselský most“ en Prago, tamen tie ne fluas rivero), neniam mi malmemoras observi ĝin, ĉu ne staras tie iu malfeliĉulo... Neniu falas sur min, estas bone... Mi veturas hejmen. Mi eliras el la aŭto kaj atendas amikino. En unudirekta strato kontraŭ mi rapidas kun nekredebla rapideco veturilo kun frenezulo stiranta. Mi flanken saltas kaj diras: „Estas bone...“ Post sekundo denove. Mi vokas telefonnumeron 158 kaj diras, kio okazis, kaj pensas: „Ĉu mi starigu mian aŭtomobilon transverse sur strato por haltigi la danĝeran frenezulon? Ja, en momento devos veni mia amikino kontraŭ li.“ Feliĉe ŝi jam estas ĉi tie kaj la frenezulo malaperis: „Estas bone...“

Matene mi ellitiĝas, ŝaltas la radioaparaton, kaj aŭdas, ke iu frenezulo mortpafis iun ĉe nia angulo. Terura afero, sed: estas bone, ne estis mi kaj neniu el miaj parencoj aŭ konatuloj. Mi eliras kaj venas al la aŭto – la seruro estas iomete difektita, sed funkcias, oni ŝtelis nenion: „Estas bone...“. La sekvan tagon mi aŭdas en la radio, ke oni mortpafis la premieron, mi ektimas, sed: „Estas bone... Li estis de Serbio!“

Ve!!!

Kion plu post mallonga tempo ni akceptos ankoraŭ kiel bone, aŭ preskaŭ bone??? Mi sentas min kiel la viro falanta de domego. Ni falas pli kaj pli rapide, eble tio baldaŭ ne estos bona.

Tamen, male de la viro, ni eble povas ion fari...?

Květy 12/2003, p. 3.

Jiří Vávra „Komenca vorto - Slovo na úvod“

Per sporto al perforto

Kelkfoje dum mi spektas sporton, mi konsideras min kiel civitanon de imperiestro Nerono. La panon nun oni ne donas senpage, tamen la ludoj estas identaj kun la romianaj. Ne gravas, ĉu temas pri futbalo, aŭ alia kolektiva ludo, plejparte regas agresemo. Eĉ en tiu mezuro, ke vico da ŝtatoj havas pli grandajn problemojn ol tiuj kun terorismo. Post Britio, kie oni havas pli severajn leĝojn

kontraŭ „sportamantoj“ ol al rifuĝintoj, en la sama direkto ekiris Francio, Italio kaj vico da aliaj. Ĉe ni, kiel kutime, ni estas iomete ĉe la vosto, kiel ni vidis dum la matĉo de Bohemians. Sed, por ke mi pacigus spektantojn, restas problemo kun la ludantoj mem. Se malfirme teniĝi nervoj de idoloj, „kiel teniĝs la nervoj de „sportŝatantoj“ mem? Do, se ekzemple Koller, Řepka aŭ laste Hašek anstataŭ ludmajstreco vendos emociojn, oni ne povas vidi lumon sur la fino de la tunelo. Cetere, mi ne povas forpreni la impreson, ke se la ĉefa motivo estas mono, la ĝojo de ludo kaj de venko, sento de „fair play“ – de honesta ludo, devas esti deformita. La pruvo, de tiuj ĉi miaj vortoj, ke sporto sen profesiuloj estas brila amuzo, estas por mi la futbala matĉo inter du montvilaĝaj teamoj. Amuziĝas la ludantoj kaj same spektantoj. Tie la plej agresiva konduto estis alvoko de sinjoro Horáček, kiu avertis kontraŭulon, kiu baris per nepermesita maniero, ke en lia vilaĝo ili estas nombraj, kiel miksrasaj hundoj kaj tiel li ne rajtas deŝiri kalsonon de loka ludanto. Spite la malvenko de la lokanoj, ĉiuj foriradis kontente al la patrino, aŭ trinki bieron.

Simple, tiu matĉo estis pli profita, ol ĉiuj profesiaj konkursoj de la mondo. Ĉu mi eraras kaj sporto sen perforto kaj sen paketoj da mono estas malbonvena?

Kvĕty 22/2003, p. 3.
Slovo na úvod (Vorto por komenco), Jiří Vávra.

Malkovro de la jarcento

Botanikisto kaj naturprotektanto RNDr. Jan Čeřovský tiel titolis (iom memironie) sian botanikan rakonton.

Iuj historiistoj kaj agrokulturaj fakuloj asertas, ke se ne estus Ameriko, eŭropanoj jam antaŭlonge formortus de malsato. Per tio ĉi ili atentigas la fakton, ke unu el la plej ordinaraj kultivaĵoj estas amerikdevena. Ĝi nomiĝas science *Solanum tuberosum*, botanike tubera solano, komunlingve terpomo.

Tial ne estas mirige, ke min kaptis senlima sopiro vidi en la natura medio se ne praulojn, do almenaŭ iajn sovaĝajn parencojn de niaj famaj “teraj pomoj”, kiam antaŭ pluraj jaroj mia laboro alkondukis min al scienca kongreso en sudamerika Peruo. La kongreso okazis en luksa somerumeja hotelo ĉe la bazo de Andoj, kio al mi ĝuste konvenis por mia intenco. Eĉ dum la plej densprogramaj internaciaj renkontiĝoj oni povas kelkan tagon “deŝiri” - kaj tion mi utiligis por la realigo de unu el miaj revoj.

Mia amiko profesoro Pedro Cabrera estis de sia organiza funkcio, bedaŭrinde, tiom okupita, ke li sukcesis nur montri al mi en la mapo la teritorion, kie mi povus plej supozeble sukcesi, sed tute klare al mi evidentigis, ke la ekskurso al la terpoma parenkaro estos ago ekskluzive je mia propra risko. La esperdona teritorio estas atingebla aŭ per anhelanta provinca fervojo, aŭ per loka aŭtobusa

linio. Mi ja ne estas novulo en simila entreprenado. Sed ĉiam tio estas certa veto, risiko. Fremdulo kiel unuopulo ne evitos la atenton de ĉi-lokaj homoj, kaj ĝi povas esti diversa, eĉ en civilizita Anglio posedanto de terspaco markita *Strictly Private - Rigore privata* - povas de vi postuli rimarkindan monpunon, se vi ne malcedis la scivolemon vidi, kio al li sur tiu lia herbejo kreskas. En multe pli sovaĝa montaro de maroka Atlaso nerazitaj uloj povas de vi preni tutan monujon, kaj vi eĉ estas kontentaj, ke ili sur vi ne elprovis la akraĵon de tranĉilo, kiun ili al vi vidigis, kiam ili postulis afablaĵon. Sed la indiĝenoj en la submontaro de peruaj Andoj estis entute afablaj. Mi ja vekis la atenton, precipe de infanoj, kiam mi en vilaĝo kun la nomo Guanabacoa elaŭtobusiĝis. Evidente laŭ mia golfpantalono ili min opiniis germano, tial ĉie aŭdiĝis *Tedesco*, ĉu mi protestis aŭ ne protestis.

Pasa enrigardo en lokan restoracion - koncerne ĝian higienan staton - konvinkis min pri la ĝusteco de la decido preni intermanĝon kun ladskatolo da "cervesa" - biero - kune. Tamen mi tiun trinkaĵon ne ĝuis : la plena ladskatolo al mi bone utilis por trankviligi koleregan indiĝenon kun hojo, kiu supre sur la deklivo hojis terasajn kampetojn - pli vere iajn nudelformajn bedojn de maizo. Evidente dum mia supreniro al altaĵoj kun ĝis nun natura vegetalaro mi ĝene eniris en lian suverenan teritorion.

Iam, kiam premas min koŝmaroj, mi sonĝadas, ke mi sen konvena alpisma ekipaĵo aperis, mi mem ne bone scias kiel, sur la supro de iu kruta roko, kaj mi ne kapablas trovi ireblan vojon malsupren. Super la vilaĝo, kiu nomiĝas Guanabacoa, mia inkubsonĝo realiĝis. Eĉ ne sciante kiel, mi suprenrampis sur solecan, de ceteraj rokoj apartigitan formaĵon, ian turon aŭ pilieron. Kiam mi rondiradis relative grandan, ebenan vertan plataĵon, subite mi trovis, ke malsupreniri estos tro malbona afero - ĉie granda krutaĵo. Vi certe povas imagi, ke mi en tiu momento estis neniel gaja. Kondoro, rondfluginta ĝis tiam en respektoplena alto super mi, tamen sufiĉe minace, certe ne subtenis la edifon de mia humoro.

"Nur nun ne panikiĝi," esperigis mi min en la kapo. Tamen mi panikiĝis. Sed pro io tute alia. Kiam mi sur la randoj de la klifo serĉis ian taŭgan ŝancon por la malsupreniro - subite mi ekvidis ilin: kelkajn tufojn de preskaŭ duonmetron altaj herboj, kun fortikaj rektaj tigoj, karakterize partigitaj folioj - kaj en iliaj akseloj kaj ankaŭ sur la ekstretoj de la kaŭloj malriĉaj grapoloj de oranĝe ruĝaj, evidente maturiĝantaj fruktoj - la plej grandaj kun diametro de pli ol du centimetroj. Mi gustumis - kaj la gusto estis agrabla, tute intime konata. Do ne praulo de terpomoj, sed alia ano de la sama genro - *Solanum esculentum*, manĝebla likopersiko - sovaĝa tomato aŭ iu ĝia parenco!

El la febra afekcio unua mi venis en alian kaj en ĝi mi la unuan forgesis. Fervorege mi komencis antaŭ ĉio fotografian dokumentadon. Okaze de similaj ekskursoj mi ĉiam ŝvitigas min kunportante du fotografilojn. Per unu mi faras kolorajn diapozitivojn sur kinofilmon, kaj per la alia nigrablankajn negativojn de pli granda formato sur kartoĉfilmon, en okazo de bezono kaj de eksterordinare

interesa objekto mi ankoraŭ en la alian metas grandformatan koloran inversan. Ĉar tute ne estis klare, ĉu mi ian sovaĝan solanon trafos, kaj dumvoje mi trafis multajn interesajn bildokaptojn, mi konstatis sur la plataĵo, ke jam restas al mi nur kolora diapozitiva *Agfa Professional*, feliĉe tutaj tri kartoĉfilmoj. Ne opiniu, ke ĝi estas facila kaj simpla laboro: elekti taŭgajn bildojn, por sekurigi ilian fokuson profundon fiksi la aparaton al la stativo, ĝuste mezuri eksponon, por detaloj surmetadi interringojn. Mi eksponis ĉiujn tri filmojn kaj tio daŭris al mi plenajn du horojn. Poste mi rememoris, kiel Pedro Cabrera instigis min, ke mi ne forgesu specimeno en okazo, ke mi ion efektive trafos. “En tiuj ĉi regionoj eblas ankoraŭ eĉ diversion atendi, ili estas botanike relative malmulte esploritaj,” eksonis en mia kapo liaj vortoj, kiam li difinis sur la mapo la sferon, kie mi nun operaciis en mia soleca roka posteno.

Mi enbagaĝigis la aparaton, stativon kaj atentege la filmojn, elektis reprezentivan tufon kaj komencis atente elterigi la planton. Kaj tiam mi eĉ estis certa, ke ĉi ĉio fakte okazas en sonĝo.

Terpomo kaj tomato apartenas al komuna botanika genro solano (*Solanum*), kiel mi jam klarigis. Troviĝis diversaj eksperimentantoj, kiuj ambaŭ kultivplantojn strebis krucigi: en tempo sufiĉe freŝdata ankaŭ iuj el niaj “miĉurinanoj”. Rekonu mem, ne estus malbone akiri helpe de kultivado planton, kiu sub la tero fruktas terpomojn kaj super la tero bongustajn tomatojn. Sed neniu sukcesis. Kaj nun imagu plian miraklon: la herbo, kiun mi elterigas, havas sur la radikoj flavete brunetajn lunarkoformajn tuberojn, la plej grandajn kun longo minimume de kvar centimetroj! Ne, sinjoroj inĝenieroj, akademianoj, miĉurinanoj, kultivistoj, hortikulturistoj, ĝardenistoj, konsumantoj, mi ja nun trovis tion, pri kio multaj vane sopiris kaj por kio ili vane luktis. Tie ĉi estas sovaĝa natura tomato-terpomo, kiu, kiam ĝi venos en la manojn de veraj spertaj kultivistoj, estos nova malgranda revolucio en la agrokulturo ... Dio mia, ĉi tion ja oni ne povas nomi alie ol la malkovro de la jarcento !

En la entuziasmo, kun la malkovro de la jarcento en la dorsosako, mi eĉ trovis la vojon de la roka turo suben. Mi sukcesis malsuprengrimpi sur malgrandan plataĵeton kaj ĉe ĝi ekvidi larĝan junton inter rokoj - rokfendon, tra kiu mi subeniris tute komforte. Inter la terasaj kampetoj de la kamparano, al kiu mi dediĉis mian bieron, mi ŝanceliĝis, ebriigita de ĝojo pri la rezulto de la ekskurso, tiel, kiel se mi mem eltrinkus minimume dek tiajn porciojn da biero. Ĝuste kiam mi atingis la lokon antaŭ la restoracio en Guanabacoa, kiu nun fakte skuiĝis de nefalsitaj sudamerikaj ritmoj, venis samtempe la nokto, tia tropika, kiam falas mallumo momente, kaj feliĉe venis ankaŭ la linia aŭtobuso por mia reveturo. Al la kongreso mi revenis pli ol kontenta. Sed la malkovron mi sekretigis. Fine mi regis min, kaj eĉ al la amiko Pedro Cabrera mi diris nenion. La malkovron de la jarcento mi ja devas reteni por mi - kaj konvene ĝin valorigi nur post la reveno hejmen.

La pakado de bagaĝoj kaŭzis al mi certajn komplikajojn: mi ja ne povas vivan vegetalan materialon doni en la manpakaĵon. Doganistoj estas severaj, ankaŭ la reguloj de fitopatologia kontrolo, povas okazi, ke mi ne sukcesos elturniĝi kaj malkovro de la jarcento finiĝos en fitopatologia stacio (ili ja miregus!), aŭ en malpli bona okazo en forĵetaĵujo. Do mi enpakis mian valoregaĵon en la kofron kaj travivis eble la plej maltrankvilan flugon trans la oceano. Ĉiam, kiam ajn mi flugvojaĝas, mi travivas en la cela flughaveno momentojn de streĉita atento, ĉu sur la transportbendo por bagaĝoj aperos en ordo ankaŭ mia kofro. (Eble vi scias ĉi tiun malnovan ŝercon : “Vojaĝu pere de nia aviada kompanio : Matenmanĝo en Tokio, tagmanĝo en Bombajo, vespermanĝo en Londono, kofro en San-Francisko.”) Ĉi-foje, post la reveno el Peruo, mi vere atendis vane.

Kelkajn tagojn venadis konfuzaj informoj kun la nomoj de ekzotikaj lokoj. Trifoje mi eĉ veturis al Ruzyně, ĉar laŭdire la kofro tien jam venis, aŭ venos kiel eble plej baldaŭ. Nenio el tio plenumiĝis. La afero finiĝis post tri monatoj per mizerega asekurelpago - ne nur tial, ĉar la asekuraj kompanioj estas avaraj, sed precipe tial, ĉar mia “malkovro de la jarcento” ja estis genetika materialo kun valoro praktike neelnombrebla !

La dokumentaro - ĝuste venos en la kapon de la atentema aŭskultanto. Almenaŭ la fotografia dokumentaro restis !

Ne, post la amara sperto mi nun ĉiam transportas miajn filmojn sole en la manpakaĵo. Kaj ĉie, kie la flughavenaj kontrolistoj al mi tion permesas, mi elprenas ilin antaŭ tralumigado de mansakoj en flughavenoj, eĉ se oni pri la ekipaĵo kiel ajn certe asertas, ke ĝi estas “*filmsafe*” - do por la filmoj sendanĝera.

Des pli grandan ŝokon mi travivis, kiam la laboratorio el Teplice en Bohemio anstataŭ kun klaraj diapozitivoj resendis al mi miajn kartoĉfilmojn kun ia disŝmirita nebulo kaj malgranda folieto kun klarigo: “Ni bedaŭras, sed viaj filmoj estis evidente rentgenitaj.”

Mi ne povis trovi trafan nomon por la laboratorio, certe tie ili la filmojn fuŝis farante ian eraron dum la rivelado. Ja la sammaniere transportita nigra blanka kaj inversa kinofilma materialo estis tute sendifekta! Mi sendis ĉion kun klarigo kaj dokumentoj al la kontrolo en laboratoriojn de firma Agfa en germania Leverkusen. Ilia analizo estis detala, respondo ĝustatempa, sed absolute nekomprenebla: “Per detala esplorado kaj kontrolado ni evidentigis, ke de vi eksponitaj inversaj kartoĉfilmoj produktitaj de ni ne prezentas ian malperfektaĵon de materialo nek malĝustan rivelprocedon. Ili nepre post la ekspono troviĝis proksime de forta fonto de radiado.” Do restis al mi nur okuloj por plori kaj trudiĝantaj demandoj, kiel tia afero povas okazi dum transporto de poŝtaĵo el Prago al Teplice ...

Ĉi tiun demandon, mi scias, plimalpli nur retorikan, mi levis ankaŭ en Ĉeĥoslovakia botanika asocio, kiam mi tie dum unu el la tradiciaj lundaj prelegvesperoj rakontis pri miaj ĵusaj botanikaj impresoj el Sud-Ameriko. Mi menciis ankaŭ mian malfeliĉan “malkovron de la jarcento”.

“Tamen mi ne malesperas,” mi devigis min al optimismo, “al amiko Pedro Cabrera mi precize priskribis la kreskejon.” Kial mi tion, mi etkapulo, ne faris tuj tiun vesperon post la reveno el Guanabacoa kaj ne lasis la materialon tie, kien ĝi apartenas - en ĝia hejmlando! “Do mi kredas,” mi finis, “ke la venontan sezonon estos la malkovro de la jarcento antaŭ okuloj de la faka publiko.”

Eminenta ĉeĥa botanikisto, profesoro Zdeněk Černohorský, estas dum lundaj kunvenoj de Ĉeĥoslovakia botanika asocio terurulo de la prelegantoj. Jen li pedante ĝustigas neperfektan elparolon de la nomo de aŭtoro aŭ de loko, ne esceptante lingvojn, kiaj estas la islanda kaj la hindustana. Jen li metas ian ŝajne simplan, sed malican demandon, aŭ havas rimarkigon. Ankaŭ okaze de mia prelego li ne ellasis la ŝancon: “Joĉjo, ĉe tiu ĉi via nekredebla historieto, kiun vi al ni ĉi tie rakontis, jam mankas nenio alia, ol ke ĉe via kreskejo nun aperu iu nova vulkano kaj tute tion tie inundu per lafo ...”

Tri tagojn poste venis letero el Peruo. “Ni havis ĉi tie antaŭ du monatoj intensan tertremon,” skribis profesoro Cabrera, “en Guanabacoa disfalis kelkaj domoj kaj estis eĉ mortintoj. Mi supreniris al la rokklifoj precize laŭ via priskribo. Bedaŭrinde, el la tuta rokturo estas nur granda amaso de ŝtonegoj kaj rubo ...”

Diru, ĉu tio ja estas ebla: tia nekredebla ĉeno de la malfeliĉaj hazardoj, kiu neniigis mian malkovron de la jarcento?

De Lubomír Středa, Ĉeĥio

Scienco estas pli interesa kaj amuza ol skandaloj

Intervjuo kun Vratislav Schreiber (nas. 1924 en Prago), kiu laboras en 1-a medicina fakultato de praga universitato de Karlo la 4-a., kunfondinto de Učená společnost (1994) (*Klera komunumo*). La intervjuo aperis en „MF DNES“ (*la plej konata ĵurnalo en Ĉeĥio*), la 15-an de februaro 2003.

Via ŝatata okupo estas popularigo de scienco. Kiel vi vidas sencon proksimigi rezultojn de la scienco al homoj ekster la fako?

La tasko de scienco estas eduki sekvantojn, en homoj oni bezonas vekigi intereson. Plua tasko: ke sciencistoj en ŝtataj entreprenoj montru klare kaj kompreneble al siaj mecenatoj kaj impostpagantoj, kion je ilia mono oni faras kaj kial. Kaj fine la popularigo de scienco povas homojn amuzi kaj oferti

aliajn interesojn ol porno kaj skandaloj. Do, la scienco ludas difinan edukon kaj eĉ psikoterapian rolon.

En kio vi vidas nun la plej grandan pluson kaj la plej grandan minuson de la ĉeĥa medicino?

Granda pluso estas la tradicio kaj atingo de relative alta nivelo dum la lastaj 50 jaroj. En Eŭropo Ĉeĥa respubliko kaj Slovenio estas la nuraj el la postkomunismaj landoj, kiuj apartenas al la plej alta kategorio A. Nur por intereso: sur amerika kontinento apartenas al kategorio A nur tri landoj – Usono, Kanado kaj Kubo. Minuso estas, ke en medicino, laŭ mia eble malmoda gusto, pli kaj pli multe temas pri mono kaj la posteno de kuracistoj kaj malpli pri kuracado de homoj.

Kion vi opinias pri la rajto de malsanulo al plena informado?

Mia opinio estas eksmoda, patreca konduto al malsanulo, laŭ kiu la kuracisto patre respondecas je sia malsanulo, prizorgas lin laŭ sia eblo plej bone. Kuracisto transprenas difinitan respondecon. Onidire tio estas malĝusta. Malsanulo, do, kliento, kiel oni nun diras, estas egalrajta al kuracisto. La kliento devas ĉion scii, sed tio iam damaĝas, se la kuracisto devas komuniki kun li partnere, ne patre. Mi opinias, ke ambaŭ manieroj estas kunfandebaj kaj ĉio dependas de la karaktero de la malsanulo. Iu estas ofendita, se vi ne dirus ĉion, iu svenas... Cetere mankas ekvilibro: la kuracisto ĉiam scias ĉion pli frue kaj pli perfekte ol la kliento-malsanulo.

La medicina etiko atingas ĝis eŭtanazio...

Mi pensas, ke oni ne propagandu ĝin publike, ke ĝi ne estu leĝe permesita, tamen oni devas obei ĵuron de Hipokrato: „Kuracisto ĉiam faru ĉion por la bono de malsanulo kaj ĉion por lia sensufero.“ La ĵuro ne enhavas la devon daŭrigi per artefaritaj rimedoj suferon de malsanulo, sed permesas dignan morton. Se vi donus al civitanoj, precipe nune, kiam regas kruda atmosfero, la eblon de eŭtanazio, vi malfermos la skatolon de Pandora.

Kaj la problemoj de homklonado?

Ĝis nun ne estas pruvite, ke oni povas sukcese klonigi homon, sed estas science pruvite, ke klonitaj bestoj suferas per evoluaj problemoj kaj ili plejparte baldaŭ mortas. Se ni uzos reproduktan klonadon je kuraca utilo, mi rekomendas ĝin malpermesi per leĝo, alivorte: – bredi homajn embriojn nur por terapio. Ja, ĉelojn oni povas konservi el umbilika sango de novnaskitoj kaj el osta medolo. Tiuj ĉi ĉeloj estas al homo propraj kaj ne kaŭzas imunajn problemojn.

Mallongigita.

El „Bildoj el la folkloro kaj tradicio argentinaj“

Laute! FR-47470, N° 141 –
Supplément/Suplemento, majo 1999.

Kokbataloj – Barionuevo, J. Victor

JVB naskiĝis en Bonaerio (prov.Bonaero), 1917a. Profesoro, folkloro esploristo, historiisto, publicisto en lokaj kaj eksterlandaj gazetoj.

De antaŭ pli ol 2000 jaroj, kokbataloj, antikva ludo kaj sporto, ekscitis la entuziasmon de la popolo en Oriento kaj Okcidento. Ĉiufoje kiam la polico dekretas intervenon en senlicencan kokbatalejon, plifirmiĝas la obstina populareco de tiu ludo, kies praktikantoj – oni tion asertas – atingas la nombron da 10 000 en Bonaero kaj 50 000 en la tuta lando.

Senlacaj, persistaj mastroj de batalkokoj vantas pri tio, ke elstaraj personoj de la politika vivo, kiel: **Bernardo de Irigoyen**, parlamentano, Generalo **Lagos**, armeestro, **Hipolito Yrigoyen**, prezidento, ktp. partoprenis la dramecan amuzon de la kokbatalejo, kaj ili sopiras pri tiuj ne tiel foraj tempoj, kiam la kokbatalaj centroj de la lando havis organon, la gazeton „Kokeriko“.

En 1953-a iu punjuĝisto verdiktis, ke ĉe la kokbataloj ne ekzistas delikto, sed la sekvintan jaron bestprotekta leĝo difinis la prohibon kaj la punon por leĝrompintoj: enkarcerigo ekde 15 tagoj ĝis unu jaro.

Antikva deveno. Oni certigas, ke kokbataloj kun spektantoj komenciĝis en Hindio, el kie ili certe estis enkondukitaj en Ĉinion, Hinduĉinion, Malajzion, Indonezion, Persion, kaj en Okcidenton en la 7-a jarcento antaŭ Kristo. En Greklando la ekzempleroj de Tanagro kaj Rodiso estis tre famaj. Ateno periode efektivigis tiuspecan batalon, kaj kiel simbolon de la helena kuraĝo ĝi metis la bildon de la koko sur siaj moneroj. La Romianoj adoptis la amuzon, kiu disvastiĝis tra Eŭropo, kaj la Araboj enkondukis en Andaluzion la kokojn el Meda raso, originaj el la Irana altebenaĵo.

Oni ne tute certe scias, ĉu la kokbataloj alvenis al Hispanameriko el Andaluzio, Kanarioj, aŭ el Filipinoj en Meksikon.

Sed vere ili rapide disvastiĝis en la plej gravaj urboj. En la 17-a kaj 18-a jarcentoj oni konstruis memorindajn kokbatalejojn en Meksiko, Havano, Limo, Santiago kaj Bonaero.

En Bonaero (1767) oni instalas la unuan kokbatalejon, far S-ro Alvarado. En 1781-a S-ro Manuel de Basavilbaso petis de la reĝo Vértiz rajtigon por instali kokbatalejon, benefice de la Orfejo, tio estis akceptita de la registro. La vetoj ne povos superi po 25 pesojn por ĉiu kaj ili lasos al la ŝtata kaso po duonrealo por ĉiu peso. En 1785-a Manuel Melian, menciita en la Magistrataj Aktoj kiel „fondinto de la kok-amuzejo“, ekhavis la licencan de tiu „publika batalo“ por tri jaroj, poste plilongiitaj ĝis 5 po 160 pesoj por ĉiu jaro, kiuj eniris la ŝtatan kason. La magistra ĉefpedelo oficos kiel arbitracianto, kaj la monpunoj de li aplikitaj estos destinitaj al la subtenado de la prizonuloj.

En 1800-a la Kordoba Magistrato liveris la licencan de la kokbatalejo por 5 jaroj, aŭkcie je la pej bona proponanto. Tio estis s-ro Fernandez po 200 pesoj por ĉiu jaro. Post dek jaroj la kosto de la licenco altiĝis al 230 pesoj.

La abolo. Generalo O Higgins prohibis la kokbatalejon en Ĉilio kaj en Limo, la Protektanto de Peruo, Generalo San Martin, argentinano, prohibis ilin en 1922-a. Kvankam en la Unuiĝintaj Provincoj (22) Prezidento Rivadavia proponis la abolon, la bataloj plu daŭris kun amasa spekantaro.

Sed leviĝis ankaŭ malaprobaj voĉoj, ekzemple tiuj de gazeto „El Centinela“ („Gardostaranto“) en 1823-a, en artikolo titolita: „Areno de Kokoj“ atentigas la aŭtoritatulojn pri la amuzo, kiun oni ne devas toleri en civilizita kaj morala lando. La sama motivo por forigo de la areno de Taŭroj instigas nun kontraŭ tiu de la kokoj, kaj ekzistas plia motivo: „Krom ŝoka spektaklo, ĝi spronas la pasion de la vetado, kiu havas perturbojn en la personaj havoj. Amuziĝi per la turmentado al besto estas la unua ŝtupo en la disdegno je la homa sango.“

Tiumaniere oni daŭrigis, efektivigante kokbatalojn kaj vetludojn, jen en rajtigitaĵoj jen en eksterleĝaj stabloj.

Anglaj vojaĝantoj, kiel Haaig kaj Kapitano Head, observis ke en Mendoza 1827-a – oni fervore organizas kokbatalojn, kaj eĉ la klerikoj proponas vetojn.

En 1864-a ankoraŭ plu daŭris en Bonaero pluraj kokbatalejoj, rajtigitaĵoj per jara licencoprezito de 5000 pesoj. Kelkaj disponis pri sidŝtuparo, balkonoj, bufedejo, kaj aliaj komfortaĵoj.

En 1891-a por plenumi la Bestprotektan Leĝon, tiuj spektakloj estis definitive malpermesitaĵoj en nia lando; spite tion, la bataloj plu disvolviĝis eksterleĝe.

Reglamentoj kaj spertoj. La disputoj, foje kun fatalaj sekvoj, devigis la redaktadon de skribita reglamento, kaj la intervenon de arbitracianto. La Reglamentoj Kordobo 1813, Katamarko 1879, Sanĥuano 1871, Bonaerio 1903; ĉiuj montras komunan fonon prenitan el universalaj normoj kaj tradicioj. Tiu sama sperto koncernanta ankaŭ la preparadon de la birdoj, estis kolektita en vasta bibliografio, kies universaleco evidentiĝas per katalogo kuŝanta en la argentina Nacia Biblioteko, kaj titolita: „La plej kompleta kolekto de kokbatalaj libroj“, kaj enhavas 11 titolojn en la germana lingvo, 11 en la hispana, 5 en la franca, 3 en la nederlanda, 1 en la itala, 15 en la angla, 10 en la portugala, 1 en la rusa. Ankaŭ en nia lando oni verkis kompletan traktaton: „Kokbataloj“, en 1903-a.

La kokbataloj. La Kanarianoj estas la plej famkonataj bredistoj de batalkokoj en la mondo. Laŭ ili, koko devas posedi jenajn kondiĉojn: vundiva per siaj ergotoj, kolera dum la batalo, evitema pri frapoj kaj atakoj de la kontraŭulo, kaj atakema kun rapido kaj viglo; ĝi devas batali ĝismorte; krom tio, se ĝi senkapabliĝas pro ricevitaĵoj vundoj, malgraŭ tio ĝi ne devas ĉesi alfronti la batalon, kaj eĉ pli: ĉar en ĉiuj okazoj, evitante la batalon aŭ fuĝante, ĝi demonstrus sian malbonan kvaliton.

Tiuj elstaraj ecoj aperas en certaj rasoj: ekzemple la Malaja, kun grandaj pezo kaj forto; la Hispana, kun hoka beko, longaj kruroj; la Belga, altkreska kaj forta. La angloj faris selektadon de skotaj kaj irlandanaj rasoj, kaj ekhavis notindajn ekzemplerojn.

Por ekhavi bonan rason, la bredisto komencas, elektante por la pariĝo junan kokinon - fratino de la batakoko kun aroganta talio, hardita en bataloj, kun kompakta plumaro kaj senskvamaj kruroj, kaj kiu ne estu parence ligita al la virkoko. Je la eloviĝo de la kokidoj la kokino ricevos bonan ĉiutagan porcion de „supo kun pano kaj vino“. Ĉirkaŭ la aĝo de 10-12 monatoj, la kokidoj atingas alton da 50 cm, kaj pezon 4 aŭ 5 kilogramoj. Oni tenas ilin en individuaj kaĝoj el kano, kaj malproksime de ĉiu alia koko. Ili trejnas ilin en provoj, ŝajnbataloj kaj kuroj, banoj de suno kaj koto, sur areno trejna de kribrita tero kaj seĝaĵo, ĉirkaŭita de latbarilo 1-metron alta. Por provi ilin, oni kovras la ergotojn per tanita ledto, kaj konkurigas ilin kun koko de malsupera kvalito. Se la kokido estas vundita, oni lavas la vundon per brando, aŭ laŭ la kutimo de kelkaj bredistoj, per miksaĵo de urino, oleo kaj salo.

Je la aĝo unujara, al la juna koko oni tranĉas la kreston, kaj razas la haretojn ĉirkaŭorelajn. Kiam ĝi ŝanĝas la plumaron, 2-3 monatojn poste, ĝi estas taŭga por prezentiĝi ĉe la batalejo.

La plena batalvivo ampleksas 5-6 jarojn kaj ĝia ekonomia rendimento 5 ĝis 10 000 pesoj.

En la tuta lando ekzistas ĉirkaŭ 600 000 batakokoj, kiuj tenas la spekulacian esperon de siaj mastroj.

La kokbatalejoj. Certe oni povas improvizi ĝin sub ĉiu arbo, sed tamen ĝi ĝenerale havas determinitajn instalaĵojn; rondo el 3 ĝis 7 metroj da diametro, ĉirkaŭita de barilo el tolo, latoj, kanoj, 80 cm alta, iom aperta supre; ĝi havas 8 ĝis 10 ringojn aŭ palisojn, por ligi la kokojn antaŭ la komenciĝo de la spektaklo. Ĉirkaŭe troviĝas la sidstupoj por spektantoj kaj la prefera loko, la seĝo de la arbitracianto. Pli fore, la kaĝoj, en kiuj oni tenas la kokojn antaŭ la batalo.

En malsamaj epokoj oni prohibadis la batalojn eskster la rajtigita batalejo, kaj la entreprenoj pagis licencon al la registaro, kun la devo teni la higienon de la loko kaj la komfortaĵojn por la spektantoj, pesilojn, tondilojn, kaĝojn ktp. kaj kompanse ili rajtis postuli unu realon da enirmono.

Arbitracianto. Li prizorgas la ordon, la justecon kaj la disvolvon de la spektaklo; ĉe lia mano oni deponas la vetmonon.

En kelkaj provincoj la arbitracianto estas nomumitaj kaj salajrataj de la registaro. La arbitracianto ne povas veti mem, nek per, nek por alia persono.

La vetoj. Oni povas formuli ilin skribe kaj ratifi ilin en la ĉeesto de la arbitracianto, kaj ĉe la manoj de ĉi-lastaj oni deponas la monon.

La arbitracianto deklaras detale la kondiĉojn de ĉiu batalo, ĉu portempa, ĉu ĝismorta, ĉu kun naturaj ergotoj, ĉu kun bronzaĵaj ergotumoj; ekzamenas la batalontojn, iliajn ergotumojn, konstatas ilian pezon, kaj esploras kiun ajn trompon, kutiman en tiaj cirkostancoj. Post la fino de la vetoj, la arbitracianto ordonas per frapo de sonorileto la silentiĝon de la publiko kaj la liberiĝon de la konkurantoj, kaj tuj komenciĝas la batalo.

El la libro: Paŝoj al plena posedo - William Auld

La Psalmaro

Kiam Anna-Klara en sia sepa jaro vizitadis la unuan klason, iun tagon ŝi petis de mi psalmlibron.

„Kial?“ mi demandis.

„Ĉar ankaŭ Gustavo havas.“

„Povas esti, sed mi neniam aŭdis, ke tiel etaj knabinoj havus psalmaron.“

„Sed ankaŭ Gustavo havas.“

Kion fari? Mi iris aĉeti psalmaron.

Mi trovis multe da diversaj psalmlibroj, malgrandajn, belajn librojn kun mola bindo, orkadraj paĝoj kaj ankaŭ grandajn librojn kun belaj, simplaj literoj. Mi aĉetis, kiu estis malplej kosta, por ke infano bontempe lernu la ŝparemon, precipe en tiaj seriozaj aferoj.

Mi skribis la nomon de Anna-Klara en la libron kaj posttagmeze transdonis ĝin al ŝi. Ŝi ege ekĝojis, prenis la libron kaj diris: „Ĝi estas ĝuste tia, kia tiu de Gustavo.“

Mi eksidis kaj iomete meditis pri la okazintaĵoj, kaj poste – la dioj pardonu min – mi iris al la pordo kaj enokulumis tra la ŝlosiltruo.

Anna-Klara staris meze de la ĉambro, antaŭ la granda spegulo. Kun la malfermita psalmaro ŝi kantis falsvoĉe. De tempo al tempo ŝi rigardis al la spegulo, ĉu ŝia zono bone kuŝas? Kelkfoje ŝi ordigis sian harplekton, kelkfoje glatigis ĉifon sur la robo, kiu ne estis bonorde sur ŝia ŝultro.

Subite mi surprizis ŝin per pordmalfermo kaj eniris: „Kara Anna-Klara,“ mi diris, „psalmaro estas io multe pli serioza, ol vi imagas. Oni ne staras antaŭ spegulo por kanti el psalmaro. La psalmlibro ne estas por ludi per ĝi. Kiam vi estos pli aĝa, la instruist-onklino klarigos al vi, kio estas esence psalmaro.“

Anna-Klara sidis serioza kaj silenta. Ŝi rigardis sincere al mi kaj decidvoĉe diris: „Mi volas diri al vi nur unu aferon: Oni ne eniras ĉambron antaŭ ol frapi.“

Mi ne kredas, ke Anna-Klara estas jam matura por religiaj problemoj.

Hasse Z.

El la sveda: Andreo Gauder

Ekzercoj

Leginte la supran rakonton, respondu jenajn demandojn:

1. Kial Anna-Klara deziris ricevi psalmlibron?
2. Kiajn psalmlibroj trovis sinjoro Z., kiam li iris aĉeti?
3. Kiun libron li aĉetis?
4. Kial li elektis ĝuste tiun?
5. Ĉu Anna-Klara estis kontenta pri la libro? Kiel vi scias?
6. Pro kio sinjoro Z. petas, ke la dioj pardonu lin?
7. Kion faris Anna-Klara en la ĉambro?
8. Por kiu celo sinjoro Z. interrompis ŝin?
9. Ĉu li sukcesis pri tiu celo?
10. Kiel Anna-Klara sukcesis malpravigi sinjoron Z.?

Jen estas kelkaj respondoj. Skribu la faritajn demandojn:

1. Sepjara.
2. La unuan.
3. Gustavo.
4. La nomon de Anna-Klara.
5. Posttagmeze.
6. Tra la ŝlosiltruo.
7. Falsvoĉe.
8. Por vidi, ĉu ŝia zono bone kuŝas.
9. Kio estas esence psalmlibro.
10. Oni frapas.

Per finaĵo –n korektu jenajn frazojn tiel, ke ili havu signifon:

1. Anna-Klara malfermis la psalmlibro.
2. Ŝi ekkantis per laŭta voĉo psalmo.
3. La unua klaso vizitadis Anna-Klara.
4. Psalmaro havis ankaŭ Gustavo.
5. Posedis psalmlibroj Gustavo kaj Anna-Klara.
6. Ĉio pri la afero klarigos la instruistino.
7. Multaj aferoj la knabino sciis, kaj multaj ne sciis.
8. Pri la problemoj ekzistas diversaj solvoj, kiuj oni devas pripensi.
9. Aferoj interesaj kaj strangaj oni trovas, se oni legas tiu libro.
10. Komprenas la problemoj nek li nek mi

Ĉiu el la subaj propozicioj povas alpreni du signifojn, depende de la finaĵo –n. Skribu ambaŭ signifojn de ĉiu.

1. La instruisto alparolis la lernanto.
2. Vizitis la onklo la modesta knabino.

3. Li multfoje pardonis la frato, sed li neniam pliboniĝis.
4. La iama amiko li ne rigardis.
5. Kaptis ni timata malamiko.

La suba propozicio povas alpreni eĉ kvar diversajn signifojn, depende de –n.

Rigardis vagulo malsata hundo.

Sube estas dek substantivoj. Adjektivigu ilin kaj uzu ĉiun senerare en propozicio:

Truo, dio, esenco, robo, problemo, ludo, klaso, onklo, spegulo, ferio.
Ekzemple: metropolo – metropola bruego unue timigis lin.

Mi enokulumis tra la ŝlosiltruo. *Uzu korekte jenajn vortojn kun –UM:*
Proksimume, saĝumi, akvumi, orumo, mondumo, mondumeca, plenumi, amindumi.

Skribu konversacion, kiu povis okazi inter sinjoro Z. kaj la librovendisto, kiam Z. iris por aĉeti al Anna-Klara psalm-libron.

Pridiskuto -

novelo de Dmitrij Cibulevskij

„... Kaj peza metala pordo brufermiĝis malantaŭ li“ – mi finlegis la verkon kaj ekkunmetis ĉiujn dismetitajn surtable paperojn kun printita teksto.

Ekregis silento.

„Mi petas la aŭtoron ne ofendiĝi. Al mi tre plaĉis la verko.“ Tiel komencis sian parolon mezaĝa viro, kiu jam verkis plurajn romanojn kaj estis konsiderata eminenta verkisto. „Estas bone prezentitaj ne nur la ĉefaj herooj, sed ankaŭ la duagradaj. Mi plezure atentis la priskribon de la naturo. Tiel ĝin prezenti povas aŭ vera specialisto, aŭ persono, kiu ‘amikas’ kun ĝi, ofte ĝin vizitas ĉu turisme, ĉu por kolekti fungojn, ĉu simple por ripoze promenadi. Sed al mi ŝajnas, ke la verko kvazaŭ ne estas finita. Mi persone la finon de la verko ne eksentis. Ĉu la aŭtoro ne emas ĝin daŭrigi?“

„Jes, jes,“ aldone enmiksiĝis tre juna viro, kiu, ŝajne, simple emis ion diri. „En la verko la eventoj evoluis tre malrapide, sed jam preskaŭ fine estis sentebla tuja finalo. Kvazaŭ la aŭtoro ne havis tempon por pli bone pripensi ion por la finaj paŝoj.“

Komencis paroli iu jam ne juna viro, kiu ŝajne tute hazarde trafis en tiun kompanion: „Mi ne estas specialisto pri literaturo, sed mi bone orientiĝas en medicinaj aferoj. Ie en la teksto mi rimarkis jenan frazon: ‘Bonvolu doni vian

manon, mi kontrolos la pulson... La pulso estas en normo. Ĉu vi mezuris la temperaŭron? – Jes, ĝi estas 38,4... Ĵ Permesu ekspliki. Se la temperaturo plialtiĝas je unu grado, la pulso hastiĝas je 10 korbatoj. Ĉiuokaze la koro faras 94-100 korbatojn (se la temperaturo estas 38,4-39,0). Mi uzus 96 korbatojn. En normo la koro faras 70-80 korbatojn. La kuracistoj skribas ĉiam parnombran kvanton da korbatoj: 72, 80, 96, 120... Laŭ mia opinio, la teksto multon gajnus ankaŭ dank' al medicine kompetenta teksto.“

Maljuna kalva, sed ege samtempe fama verkisto ne restis flanke de la pridiskuto: „Mi... komprenas emon de aŭtoro sin prezenti. Tion vi sukcesis. Mi konsentas kun la antaŭe parolintoj – la verko ne estas malbona. Sed mi volus atentigi – bonvolu uzi laŭeble pli da vortoj. Sufiĉe ofte mi aŭdis en la teksto la ripetadon de la samaj vortoj, samaj esprimoj. Serĉu sinonimojn... Tio prezentus la verkon en multe pli bona varianto. Pli ofte rigardu diversajn vortarojn... Krome, mi ĉiam negative rilatas al fiaj frazoj en teksto, en ajna teksto. Ofte tiujn oni metas simple por iom longigi la verkon. Ankaŭ ĉe vi mi rimarkis interesajn ĵperlojnĵ. Mi speciale aŭskultas la legadon kun krajono enmane. Do, kiel eblas kompreni:

- Ø ... lamante ekiraĉis al la fenestro...
- Ø la hundo rigardis al la viro kun granda miro...
- Ø kun fia rideto ŝi respondis rifuze
- Ø amaraj sentoj post dolĉa vespermanĝo...

Mi supozas, tiujn frazojn nepre necesas eviti, anstataŭigi per iaj aliaj. De tio la verko nur gajnos.“

„Kaj al mi ŝajnas,“ daŭrigis la parolon relative juna virino, kiu plejparte estis fama pro siaj versoj, „en la verko abundas enlitaj momentoj. Mi komprenas, ke nun tiel nomata cenzuro kaj cenzuristoj ne plu estas, sed necesas ja ankaŭ iajn elementajn normojn de moralo regi. Per niaj verkoj ni edukas ankaŭ nian junularan, junan generacion.“

„Multe ili bezonas literaturon“, replikis alia neaĝa virino. „Kie vi vidis nun vere legantan junularon? Ili ne legas eĉ klasikan literaturon, ne legas eĉ tion, kion ili devas legi laŭ la lernejaj programoj...“

„Ne, ne. Temas eĉ ne tiom pri la enlitaj momentoj, kiel pri ties prezento. Kvazaŭ la aŭtoro...“ alia ne tiom juna virino svingis sian brakon.

„Min iom mirigas la pacienca ĵkunvivadoĵ de perfekta prezentita bildo de amsentoj, kiujn bone prilumis la aŭtoro preskaŭ komence de la verko, kaj la supre menciitaj enlitaj momentoj. Estus bone rerigardi kaj renormigi tion. Kompreneble, ni povas nur rekomendi...“

„Do, bone,“ kvazaŭ sumigis la pridiskuton eble la plej aĝa el la ĉeestantoj, vere eminenta literaturisto, ĉefe famiĝanta pro siaj prozaj verkoj, iasence „patriarko“ de la landa literaturo. „Mi atente aŭskultis ĉies parolojn kaj provos fari ian konkludon. Mi opinias, ke povas esti, ke ĉiuj parolintoj pravas. Sed tutegale tio estas nur personaj opinioj de la parolintoj. Entute ni povas juĝi, ĉu

bonas aŭ malbonas la verko, nur kiam la legantoj disaĉetados la librojn. Kaj laŭ poste aperontaj recenzoj. Certe la saĝaj...“

Monato, 2002/11.

El la libro „Vivo de Andreo Cseh“

de Ed Borsboom – IEI Hago – Nederlando, 2003

Neatendite en Svedio la stelo de Andreo Cseh komencis rapide leviĝi. De tie lia famo subite ekrondiris la esperantan terglobon. Oni vidis lin konkeranto de kontraŭuloj, verdstela ambasadoro ĉe aŭtoritatoj, instiga inspiranto de jamaj esperantistoj, kaj lastvice sed ne lastrange sorĉa instruisto, kiu malvane altiris nekredeblajn nombrojn da homoj. Li venis, (g)vidis, venkis. Tiun procezon certe akcelis ankaŭ la publika informlaboro de kompetentaj svedoj, inter ili Sam Jansson kaj Ernfrid Malmgren, kaj la prestiĝo de aliaj kapabluloj, inter ili Collinder, Dahl, Lindhagen, Nylèn.

En la norda lando multiĝis la voĉoj, kiuj premis Cseh por efektivigi du aferojn: unue publici sian kursan tekston, due lekci pri sia metodo por krei samspecajn instruistojn. Cseh ne tre emis eternigi sian materialon en libro. Laŭ li la konversacio ne fikseblas, ĉar ĝi dependas de loko, tempo, lernantoj kaj eventuale de instruanto. Lia propra konversacio neniam egalas al la ĵus farita antaŭa. Tion pruvis nigro sur blanko kelkaj fervoruloj, notantaj vorto post vorto la lingvaĵon de du-tri kursoj. La enhavoj atentinde malsimilis, malpli rilate la gramatikajn erojn ol rilate la radikstokon. Krome Cseh eble timis, ke amatoroj kun presitaĵo en la mano simple komencos instrui Ĉe-metode kaj pro nekupto de ĝia spirito diskreditos ĝin. Cseh ĉiam substrekis, ke oni devus foje ĉeesti lian didaktikan demonstracion. Cseh jam pensis ankaŭ pri neglekto de kopirajto.

Grava motivo por nepublikigo estis probable anatemo pro kelkaj malglataĵoj en la uzo de vortoj aŭ gramatiko. Ekzemple Cseh enkondukis simpligon de la signifo ĉe la paro „ami - ŝati“. Li rezervis por „ami“ tiun specialan korinklinon al iu, „mi amas la knabinon“. Laŭ li oni ne povus diri „mi amas kafon“. Se io aŭ iu plaĉas al persono, oni uzu „ŝati“. „Mi ŝatas kafon“, ankaŭ „mi ŝatas knabinon“, sed tio lasta estus korekta nur, se vi havus pozitivan opinion pri ŝi. Tiu Cseh-a apliko disvastiĝis en Esperantujo kaj enradikiĝis. Lia difinado, kvankam ne ĝisoste zamenhofa, ŝajnas al mi tute akceptebla.

Kreskis debato pri jes aŭ ne rilate preson de la kurso. Kelkaj elektis la flankon de Cseh, argumentante ke la metodo estas esence buŝa kaj ne povas esti enlibrigita. Tamen oni verŝajne kun la aŭtoro iel – ne ekzistas fontoj – akordiĝis. Estis surpaperigita kaj eldonita la kurso en 1929 en Stokholmo. Tiun publikigaĵon mi indikos per „la sveda kurso“. Ĝi tiam kontraŭvole al Cseh rapide fariĝis la modela Ĉe-kurso, kiun poste ankaŭ Internacia Esperanto-Instituto en regulaj eldonoj reproduktis. Sed la provizoran karakteron la kreinto ĉiam akcentis pere de sistemo de ciklostencilado anstataŭ de normala preso.

1. Murdo en Verkeerdekeelgatschietbaanlaan

La 6-an de majo 2002, Kaloĉaje kalva elegantulo forlasis la radiostudion Kanaal Banaal sub Verkeerdekeelgatschiebaanlaan 66, en la kompanio de Erwin Tastl, redaktoro ĉe Internacia Esperanto-Asocio. Post du paŝoj, la kalvulo kolapsis en flako da sango. Pli sensante ol aŭdante pafon, Tastl turnis sin reflekse. Sed tro malfrue: ĵus embuskinte nur du metrojn for, la ŝtrumpmaskita pafinto jam trasagis la larĝan avenuon, kaj fulme foruliĝis je la transa flanko. Restis post li pulvaodoro, fontana ŝpruco de sango kaj, ĉe la redaktoro, ia impresado de tamena konateco: tiuj rapidaj movoj, tiu supla kurado...

Erwin Tastl genufalis apud la viktimon.

- Mijnheer Fonteyn...-

- En la mondon... - stertoris la horizontulo - venis mi, Fonteĵno...

Poste, nur silento. Paŝoj el studio, alkuroj, ŝrikoj, sirenoj, bremsadoj. Ambulancistoj despere provis sian plejon sur Fonteyn, kvazaŭ la volo vivigi homon povus esti pli forta ol la volo lin mortigi. Kameraoj surlokis en rekorda tempo, kaj Kannal Banaal eksprese rekonis la endecon de neprogramita elsendo.

Fortika uniformulino petis la redaktoron sekvi ŝin al policaŭto. Ĉe ŝia impona talio, deĵorpretaj revolvero kaj mankatenoj senbezzone substrekis la inviton. Kvin minutoj da sandviĉeca veturado inter la imponulino kaj ŝia surinama kolegego konjektigis al la ĵus eksjuna aŭstro ke ne konvenos insisti pri Esperanta interpretado. Ricevinte plastoglason da kafo en la policejo de Veerkrachtsplein, li baldaŭ komencis sian depozicion en la lingvo de John Wells kaj Bill Gates.

- Ĉu vi povas diri al ni kial vi ĵus troviĝis en kompanio de sinjoro Grimm Fonteyn?

- Ni estis invititaj, li kaj mi, al tiu Kannal Bacchanaal...

- Kanaal Banaal...

- Jes, Kanaal Anaal, por duope debati pri la eŭropa lingvopolitiko.

- Pri kio?

- Lingvopolitiko. Imagu, post la aliĝo de dek pliaj landoj al Eŭropa Unio la kvanto de ties oficialaj lingvoj kreskos al dudek unu kaj duono, kio rezultigos

kvarcent kvardek kaj tri kvaronoj da eblaj lingvokombinoj, kaj tio altigos la tradukajn kostojn en Bruselo per ducent tri procentoj. Internacia Esperanto-Asocio opinias ke la sola maniero trovi por la lingva problemo finan solvon...

- Finan solvon?

- Nu, finan venkon... Ne grave...

- Do, vi malkonsentis kun sinjoro Fonteyn kaj volis finan solvon...

- Kompreneble, ni malkonsentis, ĉar s-ro Fonteyn opiniis ke la angla lingvo jam praktike venkis, dum mi pensas ke eĉ se la nederlanda lingvo relative bone fartas, ekzistas minacoj...

- Minacoj? Ĉu vi scias pri konkretaj minacoj...?

- Nu, evidente. Lastatempe oni parolis al mi, ekzemple, ne plu pri kaŝpafisto, sed pri snajpero...

- Oni parolis al vi lastatempe pri kaŝpafisto?...

- Ne, ne: pri snajpero...

- Dankon, sinjoro, por nun sufiĉas. Vi komprenos ke ni devas teni vin en provizora aresto. Sinjoro Tastl, vi estas suspektata pri murdo de s-ro Grimm Fonteyn.

El la libro „Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio“

de S.Kamarýt 1983

5.26.8. Atingo kaj resonado de elsendoj

La ĉeĥoslovaka radio montris ĝis tiu tempo la plej grandan komprenon por esperantlingva informado, el ĉiuj radiostacioj de la mondo. Ĝi uzis Esperanton laŭ pli granda skalo ol la lingvojn polan, germanan kaj ok aliajn, en kiuj ĝi ankaŭ elsendis. Afero senkompara en la historio de Esperanto. La gvidantaro de la mallonga elsendo en decembro 1946 decidis jene pri la rangvico de la uzataj lingvoj: 1-a la angla (60 minutoj), 2-a la franca (60 minutoj), 3-a la rusa (60 minutoj), 4-a Esperanto (40 minutoj), 9 pluaj lingvoj kun 30 aŭ 15 minutoj.

La radio-estraro alte aprezis la rolon de la Esperanto-elsendoj. Laŭ la Jarlibro de la Ĉeĥoslovaka Radio el 1938, venis 3085 aŭskultant-raportoj el 29 landoj. La postmilitaj libroforme aperintaj raportoj pri programaj konferencoj de la Radio substrekas la utilon, kiun la apliko de Esperanto donas al la ŝtato: „Eminenta propaganda laboro de la Esperanto-elsendoj“; „Eksterordinare varma intereso de eksterlandaj esperantistoj pri nia respubliko“.

Okazis unuafoje, ke la Ĉeĥoslovaka Radio estis reprezentita oficiale en la internacia konferenco „Esperanto en moderna vivo“ (Parizo 1937) pere de

reĝisoro J. Bezdíček, dum J. V. Šamla reprezentis tie TRAKT. Unuafoje okazis ankaŭ interŝtataj transprenoj de Esperanto-programoj (1937). La ministerio por informado konstatis en letero (1947-07-16): „La mallongonda Esperanto-elsendo estas la unusola ĝuanta iom grandan resonon el eksterlando.“

Ĉeĥoslovaka civitano d-ro Augustin Pitlík estis la unua homo en la mondo, kiu plenumis la radioelsendon **en** Esperanto, dum la pli fruaj (Usono, Anglio) estis nacilingvaj **pri** Esperanto. Unuaecon havas Ĉeĥoslovakio ankaŭ en la elsendo de artverkoj, inter ili operoj, kaj en la ĉiutageco de la elsendoj. Unuafoje okazis, en pluraj landoj, organizita kolektiva aŭskultado al la „Esperanto-voĉo“ de Prago. Eĉ fremda ĵurnalo transprenis informojn elsenditajn el Prago en Esperanto (ekz. „Ostgöten“, Svedlando, 1947-03-28).

La aŭskultantoj havis varman kontakton kun la Esperanto-radio en Prago. Unu letero anstataŭanta ĉiujn: „Ĉiutaga kontakto kun Ĉeĥoslovakio estas por mi tute natura kompletigo de la tago.“ Lennart Åberg, Svedlando, 1946-10-11. Aŭskultkonfirmiloj venis el 32 landoj.

Interesa estas ankaŭ la jena cirkonstanco: la bona prononcado de Esperanto en nia Radio influis grave la prononcmanieron de eksterlandaj aŭskultantoj. Studento en Oxford K.L.Strong (1947-05-10) sciigas: „Vi ĉeĥoj parolas tiel mirinde klare, ke estas ĝojo aŭskulti vin.“ Alia angla aŭskultanto komunikis, ke ofta aŭskultado el Prago ebligis al li fari sukcesan ekzamenon pri fonetiko en Esperanto.

El la libro „La kormoranoj ankoraux ne revenis“

Nándor Gion

traduko László Huszár, eldonejo KLEKS, la KANCERKLINIKO, 1991.

„Vi povas veni kun ni, se vi volas,“ diris mi. „Sed ni rapidu, ĉar baldaŭ komenciĝos sunsubiro.“

J.Burai eĉ nun ne komprenis, pri kio temas, tamen li akompanis nin. Ni iris reen apud la rivero. Malantaŭ la fragmitaro ekflugis birdoj de la akvospegulo, svarme ili traflugis super niaj kapoj, aernaĝis al la kampoj plenigi la kropojn. Ni plirapidigis niajn paŝojn. La sundisko okcidente jam malheliĝis, baldaŭ ĝi ruĝiĝos. Fine ni eĉ kuris.

Antaŭ la Buĉejo atendis nin Aranjo Bognár. Ŝiaj okuloj estis ŝvelintaj, estis videble, ke ŝi ploris. Sed ŝia vizaĝo gajiĝis ekvidinte nin. Ŝi eĉ kuris renkonte al ni.

„Ĉu vi lavis la murojn?“ demandis mi.

„Mi lavis ilin,“ respondis ŝi malgaje. „Devigis min la onklo.“

Laŭpove ni klopodis konsoli ŝin.

„Ne ĉagreniĝu,“ diris al ŝi Oskaro Hodonicki. „Pli frue aŭ pli poste murdos vian onklon apopleksio. Ĉi tie li elspiros en la centro de la Buĉejo.“

„Eble jam la venontan dimanĉon,“ diris mi.
Ni eniris la grandan ŝtonan konstruaĵon. La ruĝaj muroj bele, pure lavitaj atendis nin. J.Burai scivoleme rigardis, eĉ palpatis la muron.
„Ĉu ĉi tie estis buĉejo?“ demandis li.
„Ĝi estis buĉejo,“ diris mi. „Oni buĉis multajn bestojn ĉi tie.“
„Kiajn bestojn?“
„Ŝafojn, bovojn, ĉevalojn, porkojn,“ diris mi.
„La muroj aspektas esti sangaj,“ diris J.Burai.
„Eble ili estas ĝuste sangaj,“ diris mi. „Eble la sango farbis ilin ruĝe.“
„Multe pli belaj estas muroj plendeseĝnitaj,“ diris Oskaro Hodonicki.
„Sed la Ĉardomastro ĉiudimanĉe forlavigas niajn desegnaĵojn.“
„Vi ne devus forlavi la desegnaĵojn,“ diris J.Burai.
„Aranĝo devas forlavi,“ diris mi. „La Ĉardomastro estas ŝia onklo, kaj li estas riĉulo.“
„Ĉiun dimanĉon mi forlavas la desegnaĵojn,“ diris Aranĝo.
„Ĉu vi nun volas hurli pro tio?“ demandis J.Burai.
„Ne pro tio,“ diris mi. „Grimpu ni sur la trabojn. Tuj vi vidos, kial ni hurlas.“
Ni kaptis la rustajn ferhokojn kaj grimpis sur la dikajn trabojn, okcidentflanke sub la vitrajn tegolojn. La sundisko jam ruĝiĝis malsupre, okcidente. La muroj de la Buĉejo komencis ardi, poste subite kvazaŭ flamon elĵetis. La malnova Buĉejo fandiĝis en flamo. Ardis, flamis niaj brakoj, piedoj, vizaĝoj kaj senvestigitaj supraj korpopartoj. Plezurplena kaj timiga estis ĉifoje la malnova Buĉejo. Oni devis hurli.
Kaj ni hurlis gorgostreĉante, la buĉejo reeĥis, ĉio estis brulruĝa, eĉ niaj dentoj, kvazaŭ ni manĝus nekuiritan viandon. Ni frapadis la trabojn, balanciĝis supre. Tiel ni hurlis.

Londono vokas 1903 – 1978

- Historio de la Londona Esperanto-Klubo – de Harry Holmes

1944

La nova jaro komenciĝis per kunveno kiu ne aperas en la kluba programo. Sabate la 2-an de Januaro la Societo por Britaj Instruistoj de Esperanto aranĝis en la klubejo diskuton pri la temo (tradukita) „La enkonduko de Esperanto en la edukan sistemon de Britujo“, kiun malfermis S-ro R. W. Hamilton MA., M Litt., ĉefinstruisto de Hemsworth Grammar School, gimnazio en kiu oni instruas Esperanton. Li forte batalis por ke Esperanto estu inkluzivigita en la temojn por la ŝtata abiturienta ekzameno.

Por la unua fojo la pordo de nia kunvenejo Fred Tallant Hall devis esti fermita pro ŝtelado el la vestejo. Ekde tiam oni estis devigata sonorigi.

En City Literary Institute okazis debato pri la plej bona solvo de la problemo de Internacia Lingvo. Percy Wright, kiu dum multaj jaroj instruis tie esperantajn kursojn aranĝitajn de la Klubo, metis la avantaĝojn de Esperanto antaŭ, laŭdire, neesperantista aŭdantaro. La fina voĉdono estis por Esperanto 28, Basic English 0, normala angla lingvo 1, manipulita angla lingvo 9, la franca 3, interglossa 6, tute kontraŭ internacia lingvo 1, ne voĉdonis 7.

Kvankam aeratakoj estis oftaj, 30 personoj partoprenis la kluban jarkunvenon. La klubula bulteno diras (tradukita): „Oni fine devigis S-inon Nora Holmes akcepti la oficon de helpprezidanto. Multe el la laboro ŝi faris dum longa tempo“. Kvankam Nora ne volis titolon, fakte, aparte dum la milito granda parto de la ŝarĝo administri la Klubon falis sur ŝin.

La du klubaj kursoj pri Esperanto en City Literary Institute daŭris ĝis la finiĝo de la trimestro dank' al la dediĉo de Percy Wright. Dek du lecionoj kostis 2ŝ 6p (egale al 12½ novaj pencoj). Ankaŭ estis Ĉe-metoda kurso, instruita de S-ro Osmotherly, en la klubejo.

Oni devas memori ke la Klubo respondecis pri la organizo de Esperanto en City Literary Institute. Do ĝi havis rektan intereson en la tuttaga konferenco pri Internacia Lingvo aranĝita de „New Education Fellowship“. D-ro Bodmer, la aŭtoro de „The Loom of Language“, parolis pri la historio de internaciaj lingvoj; D-ro Hatfield parolis pri „Basic English“; Prof. Lancelot Hogben, ĝia aŭtoro, parolis pri „Interglossa“; D-ro Dutton parolis pri „Speedwords“; S-ro Jacob parolis pri Ido kaj S-ro Butler parolis pri Esperanto. D-ro Hatfield konfesis ke li ne kapablas paroli Basic English kaj diris ke li kredas ke ankaŭ S-ro Ogden kaj D-ro Richards, la kunaŭtoroj de Basic English, ne kapablas paroli ĝin. *Tamen en 1947 la Ŝtato aĉetis la kopirajton por £23 000, kredeble pro la raporto de komitato kiun Churchill starigis en 1943 por enketi pri la facileco de lernado de diversaj internaciaj lingvoj kompare kun la angla lingvo.* Kontraŭstari Basic English kaj Interglossa estis grava tasko por la Klubo.

El la libro „La malgranda Sorĉistino“

Otfried Preussler
Inter-kulturo, Maribor kaj Esperanto-Frende, Durmersheim/Rastatt, 1994

Pli bone ol sep jupoj

Kiam ĉirkaŭ malheliĝo la Malgranda Sorĉistino revenis hejmen, la korvo Abrakso tuj volis scii, kion ŝi travivis dum la surbalaila flugado. Sed la Malgranda Sorĉistino dentklakante respondis:

„T-tion mi v-volas rakonti al v-vi pli p-poste. Antaŭ ĉio mi d-devas p-prepari por mi t-teon, ĉ-ĉar mi t-tiom frostiĝis, ke mi ap-penaŭ povas p-paroli.“

„Jen vi vidas!“ grakis Abrakso, „nun la sekvoj, ĉar vi nepre volis elrajdi en tiu akra malvarmego! Sed vi ja ne sekvis mian konsilon!“

La Malgranda Sorĉistino kuiris por si grandan poton da tizano. Tiun ŝi dolĉigis per multe da sukero. Poste ŝi ŝmace sorbis tiun varmegan trinkaĵon. Tio bonfaris al ŝi, kaj baldaŭ ŝi revarmiĝis. Tiam ŝi demetis ses el la sep jupoj, formetis ŝuojn kaj ŝtrumpojn, glitis en la feltopantoflojn kaj diris:

„Ke mi mizere frostis, mi ja ne volas kontesti. Sed mi diras al vi: Tamen estis bele!“

Ŝi eksidis sur la fornbenko kaj komencis rakonti. La korvo Abrakso silente aŭskultis ŝin. Nur post la rakonto pri la maronvendisto, li interrompis ŝin kaj diris:

„Do, sciu, iom post iom mi nenion plu komprenas! Al tiu maronvendisto vi helpis per via sorĉado kontraŭ malvarmo, sed kial vi ne helpis al vi mem? Kion mi diru kiel saĝa korvo?“

„Kiel vi opinias?“ demandis la Malgranda Sorĉistino.

„Kiel mi opiniu! Se mi estus vi kaj povus sorĉi, mi tutcerte ne bezonus tizanon por varmigi min! Dekomence mi nepre evitus ĝin!“

„Sed mi ja faris ĉion, kion mi povis fari!“ diris la Malgranda Sorĉistino. „Mi surmetis du parojn da gantoj, la vintrobotojn, la lanan kaptukon kaj sep jupoj...“

„Aĥ ĉesu!“ kriis Abrakso. „Mi scias rimedon kontraŭ la frostoj, kiu estas pli bona ol sep jupoj!“

„Pli bona ol sep jupoj?“

„Multe pli bona! Same vere, kiel veras ke mi estas korvo kaj nomiĝas Abrakso!“

La Malgranda Sorĉistino ankoraŭ ne komprenis lin. „Diru al mi“, ŝi petis lin, „kion mi preterlasis laŭ via opinio. Sed vi devas diri tion pli klare kaj ne parolu ĉiam per enigmoj.“

„Ĉu mi vere parolas per enigmoj?“ demandis Abrakso. – „La afero estas tute klara, kiel akvo! Se vi havas kapablon forigi la malvarmon de la maronvendisto, kial do, mia kara, vi ne povas fari la samon por vi?“

„Aĥ!“ kriis la Malgranda Sorĉistino kaj frapis sian frunton, „Tio estas ĝusta! Kiel do okazis, ke mi ne havis tiun ideon pli frue? Vi pravas! Pro kio mi ja estas sorĉistino?“

„Ĝuste, ĝuste“, konsentis Abrakso. „Kelkfoje vi ŝajne tute forgesas tion. Sed bone, ke vi havas iun, kiu de tempo al tempo memorigas vin pri tio!“

Kaj la Malgranda Sorĉistino fervore kapjesis pri tiuj vortoj kaj diris:

„Jes, jes, vi vere estas la plej saĝa korvo, kiu iam ajn eloviĝis!“

Memkompreneble mi tuj sekvas vian konsilon. Kaj se vi konsentas, mi volas helpi ankaŭ vin per mia sorĉa diraĵo kontraŭ malvarmo, por ke vi estonte ne plu restu hejme, kiam mi elrajdos.“

„Konsentite!“ diris Abrakso, „vi foje rajtas fari ion bonan ankaŭ al mi!“

Tiam la Malgranda Sorĉistino sorĉis sin kaj la korvon, ke ili ne plu havu malvarmon. Ekde nun ili povis promenrajdi ankaŭ en la plej akra malvarmo, sen senti froston. Ili nek bezonis dike vesti sin, nek trinki poste tizanon.

Kaj nazkataron ili ankaŭ ne ricevis, kvankam ili de tiam estis survoje preskaŭ ĉiun tagon.

Eroj el la libreto „MINAKATA Kumagusu“

TONIŜI Jooko, Esperanta traduko EGAWA Harukuni

D-ro L.L.Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto kaj Minakata Kumagusu vivis en la sama epoko. Ambaŭ klopodis por „la mondo sen muro“ kaj kontribuis por la mondo krei „kulturon de la paco“. Por ke la vivo de Minakata Kumagusu estu konata tra la tuta mondo, mi tradukis en Esperanton, lingvon senmure egalan al ĉiuj nacioj.

Se oni demandus: „Kia homo estis MINAKATA Kumagusu?“, iu respondus, ke li estis „plantologo“. Aŭ alia nomus lin „folkloristo“. Inter la respondoj povus esti homo, kiu persistas: „Li estis certe mondfama miksomicetologo pri la studo de miksomicetoj (mycetozoa).“ Kaj ankaŭ homo, kiu klarigas: „Ne, li estas naturesploranto inkluzive de ĉio menciita.“ Ĉiuokaze, eĉ homoj vivantaj najbare de Kumagusu ne povis trovi taŭgan nomon por lia laboro. Inter ili estis kelkaj, kiuj nomis lin „giganto“ kaj ni provu vidi tian vivon de Kumagusu laŭ la riparoloj de diversaj homoj.

Ĉar Kumagusu havis tian specialan ĉieldoton, ke li nenion forgesis eĉ post unufoja memoro, plej allogaj ludoj al li estis legado kaj transskribado. Eĉ en la tempo de la elementa lernejo li amis legadon kaj lernadon. Sed lia patro Jahei ne aĉetis por li sufiĉe da libroj, kajeroj kaj kraĵonoj pro la penso, ke la infano de komercisto ne bezovas edukon. Pro tio li ofte vizitis amikojn kaj tie legis la unuan enciklopedion kun ilustraĵoj en Japanio, „Ŭakan Sansai Zue“ kaj aliajn librojn. Pruntepreninte ĝin, li revenis hejmen kaj ektransskribis la tuton de tiu sama tago. Nun restas multaj transskribitaj kajeroj kiel el „Ŭakan Sansai Zue“, naturhistoria libro de Ĉinio ktp., kiujn li faris en la aĝo de ok aŭ naŭ jaroj.

Tamen, ĉar li jam fariĝis tridek kvar jarojn aĝa kaj devis labori en profundaj montoj, li iam verkis malĝojan poemon: „Malnovaj amikoj, ĉiuj sukcesis en la vivo. Sed ve, kial mi sola en vintra nokto malvarma devas dormi

en tabioj malsekaj (tabio: japana mola piedvesto kovranta ĝis maleolo) de intermonta akvofluo?“ Ankaŭ tie li trovis la raran mikrobon *Cymbidium Lancifolium*, pri kiu li respondis: „La lokon sciigis al mi fantomo.“ Ŝajnas, ke la fantomo sciigis al li ne nur unufoje, pri kio li skribis jene: „Kvankam ĉiuj primitivaj homoj havis superpovon interparoli kiel mi kun la fantomoj de granda naturo, nuntempaj homoj eble jam perdis ĝin pro la vivado dependanta de artefaritaj aĵoj.“

Tiutempe la registraro de ilustraĵoj kaj specimenoj pri multaj specioj de mikroboj kaj miksomicetoj jam estis ellaboritaj de li. La tempo, kiam li donace sendis la specimenojn de miksomicetoj al la planta fakultato en Brita Muzeo estis ĝuste la jaro, kiam li edziĝis al Macue. Oni diras, ke ĉar en lia kabineto senorde kuŝis mikroskopo, libroj kaj skribataj manuskriptoj, remetonte ilin Macue estis skoldita. Do, ŝi ne devis balai eĉ la ĝardenon, ĉar tie li flegadis miksomicetojn sub velkofolioj. Sur la skribotablo ofte kuŝis fekaĵeroj pro tio, ke li flegadis ankaŭ miksomicetojn en la fekaĵoj de bovo kaj ĉevalo.

En 1907 naskiĝis la unua filo Kumaja. Tiutempe, la japana registaro en la erao Meiji proklamis la leĝon: „kuna apoteozo por unu komunumo“. Tio signifas, ke ni apoteozu nur unu ŝintoisman templon por unu vilaĝo aŭ urbo, malkonstruinte aliajn ŝintoismajn kapelojn kaj templetojn por klanoj. Alivorte estas, ke vilaĝanoj forĵetu sian dion, al kiu ili kultis ĝis nun, kaj kredis je la dio, kiun la registaro direktis. Kumagusu forte kontraŭis. La ĝardenoj kaj la arbaroj de temploj havis lokojn, kie vivadis multe da kriptogamoj kaj miksomicetoj, kiujn li studadis. Se ia specio pereis unufoje, li sciis, ke ĝi neniam reaperos en la mondo. Kaj pro malapero de la dioj, al kiuj oni kultis ĝis nun, koro al koro de homoj disiĝos ĉiu aparte kaj malaperos la varmeco kaj afableco de la vilaĝanoj kaj kamparanoj. Dum dek jaroj li protestadis kontraŭ la aŭtoritatuloj de la ŝtato kaj gubernio dirante: „La leĝo detruos la ekologian sistemon de la naturo, perdigos la bonkorecon de la homoj kaj fine alportos nenian bonan frukton al la estonta Japanio.“ Ĉar li tro forte movadis kontraŭ ĝi, arestita li spertis malliberejan vivon en 1910.

Plue li klarigis per ilustraĵoj, ke spirito kaj materio ne estas apartaj kaj ili havas rilaton ege influantan unu la alian. La socia strukturo de la nuntempa Japanio devenis el la penso, ke spirito kaj materio estas apartaj, kaj nun ĝi renkontas stagnadon. Tion Kumagusu antaŭvidis kaj timis. Pro sia esenca penso, ke ĉio ne havas muron, li eble interesiĝi speciale pri la miksomicetoj. Ĉar jen ĝi iam aperis en animala formo, jen ĝi nun vivas kiel planto. Mi kredas, ke Kumagusu pruvis kaj indikis al ni per biologio, folkloro, filozofio kaj multaj aliaj, ke ĉio en la mondo ne havas limon kaj ĉio estas ekzistaĵo valora.

Raportoj el Japanio 6

la sesa libro de Hori Jasuo (januaro – decembro 2002)

Ĉapitro 16. Barba Foko Aperis en Tokyo

Barba foko aperis en rivero Tama-gaŭa en Tokyo en la 7-a de aŭgusto. Nomate Tama-*can* (Tamaĉjo), ĝi estis 128 centimetrojn longa kaj ŝajne knabo. Pri ĝi amaskomunikiloj raportis tiel ofte, ke multaj homoj vizitis riveron por vidi ĝin. Oficejo, kiu prizorgas la riveron, malfermis TTT-ejon pri ĝi, al kiu ĝis la 20-a de aŭgusto troviĝis pli ol 380 mil aliroj.

Tama-*can* restis en rivero Tama-gaŭa ĝis la 17-a de aŭgusto, tamen pro tajfuno ĝi malaperis. Poste ĝi reaperis en najbara rivero Curumi-gaŭa en la 25-a kaj restis tie ĝis la 30-a. Poste la 12-an de septembro ĝi aperis en rivero Katariba-gaŭa en urbo Yokohama kaj la 15-an en rivero Ooka-gaŭa. En la 29-a ĝi revenis al rivero Katabira-gaŭa.

Dume okazis tri esplorkunsidoj pri la foko. Jena estas la esploro kaj konkludo de la sciencistoj: Barbaj fokoj origine loĝas en la norda maro. Foje ili venas al nia norda insulo Hokkaido, sed ili tre malofte venas suden ĝis Golfo Tokyo. Nun Tamaĉjo loĝas en sensala akvo, sed supozeble tio ne gravas al ĝi. Ŝajnas, ke kvankam ĝi iom maldikiĝis, ĝia sanstato estas normala. La akvokvalitoj de tiuj riveroj ne estas tre bonaj, sed kiam ĝi ne ŝatus ĝin, ĝi povas translokiĝi al alia loko. Por kapti ĝin, oni devas prepari grandskalan operacion, kio povos panikigi kaj vundi ĝin. Estas pli bone lasi ĝin kaj esperi ĝian memvolan revenon al la maro.

Tama-*can* estas tre populara. Unue ĝi estas tre aminda. Due, por televido ĝi estas tre oportuna objekto. Ĝenerale en somero mankas taŭgaj novaĵoj por televidprogramo por dommastrinoj. Ĝi ripetas aperi kaj malaperi, jen en iu rivero, jen en alia rivero. Ĝia agado, aŭ trankviligas aŭ maltrankviligas televidvidantojn. Ĝi estas tiel aminda, ke oni emas pensi pri ĝi kiel sia dorlobesto. Trie, ĝi lumigas la malluman japanan socion. Nun estas malfacile trovi gajajn temojn en nia socio.

Laŭ la riverbordo troviĝas multaj viraj spektantoj. Unu tia viro diris: „Tama-*can* venis sola el la fora norda maro. Ankaŭ mi estas sola. Kiam mi vidas ĝian vizaĝon, mi forgesas mian solecon eĉ se nur portempe.“ Alia diris: „Tama-*can* havas amindajn okulojn. Okuloj de japanoj estas kvazaŭ mortaj. Ankaŭ miaj estas tiaj.“ Multaj nun volas forgesi sian realan vivon. Tama-*can* konsolas tiajn malfeliĉajn japanojn.

(La 5-an de oktobro 2002)

Noto 1: En la 24-a de decembro Tamaĉjo aperis denove en la rivero Katariba-gaŭa. Unu spektanto diris: „Ĝi aperis en la tago, kiam la vorto „Tama-*can*“ gajnis premion, kiel la furora vorto en la jaro 2002. Hodiaŭ estas antaŭtago de Kristnasko. Ĝi scias, kiamaniere ĝojigi homojn.“

Noto 2: En februaro 2003 Tamaĉjo estis registrita kiel civitano de Yokohama. Ĝia nomo estas Niŝi Tamao. „Niŝi“ signifas la kvartalon de ĝia nuna loĝloko, „Tama“ estas nomo de rivero, kie ĝi unuan fojon aperis kaj „o“ signifas viron. En la somero 2002 ĝi estis 128 centimetrojn longa kaj 80 kilogramojn peza, sed nun ĝi estas 160 cm kaj 120 kg. Oni esperas, ke ĝi aperos en mediprotektataj aŝiŝoj.

En la sekvanta dimanĉo pluraj eksterlandanoj loĝantaj en Yokohama manifestaciis antaŭ la urbodomo de Yokohama, postulante, ke la urbestro emisiu al ili atestojn pri registriteco. Ilia demando estis: kial li ne agnoskas ilin kiel civitanojn de Yokohama, dum li registris fokon kiel tia.

Ĉapitro 18. Laborvestulo kaj Nobel-premio

La 9-an de oktobro la Reĝa Sveda Akademio de Scienco publikigis, ke ĝi donos Nobel-premion pri kemio al prof. John Fenn (usonano), prof. Kurt Wuthrich (sviso) kaj s-ro Tanaka Kooiĉi (Ŝimazu-Korporacio en Japanio), kiuj ekspluatis metodojn por analizi la mason kaj strukturon de vivantaj makromolekuloj kiel proteino. Per tiuj metodoj oni povas scii kiun formon kaj strukturon proteinmolekuloj havas, kio ebligas ekspluati novajn medikamentojn ktp.

Ĉe intervjuo s-ro Tanaka respondis al la demandoj de ĵurnalistoj: „Mi ricevis telefonvokon pri la Nobel-premio, sed mi tute ne komprenis, pri kio temas. Mi devas pardonpeti de vi, ĉar mi aperis ĉi tie en laborvesto kaj kun stoplobarbo. Se mi estus preta, mi estus en kompleto. Mi ankoraŭ ne kredas, ke mi, kiu ne estas profesoro de universitato ricevos la premion.“

Antaŭ ol li, 8 japanoj jam ricevis Nobel-premion pri fiziko, kemio aŭ medicino, inter kiuj sep estas (eks)profesoroj de universitato kaj ĉiuj estas doktoroj, tamen s-ro Tanaka eĉ ne havas titolon de magistro. Li estas simpla fakestro en kompanio.

Demandite pri sia kariero, li konfesis, ke li volis eniri Sony, faman kompanion pri elektraĵoj, ĉar li studis elektro-teknikon en universitato, sed li malsukcesis je la ekzameno. Li aldonis: „Mi elektis Ŝimazu. Mi supozis, ke tie mi laboros en kemia kampo kaj mi ne skoldos min pri mia fuŝo, ĉar mi studis alian kampon en universitato.“

Estas tre ĝojiga novaĵo, ke s-ro Tanaka, kiu estas nek profesoro, nek doktoro, ricevis tiel grandan premion. Kompare kun la evoluo de teknologio en Japanio, la nombro de Nobel-premiitoj estas tro malgranda, parte pro lingva problemo. Onidire troviĝas multaj similnivelaj homoj kiel li en japanaj kompanioj, tamen ili ne havas tempon aŭ ŝancon publikigi sian esploron en la angla lingvo, tiel ke ili ne povas aperi sur la internacia scenejo. Kaptinte tiun okazon, la registaro volas plifortigi la anglalingvan edukadon en Japanio, tamen

por solvi tiun problemon Akademio de Nobel-premio devas kompreni la lingvan problemon en la mondo.

Nobel-premiitoj devas prelegi en la angla dum la ceremonio, sed starpunte de lingva egaleco, tio estas tre stranga kaj malracia kutimo aŭ sinteno. Universala Esperanto-Asocio klopodas por ricevi Nobel-premio pri paco, sed tiel longe dum Akademio tute ne rimarkas lingvan problemon, tia movado estiĝos tute malsukcesa. Eĉ se la klopodo sukcesus, ĉu nia prezidanto Renato Corsetti prelegus en la angla? Tio estus tre ridinda afero.

La novaĵo multe kuraĝigas japanojn, kiuj suferas pro la ekonomia stagnado sen multe da bonaj novaĵoj. S-ro Tanaka donas bonan lecionon al ni, ke kiam ni diligente laboras, estas probable, ke ni estos iam alte taksataj. Nunaj junaj japanoj malŝatas labori diligente kaj malestimas metiistan laboron. Nobel-premio al li montris, ke tia diligenteco estas plej grava kaj surbaze de tio japanoj devas rekonstrui sian socion.

(la 15an de oktobro 2002)

Furoroj kaj Malfuroroj (4) Lameno kaj Udon

Lastan monaton nova *lamen*-restoracio malfermiĝis najbare de mia domo. En la malferma tago oni ofertis unu tason kontraŭ 5 enoj (0,04 usonaj dolaroj) kaj pro tio serpentumis klientoj ĉirkaŭ la restoracio. Nun *lamen* estas granda furoro.

Laŭ Japana-Esperanta-vortaro *lamen* estas „ĉina vermiĉelo“, sed mi aŭdacas traduki ĝin kiel „japana vermiĉelo“. Laŭ iu libro japanoj al kutimiĝis al ĉina vermiĉelo je la nomo de „*ŝina-soba*“ (*ŝina* = *ĉina*, *soba* = *vermiĉelo*) en la komenco de la dudeka jarcento kaj post la dua mondmilito ĝi nomiĝis kiel „*ĉuuka-soba*“ (*ĉuuka* = *oficiala nomo de Ĉinio*) aŭ *lamen*. Ĝi originis el Ĉinio, sed evoluis multe en Japanio.

Du ĉefaj gustigaĵoj de *lamen* estas *miso* (farita el fermentitaj pizoj) kaj sojsaŭco. La plej simpla *lamen* konsistas el nudelo kun *naruto* (farita el fiŝviando), *ŝinaĉiku* (peco de gustigita bambuido), peco de viando kaj pecetoj de tubfolia ajlo. La prezo estas 500-1000 enoj (4-8 usonaj dolaroj).

Nun evoluas diversegaj *lamen* en Japanio, kun diversaj gustoj, ingrediencoj, kuirmanieroj, ktp. Tiun furoron komence puŝis *lamen*-muzeo en Yokohama kaj nun puŝas interreto.

En tiu ĉi kampon eniras *udon*, pli dika nudelo farita el tritika faruno, kun gusto de sojsaŭco. Ĝia plej fama produkto estas gubernio Kagaŭa. Nun multe kreskas *udon*-restoracioj sub la nomo de *sanuki-udon* (*sanuki* = *malnova nomo de Kagaŭa*). La avantaĝo de *udon* kuŝas en tio, ke ĝi estas pli malmultekosta ol *lamen*.

Lamen, *udon*, hamburgero, bovaĵtaso, rotacianta suŝio (suŝio venanta sur rultapiŝo), tiuj ĉiuj konkure allogas frandemulojn. Oni postulas pli bongustajn

kaj pli malmultekostajn manĝaĵojn, do scii, kio nova aperos morgaŭ, estas tre interese.

EŬROPANTO

Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri Eŭropanto?

Eble, ĉar ĝi ne ekzistas. Eŭropo ankoraŭ ne havas komunan lingvon. Verdire jam naskiĝis multaj provadoj por elimini tiun ĉi gravan problemon. Se ni, eŭropanoj ne trovos baldaŭ konvenan solvon, tiam la babela ĥaoso kaŭzos lingvajn miskomprenojn kaj sufokigos la klopodon por estigi unuecon sur nia kontinento.

Ankaŭ ni, esperantistoj, senĉese sieĝas la potenculojn kaj pruvadas, ke nia amata lingvo Esperanto povus plenumi tiun ĉi rolon, sed ni ĉiam trovas murojn kaj oni forĵetas nian ideon.

Antaŭ nelonge ankaŭ Dr. Molnár Lajos en Hungario sendis sian opinion pri ĉi temo al diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj, sed „la estimataj redaktotoj“ ne aperigis lian kontribuon, eĉ lasis lin senresponde.

Mi scias, Vesperto estas amatora eldonaĵo kaj ĝin legas nur malmultaj homoj. Ĝi ne povas, ne volas konkuri kun landaj gazetoj. Tamen mi decidis aperigi mallongigitan artikolon de Dr. Molnár Lajos:

„Mi estus volinta pruvi (por kiel eble plej multaj homoj), ke laŭ lingva vidpunkto antaŭ EU staras 3 vojoj:

- 1. Almenaŭ por iom da tempo gardi la lingvan diversecon. Tiu ĉi vojo estas ege multekosta kaj samtempe la malplej efika, - sed (eble) ne danĝerigus la unuopajn, naciajn lingvojn kaj kulturojn.**
- 2. Solvi la lingvan problemon per uzado de unusola nacia lingvo. (Estas egale, ĉu oni uzus anglan, germanan, hispanan, francan, portugalan ktp.) tiu ĉi – cetere treege efika – vojo kondukas al neniigo de la aliaj naciaj lingvoj. La lingvoj de malgrandaj nacioj malaperus unuaj...**
- 3. Enkonduko de neŭtrala, facile ellernebla, sufiĉe belsona, por ĉiuj nacioj akceptebla ponto – lingvo, kiu ne danĝerigas la etnajn lingvojn kaj kiu donas al neniuj nek malavantaĝon, nek senmotivan avantaĝon.“**

Eŭropanoj devus pripensi, pridiskuti demokrate, solvi... La monan problemon oni pli bone komprenas.

El Francujo venis tiu ĉi mesaĝo:

Juda estas via Kristo,
japana estas via veturilo,
itala estas via pico,
alĝera estas via kuskuso,
greka estas via demokratio,
hinda estas via ĉemizo,
turkaj aŭ tuniziaj estas viaj ferioj,
latina estas via manskribo,
arabaj estas viaj numeraloj, ktp
kaj al via najbaro vi riproĉas esti fremdulo...

La nigrigita mevo

Irana poezio, verkita originale en Esperanto – Dro Kejhan Sajjadpur

Mi estas:

Nigrigita mevo, viktimo de l' fi-revo kaj de l' region-krevo, ĉu defenda devo?

Mi estis:

Birdo neĝkolora, sur marbordo ora, pacemulo elkora, de politiko fora.

Min nigrigis:

Petrol-tuba rompo, malica trompo, la fumo de l' pompo, la minaco de l' maskerad-bombo.

Mi vidis:

Okupantaran feston, fremdarmean ĉeeston, armilan prov-teston: la Dezertan Tempeston.¹

Mi antaŭsentas ke:

La teron skui, ĉion detruu, morton ĝui. Kiel rekonstrui?

Mi aŭdas:

Ŝprucantan petrolputon, ies diskuton, alies malmuton, la vanan tuton.

Min mirigas:

Petrol-milito, orgojla kreito, eksplodo de dinamito, kies profito?

Mi rakontas pri la:

Ligoj inter ŝtatoj, plene ornamitaj soldatoj, bomb-riĉaj Vir-Katoj², malfeliĉaj atakoj.

Min maltrankviligas:

Misilo-donaco, pro misilminaco, ĉiama malpaco. Ĉu ekzistas kuraco?

Min impresis:

¹ Gxi estis nomo de militoperacio far Usono

² Usona milita aviadilo (Tom cat)

Konscienca malforto, fortula komforto, malfortula morto. Kiom mizera sorto!
Min suferigas:
Neniigo de cio, kaj de l' petrol-industrio, mort-ceremonio, ĉu nova Vjetnamio?
Mi pensas pri:
La homaj rajtoj. Kies rajtoj? Sub bombardantaj kajtoj?³ Ĉu estos futuraj
Kuvajtoj?

Antaŭ kelkaj jaroj Irako okupis Kuvajton kaj poste Usono kaj kelkaj aliaj ŝtatoj atakis Irakon.
Dum la milito la petrolo malpurigis akvon. En la televidaj dissendoj oni montris birdojn
malpurigitajn de petrolo. Tiu sceno impresis min verki jenan poeziaĵon. Nuntempe, kiam
Usono refoje atakis Irakon malgraŭ tutmondaj kontraŭstaroj, ŝajne estas bona okazo prezenti
la poemon.

La aŭtoro.

Pri Lunulo

La ĉinan poemon de la poeto Li Po tradukis al la ĉeĥa Bohumil Mathesius, el la ĉeĥa iu
esperantistino

Sub verda laŭbo mi sidas
kaj vinon mi verŝas, trinkas.
Estas tempo por amika invit',
sed mi solas sen amik'.

Jen, vidu, super la monteto ronda luneto salutas, svingas al mi.
Por resaluti skuas kapon mia ombro apud mi,
La vinon volas trinki lun';
kiel doni glason al ĝi nun...

La ombro verŝas glason...
Luno parolas kun ombro, la luno dancas kun ombro.
Nur mi trankvile ĉe la tablo sidas kaj miaj amikoj ebriiĝas.

Post noktomezo en liton komunan kuŝiĝos grupo amika.
Kaj morgaŭ, kiam la unuaj brilaj steloj venos,
ni denove malfermos la vinbotelon.

³ Tiel nomataj fantom-aviadiloj

Edukaj gutoj de Dinko Matkoviĉ

La plej alta akordo inter homaj rilatoj estas atingita en soldataj paradaj marŝoj.

Pli facile estas kapjesi per malplena kapo.

Nur spertuloj povas legi inter linioj kaj vidi, kio troviĝas inter tv-bildoj.

Vero estas kiel perdita kudrilo – malfacile trovebla.

Por nacia festotago sufiĉas ofte unu futbaldolo.

Interrompitaj homaj rilatoj estas plej streĉaj.

Prudenta voĉo ne estas aŭdebla en bruo de babilantoj.

Historio instruas nin, ke la vojo de „maksimuma nacia intereso“ gvidas popolon al la limo de ekzista minimumo.

Ju pli socio estas etne purigata, des pli ĝi estas etike malpurigata.

Oni devas ESTI por HAVI, sed estas bezone ion havi por esti.

Honesta ŝtelisto ŝtelas nur de pli grandaj ŝtelistoj.

MONATO, oktobro 2000, p.34, Ŝerco & satiro
Dinko Matkoviĉ, Kroatio

Bondezira mesaĝo de Renato Corsetti al nia eta boleslava klubo

Foje mi havas impreson, ke mi estas stultulo, tre profunda stultulo, por diri la aferon per ĝustaj vortoj.

Kiam mi pensas tion? Tre ofte, preskaŭ ĉiutage. Kial mi pensas tion? Ĉar mi pensas, ke ni iĝis esperantistoj, ĉar ni volas disvastigi Esperanton al la tuta mondo, laŭgrade, laŭ niaj eblecoj, eventuale dum jardekoj aŭ jarcentoj, sed ni ja volas disvastigi ĝin. Ĉu mi miskomprenis?

Krome, kaj tio estas la pinto de mia stulteco, mi pensas, ke per Esperanto la mondo iĝus pli bona loko, kun pli da justeco inter popoloj malsamlingvaj kaj pli da egaleco rilate al kulturaj interŝanĝoj. Mi ankaŭ opinias, ke oni finfine devos komenci agnoski la ekziston de Lingvaj Homaj Rajtoj, tio estas rajtoj

apartenantaj al ĉiuj unuopuloj pro la simpla fakto, ke ili estas homoj. Ĉiu homo rajtas paroli sian lingvon kaj ĉiu lingvo havas saman dignon. En internacia medio ĉies digno devas esti respektata, kaj ĉiu rajtas kompreni ĉion kaj esti komprenata de ĉiuj.

Mi konscias, ke ne ĉiu esperantisto en ĉiu momento de sia vivo povas pensi pri tiel noblaj celoj, kaj ke inter unu lingva homa rajto kaj la alia, oni ankaŭ ĝuas la lingvon, legas literaturaĵojn, eventuale eĉ verkas ilin, trovas amikon/inon, kolektas siajn poŝtmarkojn (fakte mi ricevis unu tre belan el Brazilo hieraŭ), ktp. Mi ankaŭ akceptas, ke parolantoj de la internacia lingvo Esperanto, estas baze normalaj homoj malgraŭ la idealismo, kaj do ili renkontas ĉiujn homajn problemojn, kverelas inter si de tempo al tempo, envias sian najbaron kaj kaŝe fiparolas pri tiu aŭ tiu alia samideano.

Sed, kial mi, do, estas stultulo? Mi kredas, ke mi estas tia, ĉar mi tro ofte renkontas parolantojn de Esperanto, kies ĉefaj interesoj estas tute aliaj ol tiuj, kiujn mi mem havas. Ili tro multe interesiĝas pri ĉio, kio laŭ mi estas marĝena (poŝtmarkoj, kvereloj kaj ĝuado de la lingvo), kaj tro malmulte pri tio, kio laŭ mi estas esenca (informado, instruado kaj utiligado). Se multaj opinias tiel, kaj nur unu alimaniere, kion oni konkludu?

Aliflanke mi estas obstina, kaj mi fakte trovas ĉiutage aliajn homojn, kiuj kaŝe kaj silente faras tion, kion aliaj publike kaj brue deklaras, nebla aŭ ĉiukaze nevera. Amaso da homoj lernas Esperanton en nur mallonga tempo (se vi ne kredas min, vizitu kursojn retajn aŭ ĉeestajn), dum niaj propraj lingvistoj verkas librojn por klarigi ke Esperanto estas same malfacile lernebla kiel aliaj lingvoj, kaj niaj verkistoj faras sian maksimuman eblon por igi la lingvon pli malfacila kaj normale escepto-hava.

Mi ofte proponas esperantistojn por premioj. Neniam miaj proponoj estas akceptataj de la juĝantaroj, eble ĉar mi proponas ĝuste tiujn esperantistojn, kiuj laboras trankvile, mem pagas siajn elspezojn, kaj postulas nenion pro tio, eĉ ne mencion en loka bulteno. Sekve ili ne estas konataj kaj ne premieblaj. Kредu min, ke tiaj esperantistoj ekzistas multaj. Mi neniam havas problemojn trovi maljunulinon, kiu el sia pensio financis la evoluon de Esperanto en tuta malriĉa lando, aŭ viron, kiu sukcesis instrui Esperanton en sia urbeto kaj konvinki la urban estraron starigi monumenton al Zamenhof, dum li samtempe persvadis lernejestron enkonduki kurson pri Esperanto en la lokan lernejon. Mi ankaŭ trovas junajn homojn, kiuj volas iri al Bruselo kaj diri al la bruselaj politikistoj sian opinion pri tio, kion tiuj politikistoj nomas „Multlingveco“. Mi trovas junajn ĵuslernintojn per la reto, kiuj volas traduki la Dian Komedion, ĉar ili ne scias, ke ĝi jam estas tradukita, aŭ kiuj volas starigi la Bervalan Esperanto-Asocion, ĉar ili ne scias, ke tiu jam ekzistas de 100 jaroj. Mi trovas ankaŭ multajn aliajn esperantistojn, kiuj pensas, ke la mondo bezonas justecon por atingi pacon, kaj pretas persone agi kaj mem pagi (foje rimoj ne estas hazardaj). Nu, eble la fenomeno de senesperigo ne estas tiel ĝenerala kiel kelkaj maloptimistoj ŝajnigas. Se la afero estus kiel ili pensas, kiu taksus tion realisma,

ke bonstata juna okcidenta esperantista paro lasos ĉion por iri instrui Esperanton en la brazila forlasita interno, kie la ebleco ĝui sian esperantistecon kaj, ekzemple, partopreni la jarfinan aranĝon en Germanujo estas neekzistanta? Mi ankaŭ trovas homojn, kiuj volas uzi freneze grandajn sumojn por anoncoj al neesperantistoj, kiuj ne volas aŭskulti.

Al ĉiuj tiuj kaj ĝenerale al ĉiuj esperantistoj, mi diras laŭ konata versaĵo: „Ne ĉesu, ne ĉesu!“, ĉar tio „en kor´ al ni sonas“, kaj samtempe mi diras: „Multajn bondezirojn por feliĉa jaro 2004-a!“

En ĉi tiu bondezira periodo oni serĉas espero-signojn en la mondo. Tamen estas malfacile en ĉi tiuj lastaj monatoj trovi, ke la mondo pliboniĝis. Militoj kaj minacoj pri la mema pluvivado de la planedo abundas. Perforto, milito, ekonomio, forto trovas ĉiam pli da laŭdantoj. Sed bonŝance kreskas ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj vidas, ke perforto ne solvas problemojn, ke la egoismo de nur malgranda parto de la homaro portos nin ĉiujn malaperi de la kosmo, ke evoluo havas sencon nur se ĝi estas daŭropova kaj medi-respekta. Kune kun tiu parto de la homaro esperantistoj laboras, ĉar ankaŭ ni volas kontribui al la savado de nia kultura riĉeco. Ankaŭ en ĉi tiu kampo ne estu la forto de la momentaj fortuloj, kiuj diktus la solvon. Ne estu solvo de mastroj kaj sklavo, sed solvo de egaluloj, ĉar homoj principe naskiĝis tiaj.

renato.corsetti@uniroma1.it

Vortoj de Kep Enderby

Eble naive, tamen permesu al aŭstraliano alternative proponi, ke la homaro, inkluzive de eŭropanoj, ja havas kapablon superi mallaŭdindajn sentojn kaj prijuĝojn. Lastatempe, kaj hazarde, kaj ne rekte rilate al la situacio en Eŭropo, mi havis okazon respondi al artikolo aperinta (angle, kompreneble) en gazeto „Aŭstralia Racionalisto“. La aŭtoro argumentis, ke Aŭstralio tro involviĝis en t.n. tutmondiĝo, kontraŭ kiu, estanta kapitalisma, nepras lukti.

Atencoj

Mi replikis, ke la mondo, se ne tuj, devos sufiĉe maturiĝi por havigi al si mondregistaron, mondfederacion aŭ almenaŭ mondkonfederacion, por ke la nuntempa militsistemo estu anstataŭata de pacosistemo; krome, ke mondregistaro necesas por estri interdependan mondekonomion, eviti mondkalan ekologian katastrofon, juste leĝdoni por regionoj de la mondo ekster la regado de landaj registaroj, juste kaj efike prizorgi seriozajn atencojn kontraŭ homaj rajtoj kaj aliaj internaciaj krimoj, kaj fine por pli subteni kaj pli prosperigi senton de monda komunumeco.

Alivorte: la homaro kreu por si novan senton de identeco: identeco, kiu superos triban aŭ nacian senton kaj kiu estu tutmonda. Naciismaj sentoj, sentoj pri nacia fiero rilate al identeco, estas kerne malprogresema. Subtene al tio mi

citus iujn verkojn el nia Esperanto-literaturo – verkojn, kiel *Monda Federacio* de la usonano Ronald Glossop (el kiu mi prunteprenis iujn el la vortoj supre uzatajn).

Filizofio

Citindaj estas ankaŭ *La universalismo, historio, ekonomio kaj filizofio* de la franco Djemil Kessous; la diroj de la mondpensanto Thomas Payne (18-a jarcenta brit-devena usonano), kiu dum la tiama milito de la britaj kolonistoj en Nord-Ameriko kontraŭ la brita patrujo fiere deklaris sin esti „civitano de la mondo“. Inter aliaj memorindaj diraĵoj de Pejno estas „Mia lando estas la mondo kaj mia religio estas fari bonon“ kaj eble eĉ pli polemike, „Registaro, eĉ en sia plej bona stato, estas necesa malbono; en sia plej malbona stato, io netolerebla“.

La penoj de eŭropanoj forĵeti siajn malnovajn sentojn pri identeco, pri tio brakumi pli progresemajn ideojn, kiuj identigus ilin malpli kiel britojn, francojn, germanojn, ktp, kaj pli kiel eŭropanojn, estas aplaŭdindaj. Mi deziras, tamen, ke tio estu nur unua paŝo al kreo de reala sento, kiel Zamenhof mem diris, ke identeco estu ne nacia sed homarana; ke iam aŭstralianoj, ĉinoj, japanoj, usonanoj, afrikanoj ktp estu nur homoj, anoj de la homara raso, strebantaj plej efike protekti kaj progresigi la planedon kaj homaron. Mi argumentas, ke pli kaj pli la historio pravas, ke nacioj estas nur „imagataj komunumoj“, kiel argumentis Benedict Anderson en sia libro *Imagined Communities* (Imagataj Komunumoj).

Harmonia homaro

Notindaj por esperantistoj estas la vortoj de Zamenhof en letero de la 30a de junio 1914, indikantaj lian rifuzon partopreni starigon de Tutmonda Esperantista-Hebrea Asocio. Zamenhof skribis: „Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj, mi estas homarano, kaj ne povas ligi min kun celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. (Nacionalismo) prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos strariĝi sur grundo tute neŭtrala“.

Oni devas agnoski, ke en la nuntempa mondo ekzistas fortoj, kiuj kontraŭas progresigajn ideojn tiajn. Formale, laŭ internacia juro, pro antaŭaj kaj nuntempaj imperiaj rilatoj, la mondo dividiĝas en preskaŭ 200 laŭdire egalaj kaj suverenaj ŝtatoj: reale la vero estas alia. La plimulto, kiam cirkonstancoj necesigas tion, cedas malegale al pli fortaj hegemoniaj ŝtatoj, ĉefe, nuntempe, al la plej forta ŝtato Usono.

Tamen – ĉu tio, kion mi asertas, ja validas? Aŭ ĉu ĝi prezentas falsan, eventuale utopian bildon? Mi bonvenigus leganto-reagojn (tamen bv. koncizajn) cele al tiutema debato.

Vortoj de Renato Corsetti

Unu esperantisto informis min pri Esperanto, kiam mi estis 16-jara. Temis pri maljuna homo loĝanta en suda Germanujo apud vilaĝo Falkenstein. Tie mi estis partoprenanta junularan internacian tendaron. Li venis iun tagon kaj disdonis al la partoprenantoj propagandajn poŝtkartojn kun granda verda stelo, lia adreso kaj kelkaj informaj frazoj pri Esperanto.

Mi per mia, tiam fiere lernata germana demandis la tendarestrojn pri li kaj la tendarestro respondis: „Li estas maljuna stultulo, loĝanta ĉiapude.“

Mi tamen konservis la poŝtkarton kaj pensis pri ĉi tiu afero kaj post kvin aŭ ses jaroj, kiam mi vidis lernolibron de Esperanto en librovendejo, mi aĉetis ĝin.

Mi neniam sukcesis trovi tiun esperantiston. Kiam mi estis en kondiĉo serĉi lin, li verŝajne jam estis mortinta. Tamen mia danko al li restos granda. Li estis unu el tiuj „nekonataj esperantistoj“, kiuj komprenis, ke ni devas semi konstante, ankaŭ se ni ne vidos la frukton de nia laboro.

La 22-an de februaro 2000 „Juna amiko“ N-ro 2 (93), junio 2000.

Vortoj de Trevor Steele

Ĝis antaŭ nelonge estis tri „laborlingvoj“ de la teorie demokratia Eŭropa Unio: la angla, franca kaj germana. Laŭ germanlingva prezidanto tio estis tute „natura“ situacio. Sed nun finnoj transprenis la prezidantecon kaj decidis uzi nur la anglan, la francan kaj kompreneble la finnan, sed ne plu la germanan. (Eble ŝerce ili diris, ke ili akceptus ankaŭ la latinan).

Tiu decido okazigis oficialajn protestojn de la registaroj de Germanio kaj Aŭstrio. Kaj Deutsche Welle – la internacia germana radio-servo – petis la aŭskultantojn esprimi siajn pensojn tiuteme. Trevor Steele sendis supran tekston.

Trevor Steele estis direktoro de la Centra oficejo de UEA.

Kompreneble germanoj, aŭstroj kaj germanvisoj ne bonvenigas la novan lingvopolitikon. Kial ili uzu la lingvon de la angloj aŭ francoj?

Sed tia estas la eterna situacio de homoj, kiuj havas malfeliĉan sorton paroli „malgrandan“ lingvon: danoj, irlandanoj, nederlandanoj ktp. En Eŭropo estas eĉ grandaj lingvogrupoj, kiuj devas sin submeti: italoj, hispanoj ktp. Ĉu

estas demokratie, ke nur la angloj kaj francoj estu privilegiitoj? Ne, kompreneble ne.

Sed oni komprenas, ke demokratio estas neakordigebla kun glata funkciado de multlingva unio, ĉu ne?

Ne pravas. Ekzistas solvo, kaj mi persone spertis sennombrajn fojojn la avantaĝojn de tiu solvo. Ekzistas tre facila lingvo, kiu apartenas al neniuj kaj tamen al ĉiu. Tiu lingvo donas privilegion al neniuj kaj al ĉiu. Ĉiuj devas lerni ĝin, sed tio okazas rapide. Kaj oni povas uzi ĝin kun aparta sukceso en kontakto kun neeŭropanoj.

Mi parolas kompreneble pri Esperanto. Vere estas tempo por serioziĝi pri tiu kultura donaco.

Mi esperas, ke la germanlingvuloj pensos ne nur pri propraj avantaĝoj, sed celos permanentan solvon.

Mi dankas, ke Deutsche Welle elsendis mian kontribuon sen tranĉoj. Jen la komentoj de s-ro Lummerich, la parolisto, kiu petis la kontribuojn:

Esperanto, la helplingvo evoluigita de la pola kuracisto Zamenhof, estas certe facile lernebla, ĉar ĝi havas relative malgrandan vortstokon, kiu devenas precipe el la ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj, kaj ankaŭ la nombro de la gramatikaj reguloj estas relative limigita.

Ĉu ĝi taŭgas en tiu ĉi mondo, kiu tendencas al tutglobiĝo, kiel internacia komprenilo, mi ne povas juĝi. Pro la kreskanta malfaciliĝo de terminoj en ekonomio kaj politiko, scienco kaj tekniko, ŝajnas al mi pli sencohave plu uzadi sur tiuj kampoj la anglan, la plej disvastigitan lingvon de la mondo. Tiu ĉi lingvo estas relative simpla en sia gramatika strukturo, aliflanke ĝi havas gigantan vortstokon konstante kreskantan. Ĝi estas konciza sed preciza...

Trevor Steele respondis al Lummerich:

Mi dankas s-ron Lummerich pro tiuj vortoj. Lia mallonga prezento de Esperanto estas grandparte objektiva, sed ŝajnas al mi, ke li ne pesis la kernon de mia kontribuo. Mi, anglalingvulo, kiu dum jardekoj instruis la du lingvojn, povas certigi al li, ke la angla estas ja konciza kaj preciza, sed ankaŭ tre neregula kaj erariga, ke ĝia „giganta vortstoko“ estas granda malhelpo al alilingvuloj, ke ankaŭ tiurilate la zamenhofa sistemo de radikvortoj kaj afiksoj estas multege pli efika.

Sed ne temas unualoke pri komparo de la angla kaj Esperanto. Temas pri eĉ pli bazaj aferoj, nome justeco kaj efika kunlaborado. Ne nur Eŭropo, nia tuta mondo devas solvi multajn problemojn. La lingva problemo estus inter la plej facile solveblaj, se ni sukcesus alpreni tutmondan vidpunkton.

Vortoj de Valo

Pri surskribo sur muro

Sur mia televid-ekrano pasis raportaĵo pri Gvadelupo. En la daŭro de duonsekundo mi ekvidis blankan muron kun nigra grandlitera surskribo: LA NEGROJ EN AFRIKON !

La „beke“ (blankrasa kreolo), kiu skribis tion, verŝajne ne konscias, ke li estas tre minoritata en tiu departemento, kie loĝas en plimulto kolorhaŭtaj homoj, kaj ke tiuj ĉi rajtus diri: LA „BEKE“oj EN METROPOLAN FRANCION !

Li forgesis, ke li estas praido de la unuaj enmigrantoj, kiuj antaŭ jarcentoj invadis la Antilan insularon kaj masakris la Karibajn indiĝenojn. Poste tiuj koloniistoj importis per kargoŝipoj, kiel malmultekostajn varojn, amason da sklavoj aĉetitaj aŭ preditaj en Afriko. Tiuj negroj riĉigis ilin per sia pena trudlaboro, dum ili, la blankaj sinjoroj, vivis pigre kaj lukse en la moliga klimato de la insuloj.

Nun la praidoj de tiuj sklavoj, kaj precipe de nigraj sklavinoj gravedigitaj de siaj blankaj mastroj, ekkonscias pri la longa ekspluatado, kaj ekvokas forskui la jugon. Kompreneble tio ne plaĉas al la kreolaj mastroj, kutimaj je sia sendiskuta mastreco, kaj kelkaj el tiuj ĉi, aparte stultaj, dezirus forpeli la negrojn al Afriko. Ili ne komprenas, ke sen la negroj kaj diversproportiaj kolorhaŭtuloj, la ekonomio de iliaj insuloj falus en kolapson kaj en mizeron. Tiel sencerbaj estas la ĉieaj kaj ĉiamaj privilegiuloj.

Same, en la metropolo, multaj denaskaj francoj – ne nur privilegiuloj, sed ankaŭ simplaj laboristoj, - dezirus forpeli kaj reĵeti al ilia devenlando la enmigrantojn akuzatajn pri diversaj kulpoj. Ili okupas la lokon de niaj laboristoj. Ili manĝas nian panon. Ili kostas multe al la Socia Asekuro. Ili estas malpuraj, pigraj, mensogemaj, ŝtelemaj. Deliktuloj kaj krimuloj, ili endanĝerigas nian sekurecon, ili minacas nian kulturon. Oni elvokas invadon, kiu fine sufokus nian nacian identecon.

Oni forgesas, ke en periodo de ekspansio, niaj industriaj mastroj venigis tiujn homojn, logante ilin per relative altaj salajroj kompare kun la mizeraj vivkondiĉoj en iliaj landoj. Nun, ĉar la ekonomio ŝrumpis en krizo, la produktado ne havas plu tiomajn bezonojn. La malmultekosta manlaboristaro sen speciala kvalifiko estas anstataŭigebla per robotoj, multekostaj sed pli efikaj, kiuj havigas pli da profito. Oni ne plu bezonas la enmigrantojn. For de tie ĉi, aĉa vermaro! Ili, precipe la magrebanoj kaj la nigraj afrikanoj, fariĝis propekaj virkaproj, ŝarĝitaj per ĉiuj pekoj de Izraelo. Kaj ili vekis la latentan ksenofobion, kiu daŭre dormetas en la menso de la francoj, fieraj pro sia nacia identeco. Ne memorante, ke ili mem estas praidoj de diversepokaj enmigrantoj: keltoj,

fenicianoj, grekoj, romianoj, visigotoj, frankoj, saracenoj, angloj – kiuj estis ofte konkerantaj invadintoj, uzurpantaj alies teritorion.

Kiam, do, la homoj ĉesos sin rigardi reciproke kiel malamikajn fremdulojn? Ĉu ne estas nia tasko, al ni esperantistoj, heredantoj de longa kulturo, prezenti al ili la instruon de la grekaj filozofoj, de la saĝa judo Hilelo, de la milda galileano Jesuo kaj de nia Majstro Zamenhof: ke ĉiuj homoj estas fratoj?

Valo

Vortoj finaj

Nur tiam, kiam falos la lasta arbo, nur tiam kiam la lasta rivero estos venenigita kaj la aero malodoros, nur poste ni ekscios, ke monon oni ne povas manĝi.

